

# EL POPOLO CINIO

中國新道

5 1987







*Vizito al vilaĝanoj*

*Babilado*






# Malgranda Vilaĝo en Norda Ŝansji


*Ĉe fonto*



*Familio en la vilaĝo*







*Ĝojo de knabinoj*

En Tajhang-montregiono en norda Sanŝji-provinco estas malgranda vilaĝo Ŝjaŭlangzimen kun 18 familioj. Tie la maljunuloj estas respektataj kaj bone prizorgataj; la viroj kultivas kampojn aŭ laboras aliloke kiel dungitoj; kaj la virinoj mastrumas domon kaj flegas infanojn.

Pro sia izoliteco la vilaĝo estas malpli riĉa ol tiuj en aliaj lokoj. Tamen la vilaĝanoj ne volantas postresti kaj faras ĉion eblan por riĉigi sin. Nun la vilaĝo estas provizita per traktoroj kaj elektraj lampoj. Iuj familioj aĉetis televidilojn. Komprenoble, tio estas ĉe la sojlo de riĉeco. Iuj vilaĝanoj fariĝis ŝtatoficistoj, inĝenieroj kaj direktoroj de entreprenoj, kiuj laboras en aliaj lokoj. Ili ĉiam sopiras al sia hejmloko. Se venas okazo, ili vizitas siajn parencojn kaj aliajn vilaĝanojn en la hejmloko, rememorigante pri sia infaneco. Pli grave, ili donas konsilojn kaj informojn por konstrui la hejmlokon.



*Sur strateto en la vilaĝo*



## Enhavo

Novaj turismaj lokoj en Ĉinio . . . . .	2
Ŝanĝiĝo de Doŭdjan-vilaĝo . . . . .	5
Verda Huhhot . . . . .	15
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (5): Juŝu — ĉina akvoturo . . . . .	65
JUBILEA JARO DE ESPERANTO:	
Brila estonteco de Esperanto . . . . .	8
La mondo bezonas Esperanton . . . . .	9
Instruado de Esperanto en lernejoj . . . . .	10
Verda stelo (Kanto) . . . . .	12
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	24
SUR NIA LIBROBRETO: Pri la romano "Montara Vilaĝo" . . . . .	27
POR KOMENCANTOJ: Radiketoj; Por sin ŝirmi kontraŭ pluvo . . . . .	60
Kiel sportas ĉinaj handikapuloj . . . . .	58
Elspezi konforme al enspezo . . . . .	40
Gaja Dŭan-festo . . . . .	42
En ĉjang-a vilaĝo (Kolora bildoserio) . . . . .	49
Tie mi estis ne vane (Novelo) . . . . .	44
ĈINA LITERATURO:	
Popolkantoj el <i>Jŭefu</i> de Han-dinastio . . . . .	53
Du popolkantoj el <i>Jŭefu</i> : Malsanulino; Ĉe morusarboj . . . . .	56
ĈINAJ ARTOJ: La ĉinstila pentraĵo . . . . .	31
Li Kejan, majstro de la ĉinstila pentroarto . . . . .	21
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ŝtonkaverna arto de Ĉinio . . . . .	37
Vizito al ruinoj de la dinastioj Han kaj Tang . . . . .	61
Senhejmuloj en la mondo . . . . .	64
ĈINAJ POŝTMARKOJ: Poŝtmarkoj pri peonioj . . . . .	52
AMUZO . . . . .	14
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	29
INTER NI: Ni kaj "El Popola Ĉinio" . . . . .	13
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	57
SUR LA KOVRILO: Ĝojo pro amo (Tibeta ĝenro)	Farita de ĜIN ĜJEGONG
TRA NIA LENSŬO: Malgranda vilaĝo en norda Ŝanŝji	Fotoj de ŜEN ĈEN

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugaliao	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8;00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	5.00	US\$	6.50



# NOVAJ TURISMAJ LOKOJ EN ĈINIO

En la lastaj jaroj pli kaj pli multaj alilandaj turistoj vojaĝis en Ĉinio. Por kontentigi ilin Ĉinio turnis grandan atenton al eksplutado kaj utiligado de siaj turismaj riĉfontoj kaj konstruis novajn vidindejojn kun naciaj moroj kaj lokaj gustoj.

La vastega Ĉinio havas multajn pitoreskajn montojn, grandajn riverojn, lagojn kaj kalkŝtonajn kavernojn, kiaj Tajŝan-monto fama en- kaj eksterlande, Hŭangŝan-monto kun strangformaj pinoj, groteskaj rokoj, nubomaro kaj termofontoj, la Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero, multe ŝatata turisma itinero ktp. Ĉinio havas longan historion kaj en ĝi estas sennombraj antikvaj restaĵoj, historiaj objektoj kaj ruinoj, ekz. la Granda Muro ĉe Badaling, la Muzeo de Terakotaj Militistoj kaj Ĉevaloj de Ĉin-dinastio en Ŝjian, konata kiel la oka miraklo de la mondo ktp. Krome, ankaŭ estas multaj pitoreskejoj nekonataj kaj nemalfermitaj kaj historiaj ruinoj riparotaj. La turismaj servoj en ĉiuj lokoj de Ĉinio, post penema laboro, mal-

fermis novajn vidindejojn, krom ripari la ekzistantajn.

La mondfama Granda Muro havas longecon de 6 700 kilometroj kun diversaj stiloj en ĉiuj siaj partoj. La Granda Muro ĉe Badaling de Pekino, post riparado en kelkaj jaroj, longiĝis de 1 200 ĝis 2 600 metroj. Antaŭ 1983, ĝi havis nur du gvatturojn apertajn, poste oni riparis aliajn ok kaj konstruis 700-metran vojon por grimrado, kio multe oportunis al la turistoj. La Granda Muro ĉe Mutjanju de Hŭajĵoŭ-gubernio sub Pekino, estis riparata ekde marto 1983 kaj ĝia riparita parto kun longeco de 1 700 metroj kaj 14 gvatturoj jam malfermiĝis al turistoj en 1986. En la lastaj jaroj ĉe Ŝanhajĝŭan-pasejo, la startpunkto de la Granda Muro en oriento, nomata la "Unua Pasejo en la Mondo", oni riparis partojn de la Granda Muro en Ĝjaŭŝan kaj Laŭlongtoŭ longajn je 1.2 kilometroj kaj du gardoturojn. Nun, oni pretas konstrui Ĝenghaj-gardoturon sur

*Turisma loko sude de la Turo de Flava Gruo en Uhan*



*La Okcidenta Lago en Hangĝoŭ*





Laŭlongtoŭ. Ŝanhajgŭan-pasejo impone situas en strategie grava loko. Oni planas establi tie itinerojn, kiu enprenos en sin montojn, maron, pasejon, urbon, templojn, lagon kaj kavernojn, nome harmonian tuton el natura pejzaĝo, antikvaj konstruaĵoj kaj fortikaĵoj.

La Maŭzoleo de Ĝingis-Ĥano (1162—1227) sur Ordos-altebenaĵo en la suda parto de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio estas konstruo plena de densa nacimalplimulta koloro, kun areo de pli ol 55 000 kvadrataj metroj. Nova vestiblo, konstruita imite gardoturon de urbomuro en Ĵuan-dinastio, kaj ĝia ĉefa konstruo — tri interligitaj grandaj haloj en formo de jurto formis konstruaĵaron en antikva stilo. La giganta statuo de Ĝingis-Ĥano staras en la mezo de la konstruo kaj la fresko pri lia tuta vivo estas sur muro de la koridoro kondukanta al la okcidenta halo.

Uhan, ĉefurbo de Hubej-provinco, sidas en la meza baseno de Jangzi-rivero kaj la torenta rivero trafluas la urbon. Ambaŭborde de la rivero kuŝas la Testuda Monto kaj la Serpenta Monto, kaj la famaj Turo de Flava Gruo kaj Pavilono Ĉingĉŭan pompas ĉe Jangzi-rivero unu kontraŭ la alia. En 1985, la rekonstruita Turo de Flava Gruo laŭ la originalo sur la pinto de la Serpenta Monto ĉe la suda bordo de Jangzi-rivero, kaj la rekonstruita Pavilono Ĉingĉŭan malfermiĝis al vizitantoj. La rekonstruita Pavilono Ĉingĉŭan dorse kroĉiĝas al la Testuda Monto. Apud la duetaĝa pavilono estas palaco kaj du





*En la Konfuĉea Templo en Ĉjuŝu*

kioskoj. La konstruo ornamita per riĉaj koloroj, gravuritaj desegnoj kaj gravuritaj kaligrafiaĵoj, revidigas la fizionomion de la antikva kulturo de la loko.

En la urbo Lŭojang de Henan-provinco, konata kiel la “ĉefurbo de naŭ dinastioj”, oni riparis multajn historiajn restaĵojn en la lastaj jaroj, ekz., la Longmen-an Ŝtonkavernaron, la

*La Maŭzoleo de Ĝingis-Ĥano*





*La Granda Muro ĉe Mutjanju*

Tombon de Baj Ĝjuji, granda poeto de Tang-dinastio (618—907 p. K.) ktp. Sur Mangŝan-monto en la norda antaŭurbo de Ljoojang oni konstruas la Muzeon pri Tomboj de Imperiestroj de la Orienta Ĝou-dinastio (770—256 a.K.), Orienta Han-dinastio (25—220 p. K.), Okcidenta Ĝin-dinastio (265—316 p. K.) kaj Norda Ŭej-dinastio (386—534 p.K.) kaj restarigas la prifositajn 24 antikvajn tombojn. En la urbo Kajfeng de Henan-provinco, la ĉefurbo de la Norda Song-dinastio (960—1127 p.K.), oni rekonstruis la Drakan Pavilionon sur la ruino de la Imperiestra Palaco de Song-dinastio kaj konstruis Galerion de Vaksaj Statuoj de la naŭ imperiestroj kaj famaj korteganoj de la Norda Song-dinastio. Nun oni konstruas straton de Song-dinastio longan je 400 metroj, por reaperigi la siatempan prosperan fizionomion de la tiama ĉefurbo de la Norda Song-dinastio, imitante la notojn en antikvaj libroj.

En la lastaj jaroj, por disvolvi la turisman aferon ĉiuj lokoj de Ĉinio laŭ siaj specialaĵoj kaj kondiĉoj entreprenis multajn turismajn servojn kun nacia stilo kaj loka gusto. Krom ĝui pejzaĝojn kaj historiajn objektojn, multaj alilandaj turistoj deziras ankaŭ scii kutimojn kaj morojn de Ĉinio kaj la realan vivon de ordinaraj ĉinoj. Por kontentigi ilian deziron, en la urbo Uŝji de

Ĝjangsu-provinco oni malfermis itineron de ŝipveturo laŭ la antikva Granda Kanalo per ŝipo farita imite al tiu de imperiestro, por ke la turistoj apreĉu la pejzaĝon de la kanalo kaj iom spertu la vivon de antikvaj ĉinaj imperiestroj. En koncerna turisma aktivado la turistoj multe interesiĝas ankaŭ pri studo de la ĉina gastronomio, gimnastiko Tajĝjicjŭan, akupunkturo kaj masaĝo. Turismaj servoj de Ĉinio ankaŭ funkciigas geedziĝan turismon speciale por turistoj, kiuj deziras okazigi sian geedziĝon tute laŭ lokaj moroj de Ĉinio. La novgeedzoj portas belajn vestojn, kiajn surhavis ĉinaj antikvuloj dum sia geedziĝo, veturas palankene, genuiĝe salutas la ĉielon kaj la teron, enloĝiĝas en bele ornamitan ĉambbron por novgeedzoj kaj komencas sian mielan tempon.

En Ŭejfang de Ŝandong-provinco ĉiujare okazas festivalo de kajto. En Ĉjufu de la provinco, la naskiĝloko de Konfuceo, oni aranĝas ekskurson en la datreveno de la naskiĝtago de Konfuceo. Ankaŭ estas turismo, en kiu la turistoj pasloĝas en domoj de kamparanoj aŭ fiŝistoj por sperti la laboron kaj vivon de la lokanoj. Vintre en Ĝjilin-provinco regas frostoj. Tiam tre ĉarmaj estas la glacioplenaj arbobranĉoj. La koncerna turisma servo intencas utiligi la kondiĉojn por turni la urbon Ĝjilin en turisman kun originalaj trajtoj pri glacio kaj neĝo. Krome, la urbo Tong-



hŭa de la provinco organizas ankaŭ turisman serĉadon de ginsengoj, produktaĵo propra al la provinco, laŭ la "ginsenga vojo" en la monto. Laŭ la loka antikva kutimo la partoprenantoj devas surmeti vestojn de ginsengo-serĉanto, kunporti primitivan ginsengo-fosilon kaj best-ostan pinglon kaj kultu Sun Ljang ĉe lia tombo, la majstro-prapatron de ginsengo-fosantoj ĉe la komenco de la "ginsenga vojo" antaŭ ol ekiri al Bangĉuj-monto, kie kreskas ginsengoj. Dum serĉado kaj elfosado de ginsengo ĉiu turisto devas observi la regularon: flankenigi herbojn per la fosilo, frapi arbotrunkojn por interkomunikiĝi, ligi la tigon de la trovita ginsengo per ruĝa fadeno kun antikva bronza monero kaj atenteme elfosi ĝin per la best-osta pinglo. Tia ginsengo-serĉado en la densa arbaro de Ĉangbaj-montaro impresas la turistojn neforgeseble.

Laŭ la plano pri la turisma afero, de 1986 ĝis 1990, Ĉinio tutforte konstruas kaj konstruos ses-sep vizitindejojn influajn internacie en Pekino, Ŝanhajo, Ŝjjan, Gujlin, Hangĝoŭ, Ĝjansu-provinco (inkluzive de Suĝoŭ, Uŝji, Ĉangĝoŭ, Ĝenĝjang, Jangĝoŭ kaj Nankino), Kantono kaj Hajnan-insulo. Tiu ĉi plano estas en praktikado. Ekzemple, en Ŝjjan oni jam riparos 1 000 kaj riparos plie 2 000 elfositajn terakotajn militistojn kaj ĉevalojn de Ĉin-dinastio, kiuj konsistigas duonon de la totala nombro. En Nankino oni ordigos kaj riparos Ĉinhŭaj-riveron. La projektoj por tio estos ripari la riveron, ordigi la stratetojn,

loĝejojn de urbanoj ambaŭborde de la rivero, la Templon de Konfuceo kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, la Ardean Insuleton, Ĝanjŭan-ĝardenon, la Citadelon de Ĝonghŭamen-pordego ktp. Laŭ la plano la konstruado estos plenumita en kvin jaroj. Tiam Ĉinhŭaj-rivero reakiros la fizionomion en Ming-dinastio (1368—1644 p. K.) kaj Ĉing-dinastio (1644—1911 p.K.). En Hangĝoŭ oni riparos la ĉinmedicinan Apotekon Huĉingjutang, konstruaĵon el la posta periodo de Ĉing-dinastio. Kun la apoteko kiel la centro, sur la fono de monto, templo, antikva puto kaj la malnova domo de la fondinto de la apoteko, oni aldonos ĝardenon de pormedikamentaj bestoj kaj vegetaloj kaj sanitarejon, por ke ili formu ĉinmedicinan sanitaran kaj turisman centron. La sanitarejo konsistas el Sanitara Ĝardeno, Domo de Uŝu-o (ĉina tradicia luktarto), Restoracio de Tonika Manĝo, Gimnastejo ktp. Tie oni sanigos, maldikigos kaj beligos turistojn per la ĉinaj tradiciaj terapioj akupunkturo, masaĝo, ĉigong-o, uŝu-o ktp.

La nunaj malfermitaj turismaj lokoj multe interesas turistojn en- kaj eksterlandajn. Estas antaŭvideble, ke senliman plezuron portos al ili pli multaj novaj turismaj vidindejoj kaj aktivaĵoj. □

\* La aŭtoro estas laboranto de la Ĉina Turisma Buroo.

ĜENG ĜENGJE:

## Ŝanĝiĝo de Doŭdjan-vilaĝo

En la gubernio Fangŝan, la antaŭurbo de Pekino, troviĝas la vilaĝo Doŭdjan loĝata de huj-oj, han-oj, manĉuroj kaj ĝŭang-oj. Ĉi tie la produkt- kaj viv-manieroj ŝanĝiĝis kun la ekonomia reformado de la ĉina kamparo en la lastaj jaroj. La pasinta kolektiva produktado estis anstataŭigita per laŭkontrakta produkta-

do de malmultaj personoj. Ili ŝanĝis la antikvan tradician kultiv-manieron en sciencan. Krom la agrikultura produktado, ili donis grandan atenton ankaŭ al industrio, kromprodukto kaj brutobredado.

Doŭdjan estas malgranda vilaĝo kun malfekundaj kampoj. Antaŭe, ĝiaj loĝantoj ofte fuĝis

de natura katastrofo. Ĝis 1977, ĉ. 4 000 loĝantoj (inkluzive de pli ol 1 600 laboruloj) de ĝiaj minimume 1 100 familioj sin vivtenis per 353 hektaroj da agroj, la pokapa meznombra jara enspezo estis nur 60—70 jŭanoj. Tiam juna kamparano bedaŭre diris: "La enspezo de unu viro estas malpli valora ol ovometan-



*En anasobredejo*

ta kokino.” Nun la stato tute aliĝis: 180 kamparanoj (plejparte estas virinoj) kultivas ĉiujn kampojn de la vilaĝo laŭkontrakte. Ili konsistigas 4% de la totala loĝantaro de la vilaĝo. La pohektara produktokvanto de greno kreskis de 5 700 kg. en 1977 al 11 700 kg. en 1986. Komence de 1980, la vilaĝo ĉiujare pliproduktis meznombre 550 000 kg. da greno kaj la pokapa neta enspezo atingis 1 000 jŭanojn.

De antikve, Ĉinio dediĉis grandajn laborfortojn al la agrikultura produktado. Nun tio ŝanĝiĝis iom. Same kiel en multaj aliaj lokoj, la plejparto de ĝiaj kamparanoj sin liberigis de la kamplaboroj. Eĉ la 180 personoj sin okupantaj pri agrikulturo ne plu estas tiaj kamparanoj “kun la vizaĝo al la tero kaj kun la dorso al la ĉielo”, sed kultivas maŝine. Mi vizitis ĝian stacion de agrikulturaj maŝinoj. Tie estas 4 grandaj kombajnoj, 12 grandaj kaj mezgrandaj traktoroj, aŭtoj kaj aliaj agrikulturaj maŝinoj. Ĝang Ĝenljang, kiu laboris kiel gvidanto pli ol 30 ja-

roj en la vilaĝo, rakontis al ni, ke dank’ al siaj entreprenado kaj akumulado, la vilaĝo sinsekve aĉetis pli ol 250 grandajn kaj malgrandajn agrikulturajn maŝinojn kun 2 045 ĉevalpovoj en la lastaj jaroj, la produktiveco pliiĝis 13-oble kompare kun tiu antaŭ la mekanizo.

La nova entreprenado de Doŭdjan ekpaŝis de disvolvo de

bredado kaj paŝtado. En 1979, la vilaĝo unuafoje demetis de si la ĉapon “grenomanka taĉmento” kaj “ŝulda vilaĝo” kaj posedis 750 000 kg. da greno. Tiam iuj proponis vendi grenon por aĉeti kemisterkon. Tion ne konsentis Ĝang Ĝenljang. Li opiniis, ke tro multa kemisterko facile malmoligas la kampojn, ne povas altigi la produktokvanton de greno, sed multigos la produktokoston. Pli bone estas, ke oni prenu la superfluan grenon kiel brutonutraĵon por bredi bovojn, porkojn, ŝafojn kaj kokojn, poste fekundigu la kampojn per ilia fekaĵo por konservi la ekologian ekvilibron de agrikulturo.

Lia propono estis akceptita de la kamparanoj. Sekve, en la vilaĝo oni konstruis furaĝo-pri laborejon kun taga produktokvanto de dekkelkaj tunoj; unu post alia fondiĝis 14 viandbovaj, 12 malgrasviand-porkaj kaj unu laktobovina bredejoj kaj tri kokobredejoj ĉiu kun 10 000 kokoj, kaj krome, oni bredis ankaŭ multe da ŝafoj kaj kunikloj.

*Ĝang Ĝenljang (la unua de maldekstre) konigas konstruan projekton de Doŭdjan-vilaĝo.*





Ĉiutage la vilaĝo provizas Pekinon per bovaĵo, kokovoj kaj lakto. La bovaĵo de Doŭdjan estas freŝa, delikata, nutroriĉa kaj bonkvalita, kaj prenata ankaŭ de la Civila Aviada Adiministracio de Ĉinio kiel manĝaĵo de aviadilaj pasaĝeroj.

En viandbova bredejo okcidente de la vilaĝo, mi vidis, ke bredisto donas furaĝon al bovoj aĉetitaj el la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. La bredisto diris al mi, ke ili aĉetas bovojn de paŝta regiono kaj nutras ilin per miksfuraĝo laŭ scienca metodo. Post ok-monata bredo ili povas atingi normon de viandbovo. Poste la bredistoj portas la viandbovojn al la unuigita prilaboro de viando. Krome, ili fondis fridigan staplon kun aŭtomate malfermebla ferpordo, kiu povas enteni 150 tunojn da viando. Mi vidis ene amasojn da bovaĵo kaj ŝafaĵo kiel montetojn.

La brutobredado de Doŭdjan preparis kondiĉojn por disvolvi produktadon de greno kaj ankaŭ liveris kapitalon por agrikultura produktado. Sterkante kampon per fekaĵo de brutoj kaj kortobirdoj, oni povas ŝpari kemisterkon kaj pliprodukti grenon; la metano preparita el fekaĵo povas produkti elektran energion kaj esti utiligata kiel hejtaĵo.

Laŭdire, franca specialisto venis al Doŭdjan por esplori kiel la vilaĝo aranĝas superfluajn laborfortojn de kamparo. Kiam li propraokule vidis, ke plejparto de la tieaj kamparanoj sin okupas pri prilaborado de greno kaj servoj kaj laboras en vestofarejo, brikejo, fabriko de emajlaĵoj kaj aliaj 21 entreprenoj funkciigataj de la vilaĝo, manpremante kun Ĝang Ĝen-

ljang, li diris: "Vi kreis novan vojon de urbosimila kamparo."

Irinte en la laborejon de pluvomantelo de la vestofarejo Janli, mi atente rigardis plumovestojn delikate faritajn el bonkvalita ŝtofo kaj eksportotajn al Kanado. Iu teknikisto diris al mi, ke la fabriko kunlaboras kun la fame konata fabriko de pluvomantelo kun la marko "Granda Muro" en Pekino. Ĝiaj produktaĵoj ne nur vendiĝas en la enlanda merkato, sed ankaŭ eksportiĝas al 8 landoj kaj regionoj de la mondo. Estas malfacile kredeble, ke la fabriko estas funkciigata de vilaĝo, kun avangardaj produktaj ekipaĵoj kaj en bona laborordo.

La disvolviĝo de vilaĝaj entreprenoj faris la vilaĝon prospera urbeto. La vivo de kamparanoj pli kaj pli proksimiĝas al tiu de urbanoj. Ĉi tie aperis diversaj servoj. Montrante kvar grenejojn nove konstruitajn, el kiuj ĉiu povas enteni grenon de 200 000 kg., Ĝang Ĝenljang diris: "La grenejoj konservas grenon por kamparanoj kaj

(Daŭrigo de p. 9)

La proceso de proksimiĝo certe daŭrigos kaj kaŭzos pli oftajn kaj necesajn rilatojn inter nacioj kaj internaciaj instancoj por trakti komunajn aferojn. En tiu proceso ni jam vidis, ke aperas postuloj pri uzado de lingvoj, kiuj ne antaŭe estis uzataj en internaciaj rilatoj.

Nacioj, kiuj antaŭe ne estis konsiderataj gravaj, unu post alia evoluiĝis kaj postulas partoprenon ĉe la tablo en internaciaj intertraktadoj. Tio de tempo al tempo ankaŭ signifas, ke ekstaras postuloj pri enkonduko de novaj lingvoj. Ĉiuj

ankaŭ provizas ilin per greno sen postuli kontantan pagon. Ili faras kun la kamparanoj likvidon je la jarfino. Tio estas pli oportuna al la vilaĝanoj ol la urbanoj en aĉeto de greno. Estas ĉiam aĉeteblaj ankaŭ la ĉefaj manĝaĵoj, kiaj mantoo (vaporumita farunaĵo), vermiĉeloj, bovaĵo kaj ŝafaĵo. En la vilaĝo funkcias du novaj restoracioj, kiuj faciligas manĝadon al kamparanoj."

La disvolviĝo de la sociaj servoj akcelis urbanizon de la loĝejoj. La etaĝdomoj por kamparanoj estas provizitaj per kranakvo kaj varmocentralo. Mi speciale vizitis familion antaŭ nelonge transloĝiĝintan en novan domon. La familio konsistas el kvin membroj. Ili aĉetis la duaĝan dometon kun ok ĉambroj pro pli ol 20 000 jŭanoj kaj la monsumo estas amortizita.

Kiam mi adiaŭis Doŭdjan, la kamparanoj de la vestofarejo Janli estis forirantaj de laboro, knabinoj svarme eliris kun bicikloj. Ili en modaj vestoj gaje parolis kaj ridadis. □

konscias pri la avantaĝoj por tiuj, kiuj rajtas paroli sian propran lingvon. Ankaŭ temas pri la rangoj inter lingvoj kaj prestiĝo.

Ni esperantistoj scias, ke Esperanto havas avantaĝojn antaŭ la etnaj lingvoj. Rapidelernebleco estas grava, ĉar lernado ne nur estas longedaŭra afero, sed ankaŭ demando pri ekonomio. La neŭtraleco estas alia grava faktoro.

Mi esperas, ke ni kune dum la jubilea jaro sukcesos konvinki plendi por utiligo de Esperanto kie lingvaj obstakloj malhelpas. □

# BRILA ESTONTECO DE ESPERANTO

de LAŬ JONG\*

En 1887, L. L. Zamenhof kun granda idealo kaj bela espero publikigis la "Unuan Libron" kaj tiel donis Esperanton al la popoloj de la tuta mondo kiel instrumenton por interkompreniĝo kaj harmonia kunekzisto de la homaro. Ĝia centjara praktikado pruvis, ke ĝi povas servi kiel kontaktilo por plenumi la historian taskon interŝanĝi la pensojn kaj sentojn inter la popoloj de la mondo.

Erudiciuloj de diversaj landoj elmetis multajn projektojn de

komuna lingvo por la homaro, el kiuj Volapük, Ido, Internacia, Okcidental kaj Novial estis praktikitaj. Sed ili ĉiuj malaperis pro malsukceso.


Nia Esperanto kreskas en centjaraj praktikado kaj konkuro. Ĝia centjara praktikado fare de la tutmondaj popoloj pruvis, ke ĝi estas viva lingvo. Estontece ĝi fariĝos pli perfekta en konkuro kun aliaj nove projektitaj internaciaj lingvoj kaj servos kiel vere praktika internacia helpa lingvo, kiu fine evo-

luos en la komunan lingvon de la homaro. Ekzisto, paco kaj disvolviĝo estas tri bezonoj de la homaro. Kvankam hodiaŭ estas ankoraŭ nigraj nuboj super la terglobo, tamen la ĝenerala tendenco estas, ke la lumo superos la mallumon, la klereco venkos la malklerecon, la civilizacio anstataŭos la barbarecon kaj la paco estos eterna. Kun la progreso de la sciencoj kaj teknikoj de la homaro, pli kaj pli "malgrandiĝos" la terglobo. La homaro fine fariĝos granda familio kaj certe venos la ora epoko de Granda Harmonio de la homaro. Morgaŭ aŭ postmorgaŭ la homaro certe havos sian komunan lingvon. Neniu nacia lingvo kapablos preni sur sin tiun historian mision pro la limigiteco de la nacia sento kaj faktoroj sociaj kaj psikologiaj. Nur la neŭtrala internacia helpa lingvo kapablos plenumi tiun taskon.

Ni esperantistoj multe klopodu kaj antaŭenmarŝu por venigi kaj veterana esperantisto de tiun oran epokon! □

\* La aŭtoro estas verkisto kaj veterana esperantisto de Ĉinio. La artikolo estis verkita laŭ la peto de nia redakcio.

*La aŭtoro (la unua de maldekstre) en Esperanta kunsido*





# La mondo bezonas Esperanton

de INGEMUND BENGTTSSON (Svedio)

*S-ro Ingemund Bengtsson estas membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, prezidanto de la sveda parlamento kaj vicprezidanto de la Konsultiĝa Komitato de la Sveda Social-demokratia Labor-partio. Laŭ nia peto li verkis jenan artikolon kun titolo farita de ni kaj samtempe skribis leteron al ni:*

*Al redakcio de "El Popola Ĉinio"*

*Stokholmo 1987-01-13*

*Antaŭ kelka tempo venis via peto pri artikolo por via gazeto kaj jen venas mia kontribuo.*

*Kun ĝojo mi legis pri la Universala Kongreso en Pekino kaj kaptas la okazon gratuli al la sukceso.*

*Estime salutas,*

*Ingemund Bengtsson*

*Ni salutas kaj dankas s-ron Ingemund Bengtsson kaj ĉiujn aliajn, kiuj sendis al ni artikolojn por Jubilea Jaro de Esperanto.*

— La Red.

Esperanto estas hodiaŭ ofte uzata internacia lingvo. Ĉiutage iras leteroj skribitaj en Esperanto inter korespondemaj homoj ĉie en la mondo. Internacia amika korespondado fariĝis grava aktiveco por homoj, kiuj okupiĝas pri Esperanto. Estas kutimo, ke kursgvidantoj helpas la kursanojn trovi korespondamikojn. Ankaŭ la esperantoklubaj letervesperoj abundas. Amikaj rilatoj ligiĝas en granda internacia reto.

Tia internacia korespondado funkcias ne nur eduke kaj instrue, sed ankaŭ kiel laboro por paco. Ankaŭ multaj Esperantoaranĝoj diversloke ĉiujare kreas amikajn internaciajn rilatojn de granda valoro.

Mi konstatis, ke regas la speciala kaj bona etoso inter la esperantistoj en la tuta mondo. Ĉu ĝi dependas de la lingvo mem aŭ de la homoj, kiuj elektis lerni Esperanton? Mi kredas,

ke la etoso plejparte dependas de la homoj, kiuj spontane interesiĝis pri la fenomeno internacia lingvo. Ili kreis la etoson de bona volo kaj reciproka respekto kaj estimo, kaj ĝi fariĝis elemento en la hodiaŭa Esperantolaboro.

Estas evidente, ke la mondo bezonas la lingvon Esperanto — ne nur la esperantistoj — kaj mi esperas, ke eblas konservi la etoson de amikaj rilatoj, kiam ni ofertas la lingvon al pli ĝenerala uzo sur aliaj kampoj de homa aktiveco.

Oni ofte uzis la esprimon, ke la mondo malgrandiĝis, kiam la vojaĝeblecoj pliboniĝis pere de ŝipoj kaj fervojoj, poste la aŭtoj kaj nun la rapida flugotrafiko. Krom tio, ankaŭ la telefono estas malgrandiga kaj proksimiga faktoro en la internacia komunikado.

*La aŭtoro akceptas silkan portreton de d-ro Zamenhof donacitan de la ĝenerala sekretario de CEL Zhang Qicheng.*

*(Daŭrigo sur p. 7)*





La aŭtoro

# Instruado de Esperanto en lernejoj

de GERMAIN PIRLOT (Belgio)

Post unua jarcento estas oportune starigi bilancon pri la stato de Esperanto en plej diversaj medioj, precipe pri ĝia oficiala instruado en lernejoj. Ĉefe per tia instruado ni sukcesos diskonigi pli vaste “nian karan lingvon”, altigi la lingvan nivelon de la esperantistaro kaj pligrandigi ĝian uzadon por fakaj, sciencaj, teknikaj, profesiaj celoj.

Nuntempe, preskaŭ ne eblas scii, kio okazas en elementaj kaj mezgradaj lernejoj, ĉar mankas kompletaj, freŝdataj statistikoj. Estas tasko, kiun la nova estraro de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) metis en sian laborplanon, sed, verŝajne, tio postulos ankoraŭ du, tri jarojn, ĝis kiam ni havos fidindajn ciferojn tiurilate.

Sekve, ni pritraktos nur la situacion ĉe supera nivelo, t.e. en universitatoj kaj samgradaj institutoj, pri kiuj ni havas pli malpli bonan skizon, ĉar pri tiu stato okazis pluraj enketoj dum la lastaj jaroj. Eĉ ĉi-kaze ni restu prudentaj konsiderante ke, malgraŭ la legenda bonvolo en la Esperanto-medioj, arigado de informoj restas malfacila laboro; ekzemple, okaze de la lasta enketo je la komenco de 1986 reagis nur 81 homoj el 199 kontaktitaj kursgvidantoj kaj eblaj informantoj. Krome, la nocio de

universitato kaj supera instituto diversas de lando al lando.

Tamen, la situacio estas kontentiga, des pli ke estiĝis grava progreso dum la lasta jardeko. En 1970 estis registritaj oficialaj kursoj en 30 lernejoj (universitatoj, superaj institutoj) de 15 landoj (I. LAPENNA, U LINS, T. CARLEVARO, *Esperanto en perspektivo*, UFA/CED, London-Rotterdam, 1974, pp. 103-108). Sed tiuj ciferoj rapide kreskis ekde 1980 kaj ili estis respektive: en 1981, 56 kaj 15; en 1983, 79 kaj 17; en 1984, 109 kaj 22; en junio 1986, 125 kaj 28 (G. PIRLOT, *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo*, Oostende, 3a eld. jan. 1982; 4a eld., dec. 1983; 5a eld., dec. 1984; 6a eld., junio 1986).

Kie ili okazas? — En ĉiu kontinento estas almenaŭ unu, kvankam ni plezure konstatu ke, laŭ la nombro, Ĉinio troviĝas je la pinto! Laŭ la lasta enketo, ĝis junio 1986, la dispartigo estis jene: Eŭropo, 16 landoj kaj 58 lernejoj; Azio, 4 landoj kaj 40 lernejoj; Amerikoj, 6 landoj kaj 25 lernejoj; Afriko, 1 lando kaj 1 lernejo; Oceanio, 1 lando kaj 1 lernejo. Rapida analizo montras, ke ĝenerale Esperanto estas instruata kiel elektebla fako, kiu havigas diplomon, aŭ atestilon, post sukcesa ekzameno.

Je ĉiuj niveloj plej grandaj eblecoj por oficiale instrui Esperanton en la lernejoj, dum la normala horaro, troviĝas en Bulgario, Hungario kaj precipe en Ĉinio. Ekzistas ankaŭ leĝoj aŭ ministraj dekretoj pri la instruado de Esperanto, kiuj eble ne estas sufiĉe ekspluataj, en Aŭstrio, Brazilo, Italio, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, San Marino, Sovet-Unio (en kelkaj respublikoj). Estas ankaŭ ŝtatekzamenoj, ekzemple en Britio kaj Nederlando. Krome, ampleksaj raportoj pri motivoj instrui Esperanton estis senditaj dum la lastaj jaroj al Ministroj pri Edukado, i.a. en Finnlando kaj Kanada Kebeko. Al tio ni aldonu proponojn rilate al la enkonduko de Esperanto en la lernejoj, kiuj estis deponitaj ĉe naciaj asembleoj (ekz. en Italio kaj Francio) kaj eĉ ĉe la Eŭropa Parlamento; finfine mi menciui la lastan Rezolucion ĉe UNESKO, kiu eksplicite “invitas la ŝtatojn instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado”.

Estas domaĝe ke, samtempe, ni bedaŭru gravegajn mankojn en tiu instruado! Tro ofte tiaj kursoj okazas izole, sen iu ajn kontakto kun aliaj landoj, kaj kelkfoje sen rilato kun samlan-



daj universitatoj aŭ kun landaj Esperanto-medioj. Ni eĉ povus diri, ke multaj estas tute sencelaj kaj sekve senefikaj. Endus esplori ankaŭ pri konkretaj rezultoj. Okaze de miaj enketoj, pluraj gekolegoj cetere substrekis la mankon de "interligilo", kiu ebligus interŝanĝi spertojn, materialon, programojn kaj diversajn komunikaĵojn; pluraj plendis pri la nesufiĉa uzado de Esperanto por fakaj celoj. Tiun situacion bonege resumis en letero D-ro J. Kordylemwski: "Ni troviĝas kvazaŭ en fermita cirklo. La faka uzo de Esperanto ne estas grandskala; por pligrandigi ĝin ni devas allogi al Esperanto pli da fakuloj. Sed kiel argumenti, se la faka aplikado


de nia lingvo estas tiel malgranda? Ni eliru el ĝi spiralforme, paŝon post paŝo, instruante la lingvon kaj aplikante ĝin en fakaj medioj" (10. 10. 1986).

Tion bonege komprenis la ĉinoj, kiel rimarkigas D-ro O. Haszpra en *Budapeŝta Informilo* (oktobro 1986, pp. 20-21), en sia raporto pri la "scienca konferenco", kiu okazis en Pekino tuj antaŭ la UK: "La nombro de ĉinaj partoprenintoj estis procente/ĉ. 85%/tute inverse kiel ĉe la UK, kie la eksterlandaj estis pli multaj. La kaŭzoj estas diversaj, sed estas klare, ke la ĉinoj konsideras plej grava ĝuste la sciencajn kaj teknikan aplikadon de la lingvo". Kaj li jene konkludas: "Do ni eŭropanoj

havas ĉiujn kaŭzojn por pliaktivigi en la scienca aplikado de Esperanto kaj ne resti post la grandelane startinta ĉina movado".

Dum la jubilea jaro ni ne nur festu la jarcenton de Esperanto, sed ni ankaŭ kaptu tiun unikan okazon por serioze, ĝisfunde analizi la situacion de la instruado de nia lingvo kaj konvene pluagadi. Estas grandiganta intereso pri Esperanto, jes, sed ĝi povos tre rapide ĉesi, se la lernado de nia lingvo kondukus al senelirejo. Lerni lingvon sen konkreta uzado estas sentila lukso! Dum la unua jarcento ni ĉefe paroladis pri Esperanto, ni esperu ke dum la dua ni precipe kaj profesie laboros per ĝi. □

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Tajŝan-monto
2. Hŭangŝan-monto
3. Tri Gorĝoj
4. Uhan
5. Lŭojang
6. Gengĝoŭ
7. Ŝĵian
8. Ŭejfang
9. Ĉjufu
10. Ĝjilin
11. Tonghŭa
12. Suĝoŭ
13. Gujlin
14. Hangĝoŭ
15. Kantono
16. Huhhot
17. Gujjang
18. Dunhŭang
19. Tjanŝuj
20. Datong
21. Dazu-gubernio

# Verda Stelo

VORTOJ DE MA JONG  
ELĈINIGIS LAŬLUM  
MUZIKO DE GŬO FENG



Ja ne ha- zar- das nia man- prem', nek tro malfru- as kun ĉagren';

Marŝu ni ŝul- tro ĉe ŝul- tro, marŝu ni ma- no en man',



ni jam de- lon- ge inter- ko- nis nin antaŭ ĉi ti- u kun- ven'. Ho,

kun sen- li- ma es- pe- ro, kun arda vo- lo de a- van'!



bri- lu ĉi- am al ni ver- da stel' per la ko- mu- na lingvo de es- per'! Ho,



ĉi- am bri- lu ver- da stel' arde al la a- mi- ke- ca cel'!



# Ni kaj "El Popola Ĉinio"

## NI REFOTIS FOTOJN DE EPĈ PER LA DIAPOZITIVA FILMO

Nia konatulino ricevis rekte de vi la 11-an numeron de via revuo. Estas fantazie! Kia UK? En kiel fantazia lando? Ni decidis post ricevo de tiu ĉi numero refoti per la diapozitiva filmo plimulton da fotoj. Ni uzus tiam tiajn diapozitivojn dum multaj prelegoj, kiujn organizas nia Klubo. Sekvontaj okazos baldaŭ. Dum la prelegoj ni uzas multajn diapozitivojn prezentantajn viajn revuojn, kovertojn kun belaj poŝtmarkoj, librojn, precipe fabelojn, kiuj ege plaĉas al ĉiuj pro belegaj desegnaĵoj. Niajn prelegojn ni ĉiam komencas de tiu ĉi diapozitivo prezentanta vian revuon kaj anoncon. Kompreneble temas pri prelegoj pri "Mia vojaĝo de la revoj" kiel ni nomis.

**KOTLA E-KLUBO** (Pollando)

## LA ARTIKOLOJ MULTE PLIRIĈIGIS NIAJN KONOJN PRI ĈINIO

Vi ne povus imagi, kiom multe pliriĉigis niaj konoj pri la Ĉina Popola Respubliko kaj pri la ĉina vivo per la revuo EPĈ. La gejunuloj atente legas la ar-

tikolojn traktantajn pri junularo, pri la historio kaj pri la ĉina loĝantaro de diversaj regionoj. Multaj neesperantistoj petas nin traduki por ili la artikolojn pri sanigaj ekzercoj. Kelkaj amikoj kun gazetaj spertoj studadas la revuon el ĉi tiu vidpunkto. Kaj venontjare ili informos vin pri la konkludoj. Ankaŭ la literaturaĵoj estas tre interesaj: ili montras la spiriton kaj la direktan de la nuntempa ĉina literaturo. La noveloj de Lusin estis antaŭ nelonge objekto de interesa scienca referaĵo. La numero 11 de EPĈ pri la kongreso, estas rava! Ankaŭ la artikolo pri Sun Jatsen donis al ni imponan bildon de vere granda revoluciulo.

**I. F. BOCIORT** (Rumanio)

## LA ARTIKOLO INTERESIS MIN

Post ricevo mi povis nur trafoli la kajeron, sed la artikolo "Ĉinaj urboj en disvolviĝo" ege interesis min tiel, ke mi devis legi ĝin ĝis la fino. La progresoj de la ĉina popolo mirigas min kaj miajn geamikojn, al kiuj mi pruntedonas la interesajn numerojn.

**PAUL BODEN** (GDR)

## ANKAŬ MI VOLAS UZI LA ĈINAN MEMLERNAN SIS- TEMON

Speciale min interesis la artikolo "Vojo de memlernantoj" en la numero 11. Mi tralegis la artikolon kaj poste skribis al la ĉina ambasadorejo en Aŭstrio, ke ankaŭ mi volas uzi la ĉinan memlernan sistemon kaj studi medicinon.

**RUDOLF JAX** (Aŭstrio)

## VI ATINGIS SUKCESOJN EN KONSTRUADO DE TIBETO

Kun ĝojo mi povas per viaj artikoloj pri tio konstati, ke la socialisma disvolviĝo ne preterpasis Tibeton. La artikoloj montris, ke la gekamaradoj el Ĉinio devis multe fari, por ke Tibeto ne plu restu en sia tiama estinteco. Mi povis konstati ankaŭ, ke vi jam atingis signifajn sukcesojn. Mi nur pensas pri la malfacila konstruado de modernaj stratoj kaj pontoj en Tibeto. Ankaŭ la moderna pliklerigo de la homoj en Tibeto estis grava tasko por la ĉinaj gekamaradoj, kiun ili bone plenumis, kiel mi ankaŭ povis ekscii el la artikoloj en via revuo. Mi dankas vin pro tiuj ĉi interesaj artikoloj.

**KARL-HEINZ DIEDRICH**  
(GDR)

**ŜIKA VESTO**

(Humuraĵo)

Vendisto: "Aĉetu ĉi veston! Ĝi estas en modo nuntempe."

Kliento: "Diru al mi, ĉu ĝi senkoloriĝos, se oni portos ĝin longe."

Vendisto: "Oho, ne. Rigardu, ĝi jam estas de tri jaroj en la montrofenestro, tamen ĝia koloro estas ankoraŭ tiel freŝa."

**AKVOGUTOJ EL MALPLENA PUGNO**

(Magio)

Ludo:

Ludanto montras siajn mankavojn kaj mandorsojn al la publiko por atesti, ke ili estas

malplenaj. Pugniginte la maldekstran manon, li ekblovas sur la pugnon. Kiam li kunpremas la pugnon, gutas el ĝi akvo, kiu povas plenigi preskaŭ unu kuleron. Poste li frotas la kunmetitajn manojn kaj montras ilin al la publiko. Videblas nenio en la mankavoj.

Artifiko:

Estas mirinde, ke el pugno gutas akvo, tamen la ludo estas simpla. Prenu malplenan koliriuĵon el mola plasto, fortranĉu iom de ĝia supra parto kaj plenu ĝin per akvo. Antaŭ ludado metu ĝin en vian maldekstran manikon. Post kiam vi montras viajn malplenajn manojn al la publiko, vi mallevas vian maldekstran manon kun kurbigita mankavo por kapti la koliriuĵon tuj elfa-

lantan el la manik-aperturo. Tuj sekve, etendu kaj pugnigu vian maldekstran manon, akvo ekgutatas el la pugno. Kiam la akvo plene elpremiĝas, vi denove mallevas vian maldekstran pugniĝintan manon kaj tenas ĝin en pozo, ke vi poste pli facile remetuu la koliriuĵon en la manikon. Rapide levu kaj malfermu la pugnon ke la koliriuĵo jam falu en la manikon, frotu la kunmetitajn manojn kaj montru ilin al la publiko, por atesti ke estas nenio sur viaj mankavoj.

**ENIGMO**


Fluetas rekta rivero. Ĝi ne ondiĝas de vento. Ĝi ŝveliĝas somere kaj malmultiĝas vintre.

(objekto)

(Solvo trovebla en ĉi numero)

**Nova libro de la ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO**

**Ĉina Antologio [1919-1949]**



En la libro kolektiĝis 55 verkoj inkluzive de noveloj de Lusin, Maŭ Dun kaj Bakin, raportaĵo de Ŝja Jan, eseoj de Ĝu Ziĉing, Bingŝin kaj He Ĉjifang kaj poemoj de Gŭo Moĵŭo kaj Ŭen Jidŭo, skribitaj en la periodo 1919-1949. Ili prezentas al niaj legantoj la socian fizionomion kaj popolan vivon de la siatempa Ĉinio kaj suferojn, strebadon kaj batalon de ordinaraj ĉinoj. En tiu senco la antologio povas esti rigardata kiel spegulo de la ĉina socio en tiu tempo.

Div. aŭtoroj kaj tradukintoj

Kompil. la redakcio de ĈEE

612p. Ilus. 21cm. Bind. 10-Es-2064S

Prezo: £ 6,40 US\$ 9,80

Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
perantoj de EPĈ

aŭ Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio  
(GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



LI ĈJANG:

# VERDA HUHHOT

La 1-a de majo de la kuranta jaro estas la 40-a datreveno de la fondiĝo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en norda Ĉinio. Antaŭ tiu festo mi, kiel raportisto de EPC, faris intervjuon en tiu ĉi regiono. La unua loko, kiun mi vizitis, estis Huhhot, la ĉefurbo de la regiono kaj fama urbo en norda Ĉinio. "Huhhot" en la mongola lingvo signifas "verdajn urbon". La urbo havas historion de pli ol 400 jaroj. En la lastaj 40 jaroj Huhhot rapide progresis kaj fariĝis la politika, ekonomia kaj kultura centro de la regiono. Mi restis tie nur kvin tagojn, la urbo tamen donis al mi fortan impreson.

En mia imago tiu fama urbo en norda Ĉinio estas tre tre malproksima. Sed fakte mi atingis ĝin nur post unu-nokta veturado per trajno de Pekino. Ho, ĝi ne estas tiel malproksima!

Elirinte el la fervoja stacio mi veturis aŭte al la tranoktejo, la Hotelo Interna Mongolio. Estas puraj la urbaj kvartaloj kaj larĝaj la stratoj, kiuj estas dividitaj per altaj poploj en vojliniojn pormaŝinveturilan kaj porbiciklajn. Ambaŭflanke de la stratoj staras malsamstilaj domoj, nove konstruitaj, kio montras la rapidan disvolviĝon de la urbo en la lastaj jaroj. La Hotelo Interna Mongolio, kie ni tranoktis, ankaŭ estas nove konstruita. Ĝi aspektas modesta ekstere kaj luksa interne. Dum la kelktaga restado tie ni havis oportunan ripozon kaj kompletan servon.

La sekvantan matenon mi elirinte frue kaj promenis al la urba centro. Tie okulfrapas la Muzeo de Interna Mongolio,

sur kies tegmento staras skulptita ĉevalo kun alte levitaj kapo kaj piedoj. Laŭdire, ĝi manifestas la karakteron de la vasta stepo kaj simbolas la pli kaj pli boniĝantan vivon de la diversnaciecaj popoloj kaj rapide progresantan produktadon de la Interna Mongolio. Tial ĝi jam fariĝis emblemo de la urbo. En la parketo kontraŭ la muzeo trans la strato oni faris korpajn ekzercojn: iuj kuris, aliaj faris gimnastikon Tajĝiĉjŭan aŭ ludis per rapiro. Ili ĉiuj elspiris energion kaj vigecon. Tie staras statuo de knabino el blanka marmoro. Ŝi en mongola kostumo dancas la gajan Dancon kun Taso. La statuo donas plian nacimalplimultan etoson kaj sentigas al la promenantoj kvietan kaj feliĉan vivon.


La stratoj estas ŝirmitaj per salikoj, poploj kaj ĉiamverdaj pinoj. En la pasinteco pro la ekscesa ekspluato de la arbara riĉfonto malaperis ĉi tie la vegetaĵaro, tiel ke ĉiam ŝvebis densaj polvoj en serena tago kaj estis ŝlima vojo en pluvado. Sed de

la lastaj 40 jaroj la tieaj loĝantoj faris grandskalan forstumadon, kaj tiel aperis proksimume cent arbarizitaj stratoj kaj kontraŭventa zono de ĉinaj pinoj (*Pinus tabulaeformis*) kun longeco de 8 km. kaj larĝeco de 220 m. en la norda antaŭurbo. Nun Huhhot fariĝis vere verda urbo.

Oni sciigis min, ke en la unuaj jaroj post la fondiĝo de la aŭtonoma regiono, Huhhot estis nur malgranda konsumata urbeto. Tie troviĝis nur butikoj de faruno, arĝentaĵoj, lignaĵoj kaj vestoj. La urbo preskaŭ ne havis industrion siatempe. La ĉiutage uzataj produktaĵoj ĉiuj estis liveritaj de aliaj lokoj de la lando. Nun la urbo jam havas pli ol 700 industriajn entreprenojn kaj minejojn, kiaj la fabrikoj de elektronikaĵoj, maŝinoj, elektraĵoj kaj ekipaĵoj kaj manĝaĵoj, entreprenoj de konstruado, presado kaj malpeza industrio. Inter ili la plej evoluintaj estas la lanŝpina, leda kaj lakta industrioj strikte ligitaj kun brutobredado. Oni devas aparte mencii, ke la urbo jam fariĝis

*La Muzeo de Interna Mongolio*





*La tombo de Üang Ĝaŭĝjun*

bazo de lanŝpina industrio de Ĉinio. Ĉi tie oni produktas kelkdek specojn da lanaj produktaĵoj, kiaj lanaj meĉoj, lanfadenoj, drapoj kaj lanaj litkovriloj. Tiuj produktaĵoj havas grandan debiton en- kaj eksterlande.

Mi vizitis la Kvaran Lanŝpinejon de la Interna Mongolio kun jara produktokvanto de 250 000 lanaj litkovriloj kiuj vendiĝas ne nur en nia lando sed ankaŭ en Sovetunio, Rumanio kaj Afriko. Tie funkcias vesto-farejo kun progresintaj ekipaĵoj aĉetitaj de eksterlande per kompensa komerco. Ĝi produktas eŭropstilajn vestojn, kiuj havis grandan debiton en Pekino. Dum mia restado en Huhhot mi speciale vizitis la fabrikon de nacimalplimultstilaj objektoj. La fabriko produktas aparte viv-bezonaĵojn por paŝtistoj, kiaj mongol-stilaj spadoj, rajdbotoj, seloj, laktujoj, kupraj kruĉoj kaj felto por mongola jurto. Mi aĉetis delikatan mongolan glaveton kun lignaj tenilo kaj ingo tegitaj per metala lameno kun gravuritaj naciecaj bildoj. Ĝi estas tre bona memoraĵo.

Kompreneble, Huhhot estas evoluanta urbo. Kompare kun aliaj evoluintaj urboj de Ĉinio ĝi estas postiĝinta. Kunlabore

kun evoluintaj urboj kaj provincoj en ekonomio kaj teknikoj ĝi jam akiris rimarkindajn sukcesojn en la lastaj jaroj. Antaŭe oni diris, ke la ĉi-tiea produktita sojo ne estis sala kaj vinagro ne acida. En la fino de 1981 inter Huhhot kaj Tjanĝin starigis ekonomia kaj teknika kunlaboro. Tjanĝin sendis al la urbo siajn specialistojn pri sojofarado. Kaj post nur 40 tagoj ili jam ŝanĝis la teknologion de la sojofarado kaj altiĝis la kvaliton kaj produktokvanton de sojo. Huhhot kaj Uŝji fariĝis fratinaj urboj kaj faras grandampleksan kunlaboron en multaj fakoj, kiaj malpeza, tekstila, kemia kaj elektronika industrioj, maŝinfabrikado kaj konstruado. La kunlaboro ampleksas materialan kaj teknikan kunlaboron, enkondukon de kapitalo, komercajn eksponadon kaj vendadon, transplantadon de scienc-teknika esplor-rezulto, teknikan konsultadon kaj trejnadon de fakaj laborantoj. Huhhot enkondukis de eksterlande progresajn teknikojn, ekipaĵojn kaj kapitalon. Kvankam la kunlaboro komenciĝis antaŭ nelonge, tamen kun efektivigo de la pordmalferma politiko al eksterlando kaj ekonomia vigligo enlande, la industrioj de la urbo certe grandpaŝe evoluos.

Huhhot, la antikva kaj bela urbo, brilas perle sur la granda stepo de la Interna Mongolio. Ĉi tie troviĝas multaj pitoreskaj vidindejoj kaj historiaj objektoj kun fortaj stepa kaj nacieca gustoj. Kaj pro tio ĝi certe fariĝos alloga turisma itinero. Naŭ km. for de Huhhot estas la tombo de Üang Ĝaŭĝjun, princino de Han-dinastio. En 33 a.K. ŝi memvole edziniĝis al Huhanja, la ĉefo de la hunoj, kio akcelis la amikan rilaton inter Han-dinastio kaj la hunoj. Tial ŝi ĉiam estas respektata de la popolo. La tombo estas 30 m. alta, kun kiosko sur la supro. La vizitantoj povas ascendi laŭ la ŝtona ŝtuparo por havi panoraman vidon de la urbo.

Mi vizitis ankaŭ iujn famajn vidindejojn en la urbo. Unu el ili estas Sarira Pagodo sur Vajra Soklo konstruita en 1727. Pro tio ke sur la soklo staras kvin pagodetoj, oni kutime nomas ĝin Pagodokvino. En la sudorienta antaŭurbo okulfrape staras antikva pagodo 40 m. alta de Ljaŭ-dinastio (907 — 1125 p.K.). La okangula pagodo havas sep etaĝojn, kun bareliefoj vivecaj sur la muroj de la unua kaj dua etaĝoj. Ĝi estas tute blanka, tial oni nomas ĝin Blanka Pagodo. Tie min forte impresis ankaŭ la impona kaj racie dispoziciata lamaisma templo Ŝilituĝaŭ kaj original-stila antikva islama moskeo.

En la lasta tago de mia restado mi vizitis la antikvan templon Ĝaumjaŭ, 90 km. norde de la urbo. Ĉirkaŭ la templo punktiĝas 20 mongolaj jurtoj. Nun tiu loko jam fariĝis turisma punkto kun naciecaj trajtoj. Tie oni povas rajdi surĉevale aŭ surkamele, veturi per ĉaro kun lignaj radoj kaj laŭvole ĝui la stepan belecon. □






*La nova Geknaba Domo*

Foto de LIŬ ĈEN



*En fabriko de elektronaj aparatoj*

Foto de DENG JONGĈING




Prilaborado de mongolaj botoj Foto de **DENG JONGĈING**



Huhhot Foto de **LIŪ ĈEN**







*jurtoj por turistoj* Foto de LIŬ ĈEN




*Pagodokvino* Foto de LI ĈJANG

*En infanĝardeno* Foto de DENG JONGĈING





# Ĉinstila Pentraĵo de Li Keĵan



*Suda Ĉinio en Printempa Pluvo*



*Li Kejan en pentrado*

ŬEJ LJAŬ:

## Li Kejan, majstro de la ĉinstila pentroarto

En 1954, okazis ekspozicio de ĉinstilaj pejzaĝo-skizoj de tri ĉinaj pentristoj en Jueŝin-halo de la parko Bejhaj de Pekino. Tiu ekspozicio estis rigardata de la posteuloj kiel mejloŝtono en la disvolviĝo de la ĉinstila pejzaĝa pentroarto. En ĝi eksponiĝis la unuaj pejzaĝaj pentraĵoj freŝaj kaj versimilaj, faritaj de la tri pentristoj, kiuj, kunportante siajn penikojn, tuĉon, paperon kaj aliajn necesajojn, iris en la naturon kaj faris skizojn, rompinte la rutinajn kaj degenerantajn formulojn de la tekniko. La ekspozicio havis gravan influon sur la disvolviĝon de la ĉinstila pentroarto en la pasintaj pli ol 30 jaroj.

El la tri pentristoj unu estis Li Kejan. Forpasis pli ol 30 jaroj, de kiam Li Kejan komencis novan pentrostilon. Nun li estas pli-ol-80-jara kaj fame konata tra la lando. Li estas unu el la plej eminentaj pentristoj en la nuna Ĉinio kun sia propra stilo. La montoj, groteskaj rokoj, ĉarmaj nubaroj kaj belaj akvofaloj el lia peniko impresis majeste kaj profunde, konkeris

la koron de sennombraj aprecantoj kaj rikoltis ilian admiron. Liaj pentraĵoj ĝuas pli kaj pli grandan reputacion en la mondo. En 1983, kiam okazis ekspozicio de liaj pentraĵoj en Japanio por rememorigi pri la 5-jara datreveno de la subskribo de la Paca kaj Amika Traktato inter Ĉinio kaj Japanio, japana ĵurnalo raportis: "La aprecantoj estis ravitaj de la poeziaj ĉinstilaj pentraĵoj." Oktobre de 1986, laŭ la arta sukceso de Li Kejan, la Ŝtata Arta Akademio de la Germana Demokratia Respubliko donis al li la titolon de koresponda akademiano. Ankaŭ en la Germana Federacia Respubliko, Ĉeĥoslovakio kaj Francio li ĝuas tre grandan reputacion. Nemalmultaj belarto-amantoj de Azio, Eŭropo kaj Ameriko scias, ke en Ĉinio estas majstra pentristo Li Kejan. De tiam la pejzaĝa pentroarto de Ĉinio kun pli-ol-mil-jara solida tradicio eniris novan etapon.

### DISĈIPLIĜO EN LA MEZAĜO

Li Kejan en sia aĝo de 13 jaroj komencis lerni ĉinstilan pentra-

don, poste li lernis olepentradon kaj skizadon kelkajn jarojn en la Ŝanhaja Belarta Kolegio kaj la Ŝtata Ŝjihu-a Arta Instituto. 30-jara, li estis jam sufiĉe lerta en liberstila pentrado kaj pentris rapide. Estis anekdoto pri tiama Li Kejan: Lia amiko petis lin fari pentraĵon, unue li ne konsentis. Sed la amiko insistis en tio. Poste la amiko eliris pro afero por kelka tempo, kaj reveninte li trovis la petitan pentraĵon jam preta.

Dank' al siaj diligenta ekzerco kaj arta genio, Li Kejan en sia aĝo de 42 jaroj jam fariĝis profesoro de la Centra Belarta Instituto — la plej alta belarta instituto de Ĉinio. Tamen ĝuste en tiu jaro li faris mirigan agon, ke li kiel profesoro fariĝis disĉiplo de pentro-majstro Ĉji Bajŝi kaj lernis de li dek jarojn.

Kiam Ĉji Bajŝi estis en pentrado, Li Kejan staris apude kiel helpanto kaj atente rigardis lin en peniko-uzado kaj liniado. S-ro Ĉji pentris malrapide, li longe konsideris eĉ en kaligrafado. Foje, s-ro Ĉji estis kaligrafanta

titolon por iu gazeto. Unue li faldis malrapide la paperon kaj projektis la kaligrafadon, poste li komencis skribi kaj samtempe mezuris la aranĝon. Kiam oni pendigis la kaligrafiaĵon surmure, la ideografiaĵoj impresis kiel gravure faritaj kun fortaj strekoj. Ĝi multe ravis Li Keĵan. Farante komparon, li trovis siajn pentraĵojn tro malpezaj kaj senvivaj.

Li lernis de Ĉji dek jarojn. Kvankam li neniam faris pentraĵon de floroj, en kio Ĉji estis tre lerta, li tamen ellernis la pentran teknikon de Ĉji kaj lian seriozecon en pentrado. Poste li ofte sigelis siajn pentraĵojn per sigeliloj kun jenaj maksimumoj: "Venas facilo post mil malfaciloj",

"3 000 ekzercoj sur papero", "Grizhara lernanto", "Mi konis min senscia en la 70-jara aĝo". Sigelo estas grava konsistiga parto de la ĉinstilaj pentraĵoj, ĝi ofte spegulas la sintenon de la pentristoj pri la vivo kaj pentroarto. El la sigeloj de Li Keĵan oni povas facile vidi, ke la seriozeco de majstro Ĉji en pentrado profunde influis lin.

Post pli ol 30 jaroj, kiam Li Keĵan kaligrafis titolon por eldonota pentraĵo-kolekto de sia instruisto, same kiel Ĉji Bajŝi, li foruzis tutan antaŭtagmezon por kaligrafi kvin vortojn. Fine li elektis du kompare kontentigajn provaĵojn kaj donis ilin al la instruisto por lia elekto.

#### *Reveno de Paŝtado*



## **SPECIALA VIDPUNKTO DE LA ORIENTA ARTO**

En 1986, kiam okazis ekspozicio de pentraĵoj de Li Keĵan en la Ĉina Belarta Domo de Pekino, iu artisto el la Orienta Eŭropo prezentis jenan demandon post rigardo de la eksponaĵoj: "S-ro Li, per kiaj okuloj vi rigardas la mondon? Kial vi rigardas tiel profunden kaj malproksimen kaj trovis multajn objektojn neviditajn de la aliaj?" Li Keĵan ridetis: "Tio ne estas mia vidpunkto, sed speciala vidpunkto de la orienta arto." Li Keĵan opiniis, ke la ĉinstila pentroarto kiel la orienta arto ne katenas sin en la rutinoj, sorbas nutraĵon en la skizado, kolektas belajn montojn por la malnetoj, prezentas la aspektan similecon en strebado al spirita simileco, reaperigas la objektojn viditajn, konitajn aŭ pensitajn de la pentristoj, kaj per tio prezentas la "senliman vastecon sur la limigita spaco".

Li Keĵan prenas skizadon kiel kreadon, li ŝajne estas unu el la plej fruaj kaj plej kuraĝaj provantoj de la ĉinstila pentroarto preni la naturon kiel pentrejon. Same kiel olepentristo li vojaĝis al montoj kaj riveroj, kunportante pezajn bezonaĵojn por pentrado. En la 50-aj jaroj, li kvarfoje vojaĝis malproksimen, veturis supren laŭ Jangzi-rivero, trapasis ĝiajn Tri Gorĝojn, surgrimpis Emej-monton, vizitis Jandang-monton, Gujlin kaj aliajn pitoreskejojn, kie li kreis centojn da pentraĵoj. Li ne estis tre forta, la longa vojaĝo fariĝis pli peniga por li en la maljuna aĝo. En la aĝo de 72 jaroj li planis vojaĝi al la montoj Hŭangŝan, Ĝiŭhŭa, Tajŝan kaj la Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero. Atinginte Hŭangŝan-monton, li refoje



suferis de kormalsano, nur tiam li devigite forlasis la planon.

Vojaĝo al la famaj montoj kaj riveroj multe larĝigis lian vidkampon. La majestaj kaj imponaj montoj kaj riveroj kaj ĉarmaj pejzaĝoj de la patrolando prezentigis sur papero impresive kaj rave.

En liaj fruperiodaj liberstilaj pentraĵoj oni povas vidi, ke Li Keĵan estas libera kaj ravita de nehaltigebla sento en la pentrado. Li ofte aplikis malsamajn esprim-manierojn laŭ malsamaj objektoj kaj aspektoj kaj uzis koloron forte pezan aŭ tre malpezan por pene prezenti la klarajn trajton kaj karakteron de ĉiu pentraĵo. En sia pentraĵo "Monturbo Ĉongĉing en Vespera Sunbrilo" li aplikis forte rektajn liniojn por prezenti la apudriverajn lignajn domojn kaj vertikalajn liniojn por prezenti la altajn mastojn, kaj harmonie reaperigis la veran trajton de la monturbo. Kaj en lia verko "La Umea Ĝardeno", escepte de unu kiosko, la tuta bildo estas plena de interkruciĝantaj branĉoj vidiĝitaj de senordaj linioj kaj pompaj floroj bildigitaj de dense ruĝaj punktoj, impresante la rigardantojn, ke ili vojeraros en la ĝardeno. La pentraĵoj de Li Keĵan estas fortinfektaj, ĉar li maksimume uzis la paperan spacon, kio kondukas la rigardon de la aprecio al la profundo de sia pentraĵo, ke la rigardo neniel povas forlasi ĝin nek vagi ĉe ĝia rando.

Post la 70-aj jaroj, Li Keĵan en senĉesa esplorado de la arta vero direktis sian atenton al la sintezado de figuroj kaj la ĝeneraligo de fenomenoj, celante strebi al la ĉarmo en la harmonia strukturo. Ekz., lia nova verko en la 80-aj jaroj "Mateno de la

Prospera Arbaro" ja estas tia pentraĵo.

## DEVENO DE LA "HALO DE BUBALO-INSTRUISTO"

Krom pejzaĝoj, eble Li Keĵan plej ŝatas pentri bubalon.

En la 40-aj jaroj li komencis pentri bubalon. Tiam li loĝis en la ĉirkaŭurbo de Ĉongĉing, lia loĝdomo najbaris al bubalstalo, sekve li ĉiutage vidis bubalon. Tiel, li prenis bubalon kiel modelon kaj komencis pentri ĝin. De tiam li nomis sian pentrejon "Halo de Bubalo-instruisto".

Li skribis jenajn vortojn pri sia pentrado de bubalo: "Bubalo havas grandegan forton, sed volentas obei al knaboj. Dumvive ĝi laboras surkampe, sed neniam paradas per siaj meritoj. Ĝi estas milda, antaŭen paŝas stabile, sen stumblo. . . Mi ĉiam admiras ĝian karakteron kaj amas ĝian formon, tial mi pentras ĝin senenue."

La vortoj estas laŭdo pri la bubalo kaj ankaŭ admono por li mem. Ĝuste pro tio vidiĝas lia honesta sento en liaj ĉinstilaj pentraĵoj pri bubaloj. Oni rigardas lian pentraĵon "Bildo pri Kvarsezona Paŝtado de Bubaloj", kvazaŭ legante lirikon aŭ aŭskultante malpezan muzikaĵon. Ĝi elspiras agrablan odoron de la ĉinaj kampoj. Kiam oni vidas la naivan paŝtisteton kun nudaj piedoj sidanta sur arbobranĉo kaj ludanta fluton aŭ sin distranta surtere per batalantaj griloj aŭ pluvon da ruĝaj folioj faligitaj de aŭtuna vento, dum la lojala bubalo obeeme akompanas sian etan mastron. . . oni sentas en la koro longan neskribeblan sopiron al la kampara vivo.

En la tekniko Li Keĵan tre emfazas forman komparon, uzante

seketan tuĉon por pentri la nigran bubalon kaj linion por skizi la paŝtisteton. La petola paŝtisteto ventrokuŝas sur la larĝa bubal-dorso, la grandspaca nigro reliefigis la etspacan blankon. La vivetoso de la lanta bubalo kaj la vigla infano reaperigis la nigro kaj blanko, la spacoj kaj linioj, la granda kaj malgranda, la krudeco kaj delikateco per poeziaj komparoj.

## "GRIZHARA LERNANTO"

En esplorado de la nacia tradicio, Li Keĵan uzis dek jarojn por lerni de Ĉji Bajŝi kaj Hŭang Binhong la teknikojn de la ĉinstila pentroarto. Li lernis la ĉinstilan pentroarton kaj esploris ankaŭ la okcidentan. Li opinias, ke skizo estas scienco kaj povas altigi plastikan kapablon. Li neniam neis la fremdajn utilajn objektojn, sed li pli emfazas la fundamentajn leĝojn de la ĉinstila pentroarto. En sia maljuneco li ankoraŭ sin ekzercas senlace en la fundamentaj teknikoj. Tio ĉiam pli progresigas lian pentradon. Liaj sigeliloj kun la vortoj "3 000 ekzercoj sur papero", "Venas facile post mil malfaciloj", "Grizhara lernanto" plene spegulis la de li iritan malfacilan vojon.

Lastjare Li Keĵan publikigis en la Popola Ĵurnalo, la plej granda ĵurnalo de Ĉinio, artikolon "Miaj Vortoj", en kiu legiĝas jenaj interesaj vortoj pri lia diligenta: "Mi nun estas okdekjara, sed mi neniam kontentas pri miaj verkoj. Mi ofte pensas: Se mi vivos 100 jarojn, eble mi pentros bone. Sed mi tuj havas alian ideon post plua pripensado, ke eĉ en la aĝo de 200 jaroj mi ne povos atingi tion, tamen nur iom pli bone ol nun. Nur la inteligenteco estas senlima, la evoluo de afero estas senfina, ne ekzistas absolute perfekta belo." □

### CHUN-CHAN YEH KAJ LI ŜIGJUN AKCEPTITAJ KIEL MEMBROJ DE EVA

Chun-Chan Yeh (Cicio Mar), fama ĉina verkisto, kaj Li Ŝigjun (Laŭlum), membro de la Akademio de Esperanto, estis akceptitaj kiel membroj de la Esperantlingva Verkista Asocio (EVA).

EVA havas 80 membrojn el 28 landoj. Ĝia prezidanto estas Tibor Sekelj.

### NOVAJ ESP-LIBROJ ELDONITAJ EN ĈINIO

Lastatempe aperis en Ĉinio novaj Esperanto-libroj.

La eldonejo "Scioj", Pekino, eldonis "Esperanta-Ĉinan Vortaron" kompilitan de la Pekina Esperanto-Asocio. La 1071-paĝa vortaro estas kompare kompleta, kun pli ol 18 mil radikoj. La eldonejo "Scioj" publikigis ankaŭ "Esperantaj Legajojn Elektitajn" en 3 kajeroj kompilitajn de Baj

Song, kun pli ol 150 verkoj el diversaj landoj. La Pekina Eldonejo de Fremdlingvaj Instruado kaj Studo eldonis "Novan Esperanto-Lernolibron" kompilitan de Li Ŝigjun, Jin Gŭoji kaj Gu Ĝjanhŭa. La lernolibro taŭgas por nedeviga kurso de Esperanto en altlernejoj. La Ĉongĉing-a Filio de la Eldonejo de Scienc-teknika Literaturo publikigis la libron "Esperantaj Prepozicioj" kompilitan de Ĝoŭ Gŭangĝi, la unuan tiaspecan libron post la fondiĝo de la nova Ĉinio. La Anhuj-a Eduka Eldonejo eldonis "Ĉina-Esperantan Vortaron" kompilitan de Ju Gŭoĝjan, kun pli ol 40 mil artikoloj. La Gŭangŝji-a Esperanto-Instituto kaj la Esperanta Instituto por Gŭangŝji-a Trafiko eldonis "Esperantan Manlibron pri Ofte Uzataj Vortoj" kompilitan de Lan Tjanĉjang. La Gŭangŝji-a Botanika Instituto, la Gŭangŝji-a Instituto pri Scienc-teknikaj Informoj kaj la Gujlin-a Esperanto-Asocio eldonis la libron

"Ornamfloraj Vegetaĵoj" latina-angla-Esperanta-ĉinan kompilitan de Zeng Dingĝi. La Ĉina Ĝanŭang-a Eldonejo publikigis la libron "Ĉinio Marŝas al la Insekta Mondo", kompilitan de profesoro Io Chou, traktantan pri sukcesoj de ĉinoj en esplorado de insektoj.

### ĈINIO TELESENDIS FILMON PRI ESPERANTO

La 7-an de januaro 1987 la Centra Televido de Ĉinio telesendis en la programero "Kultura Vivo" la filmon "Verdstela Esperantujo" faritan de la Pekina Televido. La filmo daŭris 31 minutojn. Antaŭe la Pekina Televido ĝin jam tele-

### ĜJAMUSI FESTIS LA 40-AN DATREVENON DE LA FORPASO DE VERDA MAJO

La 10-an de januaro 1987 la Ĝjamusi-a Esperanto-Asocio okazigis prelegon por festi la 40-an datrevenon de la forpaso de Verda Majo, fama internaciisma batalantino kaj Esperanta verkistino. 100 personoj aŭskultis la prelegon kun la titolo "La spirito de Verda Majo kuraĝigas nin por progresigi la Esperanto-movadon". Antaŭ 40 jaroj Verda Majo forpasis en Ĝjamusi, en kies Martira Tombejo oni konstruis monumenton al ŝi.

### NOVA INSEKTOSPECO "GERGITHUS ESPERANTO"

Famaj ĉinaj entomologoj profesoroj Io Chou kaj Lu Ĝinŝeng malkovris antaŭ nelonge novan specon de insekto, sur kies brusto estas verda makulo en formo de pentagono. Ili nomas ĝin "Gergithus Esperanto". Ili dediĉis multajn jarojn al insekta esplorado kaj Esperanto-movado. Lastatempe ili skribis en Esperanto kaj en la ĉina lingvo la nomon de la Insekta Muzeo konstruita de la Nordokcidenta Agronomia Universitato kaj stari-

*Membroj de la Hengjang-a Esperanto-Ligo balotas por sia unua konsilio.*



## 100 JAROJ DE ESPERANTO

72.<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto

VARSOVIO 1987

DESEGNIS  
R. VILMOS

TERRASSA  
HISPANIO

ELDONIS  
J. CERVELLÓ



Renkontiĝo de esperantistoj de Neijiang, Siĉuan-provinco

Glumarkoj por la 100-jara jubileo de Esperanto

gis Esperantan oficejon en la muzeo.

### EL LA KONGRESAJ KOMUNIKOJ DE UEA

**Loka Kongresa Komitato:** La 22-an de novembro 1986 en Varsovio okazis kunsido de la nova konsilantaro de la Pola Esperanto-Asocio, kiu elektis la Estraron de tiu landa asocio. La prezidanto de PEA nun estas Roman Dobrzynski, dum kiel vicprezidantoj elektiĝis A. Pettyn kaj A. Golonka; la ĝenerala sekretario estas P. Janowczyk (Prezidanto de la Pola E-Junularo), kasisto iĝis Z. Banet-Foralowa. La Loka Kongresa Komitato restas sensanĝa, sub la gvido de S. Swistak.

**Aliĝoj svarmas:** Kvankam meze de januaro ankoraŭ alvenas aliĝiloj senditaj fine de decembro, eblas informi, ke al la Kongreso jam aliĝis pli ol 1 200 kongresanoj el la okcidentaj landoj kaj ĉ. 2 000 el la orienteŭropaj landoj. Kun pli ol 3 000 aliĝintoj, ses monatojn antaŭ la Kongreso, ĉio ĉi signifas, ke la 72-a UK fariĝos la plej granda manifestacio en nia historio.

**Scienca konferenco:** Apud la tradicia prelegserio en la kadro de la Internacia Kongresa Universitato, dum la 72-a UK okazos aparta scienca konferenco, kiun preparas la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj Akademia Centro Interlingvistika. La konferenco traktos la Centjaran Jubileon de Esperanto el kvar aspektoj: lingvistika, historia, sociologia kaj kultura. La kon-

ferencon prizorgas D. Blanke kaj R. Rokicki.

**La kongresa temo:** La Estraro de UEA elektis por la Kongreso la temon "Esperanto — cent jaroj de internacia kulturo". La kongresa programo tial havos, pli ol kutime, festivalan karakteron. La organizantoj atendas, ke ankaŭ la fakaj asocioj atentu pri la kongresa temo en la planado de siaj kunvenoj.

*Ekspozicio de ĉinaj E-materialoj okazigita de la Internacia Esperanto-Instituto*







*Esperanto-kurso el mezlernejoj en Nova Beogrado*

## INFORMOJ EL LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCIOJ

SUS 4 — la Kvara Sanmarina Universitata Sesio de la Akademio Internacia de la Sciencioj (AIS) komenciĝis dimanĉon vespere de la 29-a de marto 1987, per la solena inaŭguro en la Teatro San Titano San Marino kaj daŭris ĝis la 5-a de aprilo.

SUS 5 — la Kvina Sanmarina Universitata Sesio de la Akademio Internacia de la Sciencioj komenciĝos de la 30-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro 1987 en la sama loko.

Interkibernetik'87 — la dua tutmonda kibernetika kongreso de la Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS) okazos de la 15-a ĝis

la 19-a de septembro 1987 en Tarragona Hispanio.

## POST LA 71-A UK

Mezlernejoj kaj lernantoj de pli alta turisma lernejo en Nova Beogrado komencis Esperanto-kurson post la prelego kaj montrado de lumbildoj pri UK en Pekino fare de instruistino Terezija Kapista, kiu ankaŭ instruas la kurson senprofite. Inter la gekursanoj estas studentoj el Afriko kaj Pekino, kio signifas ke la kurso estas vere "Internacia".

La Internacia Esperanto-Instituto post sia reveno el la 71-a UK en Pekino utiligis ĉinajn E-materialojn por nederlanda publiko en du ekspozicio-fenestroj flanke de la strato. La ekspozicion preparis kaj fotis Mariet Erasmus kunlabore kun Mila v.d. Horst-Kolinska el Hago, Nederlando. □

## Ĉemizo kun kovrilbildo de EPĈ



Dum longaj jaroj ni ĝuas subtenon kaj kunlaboron flanke de multaj el niaj legantoj kaj amikoj, inter kiuj sin trovas ankaŭ niaj diverslandaj perantoj, kaj s-ano George Otto Vaske estas unu el ili.

Kiel entuziasma esperantisto s-ano Vaske ĉiam multon faras por la disvastigo de la Internacia Lingvo. Interesiĝante pri El Popola Ĉinio kiel elstara E-revuo li mem iniciate proponis sin por plenumi perantecon por ni antaŭ jaroj. Dank'

al lia diligenta klopodo EPĈ pli vaste diskonatiĝis inter la brazilaj esperantistoj, kaj rezulte de tio multaj el ili jam fariĝas abonantoj de nia revuo.

Estas nia ĝojo konstati aldone, ke la filo de s-ano Vaske, kiu ŝatas Esperanton, ankaŭ propagandas EPĈ. Tiu-cele li pretigis ĉemizon, sur kiu estas reproduktita unu el la kovrilbildoj de EPĈ. Sendube niaj legantoj multe interesiĝos pri la foto ĉi-kune aperigita. □

# PRI LA ROMANO “MONTARA VILAĜO”

de RIKARDO SULCO (FR Germanio)

**Chun-Chan Yeh: MONTARA VILAĜO.** El la angla lingvo tradukis Vilhelmo Oldo (William Auld). Serio Oriento-Okcidento n-ro 21 sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio en konsultaj rilatoj kun Unesko. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1984; 264 p., bindita, kun ilustrita kovrilo, 15 × 21,5 cm.

La romano estas mirinda majstroverko. Ĉiu homo ja estas la centro de sia vivo. Ĉiu vilaĝo ja estas centro de sia ekzistado. Ĉirkaŭ la montara vilaĝo etendiĝas la vasta Ĉinujo kaj la resto de la mondo. Legante la titolon, ni eble imagas la montaran vilaĝon kvazaŭ de malproksime kiel apud aŭ sur monto kuŝantan. Sed ekleginte la romanon, ni subiras, tion preskaŭ ne rimarkante, transformiĝon. Ni baldaŭ komencos vidi la pejzaĝon kiel nin ĉirkaŭantan. Ni mem komencas vivi en la vilaĝo. De ĝi ni rigardas al la montoj, al la rivero, en la direkto al la proksima urbeto, kies nomon ni ne scias, kaj en la direkto al la malpli proksima urbego, kies nomo ankaŭ ne estas sciigata. Unue ni pensas, ke la rakontanto estas la romanverkisto mem, la ĉion superrigardanta sinjoro Chun-Chan Yeh. Sed jam sur la dua paĝo ni rimarkas, ke tiu estas iu persono el la vilaĝo. Nur per li ni konatiĝas kun la aliaj vilaĝanoj. Jen estas “onklo” Pan, iam alveninta fuĝinto akceptita en la familio. Jen estas la kamplaboristo Maŭmaŭ, kiu propran grundon ne posedas, amindumante Korvinon, la filinon de vinfaristo el najbara

vilaĝo. Jen estas la senteraj taoisma pastro Benĉin kaj profesia fabelisto Laŭ Liŭ, kaj jen la servistino Alan. La patrino estas prezentata kaj iu “onjo” Krizantemo, kiu loĝas izole en alia domo. Krome ekzistas terkulturistoj, flosistoj, kulioj. Ĉio tio kunfandiĝas en idilian bildon de la malnova feŭda Ĉinujo. La enloĝantoj de la dudek dometoj havas siajn tradiciajn ideojn. Ili kredas al la Terodio. Ili havas siajn superstiĉojn. Ne mankas en la domoj la sanktejo, kie ili adoras la praulojn. Tia estas ilia mondo. Tia ĝi ŝajnas ĉiam esti estinta. Tia ĝi ĉiam estos. La vivo ne estas facila. La gajno tamen sufiĉas eĉ por tio, ke ili povas permesi al si subteni vilaĝan rakontiston por ilia mensa distro. Li povas konsole revigi al ili pri pli nobla, heroo mondo.

Nenio grandskale eksterordinara okazas. La bela servistino Alan malsaniĝas je variolo kaj perdas sian belecon. Ekzistas rivalecoj pri profesiaj kaj amaferaj ambicioj. Iom post iom la rakontisto reliefiĝas. Li estas ankoraŭ duone knaba junulo, kaj ĝis la fino de la romano estas ĉiam li, per kiu ni sciigatas pri la cirkonstancoj kaj la okazaĵoj. Malantaŭ li, kompreneble, staras la romanisto, kies arto donas al la plej banalaj detaloj signifon, gravecon kaj ofte ĉarmon.

Nia rakontanta junulo akompanas onjon Krizantemo al la urbeto, kie ŝi intencas vendi memŝpinitajn fadenojn. “Nenio



speciale nova en la vilaĝo,” ŝi diras al la komercisto, sed ŝi mem nun devas aŭdi ŝokantajn novaĵojn pri enlandaj militoj, pri ŝpinmaŝinoj, pri malaltiĝintaj prezoj por permane ŝpinitaj fadenoj, pri plialtiĝintaj prezoj por kutime bezonataj varoj. Malbonaj estas la perspektivoj por la estonteco. La vilaĝo ne estas memsufiĉa angulo for de la mondo. Ĝi interrilatas kun ties malfacilaĵoj, interrilatas kun la tutmonda ekonomio.

La enlanda milito proksimiĝas. Trupo de venkitaj soldatoj preterpasis la vilaĝon. Ili marŝas al la proksima urbeto, kie oni provas akcepti ilin kiel honorindajn gastojn, mildigi ilian rabeman spiriton. Sed vane, ili marodas, kiom ili povas. Ĉiam pli imageblaj, pli intimaj, pli vivaj fariĝas la personoj kaj eĉ la bestoj, la bovino de onklo Pan kaj ĝia ido kaj Lajbaŭ, la gardhundo. La soldatoj

ree foriris. Sed ilia apero estis grava simptomo de la ĉiam pli peze premanta milita situacio. La vivocirkonstancoj ĉiam pli malfaciligas. En tiu proceso la bienegulo Ĉu Min, reprezentanto de la mortanta feŭdisma socio, ludas gravan rolon. Neniam li aperas, sed tamen lia ekzistado estas ĉiam sentebla, kvazaŭ li mem estus prezenta. Nur flustre la vilaĝanoj riskas paroli pri li kaj evitas ofendi eĉ la malĉeestanton. Profitante de la ĝenerala mizero li akaparas la terenojn de la kampuloj. Ĉe li ili nun devas lui tion, kio antaŭe estis ilia propraĵo. Kvankam ŝajne multe ne okazas, ĉio radikale ŝanĝiĝas. La artisme verkita romano estas absolute vaka de tedaj tekstopartoj. Epizodo sekvas epizodon. Ankaŭ ne mankas la humuro. Al ĝi apartenas ekzemple la malbonŝanca situacio de Maŭmaŭ, kiu ne scias, kiel li satigu sian amatan kaj manĝavidan edzinon. Aparte kortuŝaj estas la amo de onklo Pan al lia bovino, kaj la priskribo, kiel la fidela besto nasakas idon.

La revolucio ne povas veni. La formortanta feŭdismo serĉas apogon ĉe la internacia imperiismo. Bienuloj kaj komercistoj eksplua-

tas kune la ĉiam pli malriĉigantajn kampulojn. Tiuj ne komprenas la fatalajn historiajn interrilatojn kaj provas mildigi per oferoj la kolerantajn diojn. Sed ilia malriĉeco ne permesas malavarajn oferdonacojn. La mizero fariĝas neelirebla. La dioj daŭre koleras. Aldoniĝas eksterordinara sekeco. La malbona rikolto akcelas la katastrofon.

En iu nokto alvenas fuĝanta studento, persekutata de la ĝendarmaro de la Gubernia Registaro pro politikaj aktivecoj, kaj kun li alvenas proletaj teorioj. Kaj nun komenciĝas ĉe la vilaĝanaro malrapida, komence tre konfuza konsciiĝo pri ilia socia situacio. Malmodernaj kaj modernaj konceptoj groteske intermiksiĝas.

Rapidigite la okazaĵoj intersekvas. Halto estas ne plu ebla. Ĉiam pli da fuĝintoj pretermigras la vilaĝon, inter ili estas multaj, kiuj fariĝis ŝtelistoj kaj rabistoj. Ĉu Min, la bienegulo, starigas la Ordokonservan Korpuson. Sed ankaŭ la revoluciuloj ne dormas. Pafado aŭdiĝas kaj ree formortas. La batalanta linio preterpasas la vilaĝon. Aktivitas la Kamparana Volontula Brigado. La urbeto estas okupata de ĝi. La bienegulon anstataŭas la Politika Direktanto. La Revolucia

Registaro komencas organizi la regionon. En la urbeto nun ekzistas loka filio de la Revolucia Partio. En la gubernia urbo estas starigata la Popola Kortumo. Novaj devigoj atendas la vilaĝanojn. Laŭ Liŭ, ekzemple, la fabelorakontisto, estas enoficigita kiel Vickomisaro de Propagando.

Sed ĉio ree frakasiĝas. La reakcia movado de la bienuloj, subtenata de fremdaj potencoj, subpremas la revolucion. La patrino, kiu ne volas, ke oni konskripciu ŝian filon, kiu ne plu estas knabeto, decidiĝas forlasi kun li la vilaĝon. Sub la malproksima grumblo de obusoj, ili ekiras, sekvataj de la fidela gardohundo, kiu ne scias, ke tio estos vojaĝo longa. Sur arbotrunko tamen adiaŭas ilin afiŝo de la revoluciuloj postlasita: "NI REVENOS!"

Legante ĉi tiun romanon, oni ne nur travivas la lokan historion de malgrava vilaĝo, sed la mondhistorian dolorigan transformadon de la vasta imperiestra kaj mandarena Ĉinujo en la modernan Popolan Respublikon. Tiun miraklon efektivigas la elvokopova arto de la romanverkisto, de vere profunde humaneca, neniel ideologia POETO. □

## Lucky-filmoj tre utilaj por vi!

La Unua Filma Fabriko sub la Kemi-industria Ministerio de Ĉinio estas la plej granda fabriko, kiu produktas plurspecajn filmojn kaj magnetajn materialojn. Ĝiaj produktaĵoj estas uzataj en kinematografio, televizio, kulturo, eduko, naciddefenda industrio, astronautika telegvido, medicino, presado, fotado k.a. Estas pli ol 70 specoj de produktaĵoj, el kiuj tri oni premiis per ŝtata arĝenta medalo, 12 oni titolis elstaraj produktaĵoj de Hebej-provinco aŭ la nomita ministerio kaj 12 oni vendas en 12 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo kaj Afriko.



化工部第一胶片厂 中国保定 电话: 37901 37902  
电报: 5231

Bonkvalitaj kaj bonvenaj estas la koloraj kaj pankromataj Lucky-filmoj de ĉiaj normoj.

**Unua Filma Fabriko sub la  
Kemi-industria Ministerio de Ĉinio  
Baŭding, Ĉinio  
Tel.: 37901 37902      Telekso: 5231**



## CINA OCEANA TRAFIKO EN RAPIDA DISVOLVIĜO

En la lastaj jaroj la oceana trafiko de Ĉinio rapide disvolviĝis kaj okupis la sepan lokon en la mondo. Nun la Ĉina Ĝenerala Kompanio de Oceana Trafiko posedas pli ol 600 oceanŝipojn kun ŝarĝkapablo de 13 milionoj da tunoj, kiuj veturas inter pli ol 600 havenoj de ĉ. 150 landoj kaj regionoj. La kompanio malfermis 37 internaciajn navigliniojn kaj funkciigas 89 kursojn kondukantajn al 48 havenoj de 29 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo, Afriko, Nord-Ameriko kaj Oceanio.

## GRUPO DA TERVARMAJ FORCEJOJ KONSTRUITA EN TIBETO

Kompleta grupo da tervarmaj forcejoj en Jangbaĝjan, Tibeto, la plej granda en Ĉinio, konstruiĝis lastatempe. Ĝi konsistas el 14 forcejoj kun ŝtalaj traboj kaj vitraj tegmentoj, en temperaturo de 29°C kaj kovras areon de 12 000 kvadrataj metroj. Tie povas kreski legomoj el aliaj lokoj de la lando.

## KRESKAS KOMERCO INTER LA INTERNA MONGOLIO KAJ SOVETUNIO

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio ĉe la norda landlimo de Ĉinio kaj la sovetunia regiono en la Malproksima Oriento plenumis komercan sumon de 108 milionoj da jŭanoj en 1986, 15-oble pli multe ol en 1983, la unua jaro post la restariĝo de la komerco inter la du regionoj. En la landlima komercado, 80% de la komercaĵoj importitaj de la aŭtonoma regiono estas cemento, ligno, ŝtalaj materialoj kaj kemisterko, kaj ĝiaj ĉefaj eksportaĵoj estas manĝaĵoj, ĉiutagaj necesajoj k.a.

## 176 ALILANDAJ FINANCAJ ESTABLOJ EN ĈINIO

Nun alilandaj financaj organizoj starigis 176 delegitajn establojn en Ĉinio, inter kiuj troviĝas 90 bankaj delegitejoj kaj 59 bankaj oficejoj, 8 delegitejoj kaj 3 oficejoj de valorpaperaj kompanioj kaj 16 kontaktejoj de asekuraj kompanioj. Ili apartenas al 109 financaj organizoj de 23 landoj kaj regionoj kaj sidas en 11 ĉinaj urboj kaj specialaj ekonomiaj distriktoj, kiaj Pekino, Tjanĝin, Ŝanhajo, Kantono, Daljan, Uhan, Senĝen kaj Ŝjamen.

## ELEKTROTERAPIA APARATO POR KORMALSANULOJ

Ĉina doktoro Ŭang Ĝizŭo inventis elektroterapian aparaton LN 79-1, kiu povas urĝe savi kormal-sanulojn de subita morto kaj miokardia infarkto, kaj pro tio li ricevis oran medalon en la 35-a Brusela Eureka Foiro de Mondaj Inventoj.

La aparato estas delikate projektita kaj facile uzebla. Oni enmetas

en la miokardion la aparaton kun konduktilo per pafilforma instrumento ekster la torako, la aparato povas helpi la koron de paciento ekbati en unu minuto.


## EZOFOGOKANCERIGA KAŬZO NOVE TROVITA

Lastatempe Ĝoŭ Ĝjan kaj Ĉen Ĉjŭanlu, doktoroj-esplorstudentoj de la Henan-a Medicina Universitato, unuafoje trovis homan papileman viruson en la histo de ezofaga kancero kaj konstatis, ke ĝi estas la ĉefa kaŭzo de tia kancero.

## PANDOJ TRANSLOĜIĜOS

Grandaj pandoj, konataj kiel "nacia trezoro" de Ĉinio, transloĝiĝos de Siĉŭan-kaj Ŝenŝji-provincoj orienten al la arbara regiono Ŝennongĝja. La regiono ĉe la limo inter la provincoj Siĉŭan, Ŝenŝji kaj Hubej, kun modera klimato, abunda pluvokvanto, bonaj akvo kaj grundo kaj multaj bambuoj, estas natura "grenejo" kaj ideala

### *Fiŝkaptaj oceanŝipoj*





*En bredejo de ĉinaj huzoj*

loko por grandaj pandoj vivi, generi kaj kreski.

### **HUZIDOJ REVENIS EN JANGZI-RIVERON**

La ĉina huzo estas akva animalo propra al Ĉinio kaj protektata de la ŝtato, kiel granda pando. Novembron ĉiujare ĉinaj huzoj revenas de maro al Jangzi-rivero kaj naĝas kontraŭflue al Ĝinŝa (supra parto de Jangzi-rivero), proksime al la urbo Jibin, Siĉŭan-provinco, kie ili demetas frajon. La hidroelektrejo Geĝoŭba konstruita en la lastaj jaroj en la meza parto de Jangzi-rivero malhelpas la huzojn demeti frajon en la supra parto de la rivero. Por savi la raran fiŝspecon, la Ĉina Instituto pri Arta Fekundigo de Huzoj kaj aliaj organizoj jam enmetis en Jangzi-riveron 466 000 huzidojn arte fekundigitajn, kaj la nombro jam superis tiun antaŭ la flubarado ĉe Geĝoŭba.

### **USONAJ PEKTENOJ EN ĈINHŬANGDAŬ-GOLFO**

La golfa pekteno, nova valora speco kun alta ekonomia efiko, estis sukcese provbredita antaŭ

nelonge en la urbo Ĉinhŭangdaŭ, norda Ĉinio. Ĝi estas mara kuriozaĵo kun alta proteino. Ĝi devenas el la maro ĉe Virginio, Usono, laŭborde de Atlantiko. Restas vivipovaj jam pli ol 95% de la 1 750 000 golfaj pektenoj importitaj en Ĉinhŭangdaŭ.

### **TANG-DINASTIA TOMBO PRIFOSITA EN ĈANGŜA**

Lastatempe arkeologoj de la urbo Ĉangŝa, Hunan-provinco, elterigis multajn valorajn historiajn restaĵojn el oro, arĝento, bronzo, jado kaj kristalo kaj, i.a., ceramikaĵojn en la konstruejo ĉe la piedo de Jŭelu-monto. La tombo estis farita el ligno, ŝtonoj, tegoloj kaj tero. La defluilo en la tombo estis science aranĝita. La ĉerko estis profunde sub la brika fundo de la tombo. Tia enterigo estas malofte videbla en Ĉinio.

### **FOSILIO DE KARNOVORA DINOSAŬRO MALKOVRITA EN SIĈŬAN**

Ĉinaj arkeologoj elfosis ĉ. 8-metran dinosaŭran fosilion en Ĝjanjang-gubernio, centra Siĉŭan-provinco. Fakuloj diris, ke tio estis karnovora dinosaŭro, kiu vivis antaŭ 140 milionoj da jaroj kaj havas grandan valoron por studi la antikvajn geologion, klimaton kaj animalan vivon en tiu regiono.

### **PLI OL 20 MILIONOJ DA TURISTOJ VIZITIS ĈINION EN 1986**

Laŭ statistiko de koncerna departemento, en 1986, 22.6 milionoj da alilandaj turistoj vizitis Ĉinion, 26.7% pli multe ol en 1985.

### **LA PLEJ GRANDA ĈINA ĈASEJO MALFERMITA**

Ĉinio malfermis al turistoj sian plej grandan ĉasejon Juĉjŭan en Harbin. Ĝi situas 80 km. oriente de Harbin, kun areo de 3 700 hektaroj. Tie turistoj povas ĉasi, skii kaj veturi per ĉeval-sledo, kaj ankaŭ ĝui pladojn preparitajn el ĉasaĵoj akiritaj de ili mem.

### **ĈINAJ AKROBATOJ GAJNIS MEDALOJN EN LA MONDA CIRKA FESTIVALO**

La programero "Ekvilibro sur Seĝa Piramido" prezentita de Ŝen Li kaj aliaj ses knabinoj de la Anhuj-a Akrobata Trupo de Ĉinio kaj la programero "Ludo de Porcelana Vazego" prezentita de Dong Ĵujbo kaj Ŝa Baŭljang de la Ĉina Akrobata Trupo de Pekino estis premiitaj per oraj medaloj en la Unua Monda Cirka Festivalo de "Estonto" okazinta en Parizo. La programero "Piedludo de Benkoj" prezentita de Deng Baŭĝin, Meng Jan kaj aliaj du akrobatoj de la Ĝjinan-a Akrobata Trupo kaj la programero "Bicikla Ludo sur Tablo" prezentita de Li Ĉing kaj aliaj du akrobatoj de la Anhuj-a Akrobata Trupo estis premiitaj respektive per ora kaj arĝenta medaloj en la Deko Monda Cirka Festivalo de "Morgaŭ" okazinta ankaŭ en Parizo.

*Ĉinaj akrobatoj ludas porcelanan vazegon.*



### **ĈINA PENTRAĴO AŬKCIITA EN NOV-JORKO**

Christie-aŭkcio en Nov-Jorko lastatempe aŭkciis ĉinan pentraĵon kontraŭ 363 000 usonaj dolaroj. Laŭdire, ĝi estis la plej altpreza el la ĉinaj pentraĵoj ĝis nun venditaj de la aŭkcio. La pentraĵo sub la titolo "Orkideo kaj Herboj" estis farita en 1304 de Ĝaŭ Mengfu, fama ĉina kaligrafo kaj pentristo en Ĵuan-dinastio. □

# LA ĈINSTILA PENTRAĴO

de JONG HUI

En la mondo estas multaj kategorioj de pentraĵoj, inter kiuj la ĉinstila pentraĵo estas la unika, kiu estas honorita per landonomo.

La ĉinstila pentrarto estas nacia pikturo kun sia originala sistemo en la monda belarta kampo. Por fari tian pentraĵon, oni uzas penikojn, tuĉon, ŝtonan tuĉplaton, paperon, silkaĵon, mineralajn, bestajn kaj vegetalajn farbojn proprajn al Ĉinio. Ĝiaj temoj estas vastaj, inkluzive de homfiguroj, montoj, akvoj, palacoj, domoj, floroj, birdoj, bestoj, fiŝoj kaj insektoj. Ĝi aplikas teknikojn de delikata liniado, liberstila tuĉado, nigra desegnado, senlinia kolorado, k.a., kaj esprimmanierojn de delikata figurado, liberstila retuŝo, punktado, kolorado drasta aŭ malpeza, seka aŭ satura, lumoplena kaj ombra kontrasto, ĝusta traktado de klareco kaj mal-klareco, denso kaj maldenso, lerta aranĝado de blanka spaco. La pentraĵo en komponado ne kateniĝas de fokusa perspektivo. Sur ĝia blanka spaco oni kutime faras kaligrafiaĵon aŭ versaĵon por esprimi la temon aŭ aludi pri io, kaj sub la kaligrafiaĵo aŭ versaĵo estas lia sigelo. Tiel la versaĵo, kaligrafiaĵo, pentraĵo kaj sigelo formas unu tuton. La formoj de la pentraĵo estas diversaj, ekz., freskoj, surekrana pentraĵo, rulpentraĵo, pentraĵo-volumo

kaj pentraĵo-foliaro, ventumila pentraĵo k. a. Por reliefigi artan efekton de la pentraĵo kaj faciligi aprezadon kaj konservadon, oni tapetas pentraĵon dorsflanke per papero kaj borderas ĝin per silkaĵo aŭ papero. La horizontala man-rulpentraĵo, kun kovrilo, antaŭa blanko, internaj apartigaj blankoj kaj malantaŭa blanko, estas provizita per du stangetoj ĉe la du ekstretoj. La pentraĵo-volumo kaj pentraĵo-foliaro borderitaj havas antaŭan kromfolion kaj lignajn kovrilojn.


La ĉina belarto havas historion de ĉ. 5 000 jaroj laŭ Hongŝan-kulturo elterigita ĉe Niŭheljang. Ĝi havas historion de almenaŭ 2 000 jaroj laŭ la silka pentraĵo trovita en la tombo de Ĉu-regno (475-221 a.K.).

La ĉinstila pentraĵo dividiĝas ĉefe en du kategoriojn, t.e., freskojn kaj pentraĵon paperan aŭ silkan. La freskoj plejparte estas verkitaj de popolaj artistoj, multe temante pri religia enhavo kaj esprimante ilian travivaĵon kaj vidpunkton pri la vivo. Kvankam tiuj pentraĵoj kun ampleksaj temoj, majstra lerteco kaj impona kompono devas esti rigardataj kiel majstraĵoj, tamen ne troviĝas la nomoj de la verkintoj en la historiaj libroj pro ilia malalta socia pozicio. Kaj eĉ iuj verkoj de multaj majstroj perdiĝis en milito. Paperaj kaj silkaj pentra-

ĵoj ne estas destinitaj por ornami templajn, kavernajn konstruaĵojn kiel freskoj. Kvankam iuj el ili estas faritaj sur ekranoj kaj ventumiloj, tamen ili fundamente aŭ tute estas apartaj verkoj. Escepte la freskojn, la ĉinaj antikvaj pentraĵoj estis faritaj sur silkaĵo. Post la invento de papero en Han-dinastio (206 a.K.—220 p.K.), oni komencis uzi ĝin por skribi unue kaj pentri poste. Oni vaste uzis paperon por pentri en Ĵuan-dinastio (1206-1368 p.K.). Dum la dinastioj Ming (1368-1644 p.K.) kaj Ĉing (1644-1911 p.K.) oni vaste uzis krudan Ŝĵuan-paperon, kiu povas facile sorbi farbon, por fari pentraĵon. La verkintoj de tiuj pentraĵoj plejparte estis urbaj kaj kamparaj erudiciuloj, bonzoj kaj eĉ kortegaj oficistoj. Ili kreis perfektan artaĵon, kombinante versaĵon, kaligrafiaĵon, pentraĵon kaj sigelon. Iliaj verkoj pri pikturo kaj ĝia historio estis multaj kaj faris kontribuon al la ĉina civilizacio, ĉerpinte la esencon de la ĉinstila pentrarto, ĉu en teorio ĉu en praktiko.

En la komenca periodo de la historio pri paperaj kaj silkaj pentraĵoj de Ĉinio ĉefe estis delikatliniaj pentraĵoj satire koloritaj. La sursilkaja delikatlinia pentraĵo kun palaj koloroj trovita en la tombo de Ĉu-regno, la delikatlinia pentraĵo satire kolorita "Fluganta Vesto" trovita en Han-dinastio ĉe Ma'uangduj kaj la





*Legado*

delikatliniaj pentraĵoj sature koloritaj de la belarta instituto de Song-dinastio (960-1279 p.K.), ĉiuj montris abundan ornaman efekton per siaj delikataj, fortaj kaj fluaj strekoj. Konturinte objekton per strekoj, la pentristo tuĉis kaj kolorigis ĝin por ricevi pli da ornamefekto. La pentraĵo kun delikataj strekoj fundamente estis “figura skizo de realaĵo”, kun iom da ornama gusto. Post la Kvin Dinastioj (907-960 p.K.) aperis pentristoj kun nova ideo en kreado. Nekontentaj pri delikata imitado, ili esprimis sian humoron per siaj peniktuŝoj kaj tuĉo. La pentrita bildo ne plu estis “figura skizo de realaĵo”, sed libervola “imago”. Kvankam la figuroj transformiĝis klare, tamen ili povis pli bone prezenti la esencon kaj spiriton. Tiu “simileco de nesimileco” estis tamen pli versimila. Tio ja estas liberstila pentrarto, kaj ankaŭ nomata pentraĵo de erudiciuloj aŭ tiu de Ĉan-sekto. La liberstila pentraĵo de Ĉinio jam havas his-

torion de ĉ. 800 jaroj. Ĝi aplikas la plej rafinitajn, sed troigajn penik-tuŝojn kaj tuĉadon por prezenti la objektojn pli perfektaj kaj pli versimilaj. Ĝi postulas, ke oni bonè konsideru la “temon” antaŭ sia pentrado, kreu la spiriton per figuroj. Ĉar la kaligrafio kaj pentrarto de Ĉinio devenas de la sama fonto, ambaŭ intime rilatas kun strekoj en esprimo de la temo kaj sento. La plejparto de la han-lingvaj skribsignoj de Ĉinio estas ideografiaĵoj kaj konsistas el strekoj. Tial la pentristoj plejparte havas altan nivelon de kaligrafio. Tio, ke ambaŭ “skribas kaj pentras” per belaj strekoj, kreas “imagan belecon” propran al Ĉinio. Dank’ al tio, la grandaj impresionismaj pentraĵoj aperis plej frue en Ĉinio.

Post Song-dinastio samtempe furoris la delikatlinia kaj liberstila pentrarto, dum la dinastioj Ming kaj Ĉing la liberstila pentrarto jam okupis la ĉefan pozi-

cion. En la moderna epoko, kun enkonduko de la okcidenta kulturo en la ĉinan pentrarton, en la 20-aj jaroj de la kuranta jarcento nemalmultaj famaj ĉinaj pentristoj prezentis novajn opiniojn “kombini la ĉinan pentrarton kun la okcidenta”. Iuj persistas en kreado de la nova surbaze de la tradicia pentrarto, pene evitante la rutinojn, aliaj ĉerpis iujn esprimmanierojn de la japana pentrarto, knedis ilin en la ĉinstilan pentrarton. Heredante la tradician pentrarton kaj disvolvante la modernan, ili senĝene esprimas la spiritan fizionomion de la popolo kaj vastan socian vivon. En la lastaj jaroj la ĉinstila pentrarto havis novan progreson, ĉu enhave ĉu teknike. “Komparante la ĉinajn kun la okcidentajn”, laŭ la modernaj vidpunktoj, la pentristoj disvolvis la ĉinan estetikon kaj ĝiajn atingojn en arta praktiko por krei brilan mondan arton kune kun okcidentaj pentristoj. □



*Imperiestro en palankeno*

de **JAN LIBEN** (Tang-dinastio)

## Ĉinstilaj Pentraĵoj (I)

### Delikatliniaj Pentraĵoj

La koloran bildoserion por la artikolo "Ĉinstila Pentraĵo" ni aperigos en du numeroj: la parton pri delikatliniaj pentraĵoj en ĉi numero kaj tiun pri liberstilaj en la sekvanta.

*Persikarboj en monto*  
de **ĜOŬ ĈEN** (Ming-dinastio)








*Han Šizaj (902—970) en nokta festeno (Parto)*


de **GU HONGGONG** (Kvin Dinastioj)

*Floroj en korbo*

de **LI SONG** (Song-dinastio)







*Krizantemoj kaj kolomboparo*  
de **JU ĜJGAŬ** (Nuntempo)

*Printempo fruas en Suda Ĉinio*  
de **HUI FEN** (Nuntempo)





*Pinoj kaj domoj en  
nubaro*

de **HŬA JAN**  
(Ĉing-dinastio)

# ŜTONKAVERNA ARTO DE ĈINIO

de LAN ŜAN

Tra la vasta Ĉinio dislokiĝas centoj da ŝtonkavernaroj grandaj kaj malgrandaj. En ili troviĝas sennombraj belaj antikvaj freskoj, koloraj modlaĵoj kaj skulptaĵoj. Ili estas arta trezorejo de la Oriento.

La ŝtonkaverna arto de Ĉinio intime rilatas al budhismo. En nia lando la ŝtonkaverna arto estas nomata ankaŭ budhisma arto, unu el la esencaj partoj de la budhisma arto de Ĉinio. Post kiam budhismo enkondukiĝis en Ĉinion en 67 p.K., la ŝtonkaverna arto vigle kreskis kun la prospero de budhismo.

Unu el la plej frue konstruitaj ŝtonkavernoj estas la Milbudha Kaverno de Kizil, ĉe la suda piedo de Tjanŝan--montaro en la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Kreiĝis ŝtonkavernaro 3.2 km. longa sur rokmuro de la monto Ming'udage, dank' al la konstruado, kiu komenciĝis en la 2-a jc. p.K. kaj daŭris centon da jaroj. Nun tie konserviĝas 236 ŝtonkavernoj, el kiuj 133 estas kompare sendifektaj. En 80 ŝtonkavernoj vidiĝas freskoj kun areo de ĉ. 4 000 kvadrataj metroj, kiuj konigas ĉefe budhismajn rakontojn, kaj iuj aliaj spegulas la socian vivon de diversaj naciecoj en la antikva Okcidenta Regiono.


La plej granda ŝtonkavernaro de Ĉinio estas Mogaŭ-kavernaro

en Dunhŭang de Gansu-provinco. En pli ol 1 000 jaroj post 366 p.K. artistoj de pluraj dinastioj hakis 492 ŝtonkavernojn sur rokmuro 1 600 metrojn longa kaj 50 metrojn alta inter la montoj Mingŝa kaj Sanŭej. Interne de la kavernoj oni faris kolorajn budhajn portretojn kaj desegne priskribis budhismajn rakontojn, el kiuj la plej allogaj estas enhavoriĉaj kaj bele pentritaj bildoj pri sutraj rakontoj. Sur iuj pentraĵoj vidiĝas proksimume mil personoj, inkl. de budhoj, bodisatvoj, muzikistinoj, kantistinoj dancistinoj, flugantaj feinoj k.a. Sur grandaj freskoj kaj inter ili videblas belaj floroj, raraj herboj, freŝaj fruktoj, dolĉaj melonoj,

elafuroj (*Elaphurus davidianus*), dresitaj elefantoj k.a. Oni nomas la freskojn de Dunhŭang floro de inteligento. Ili estas ofte duplikatitaj sur modernaj artaĵoj.

En la ŝtonkavernaro de Dunhŭang konserviĝas 2 500 koloraj modlaĵoj de diversaj dinastioj. La plej granda el ili estas argila budho 33 metrojn alta kun ŝtonego ene. Fine de la 19-a jc. en iu hermetika ŝtona ĉambro oni malkovris grandkvantajn kaj altvalorajn antikvajn sutrojn, dokumentojn kaj pentraĵojn. La ŝtonkavernaro estas la plej bone konservita, plej enhavoriĉa en la hodiaŭa Ĉinio. La konstruoj, freskoj, koloraj modlaĵoj kaj

*Majĝjiŝan-ŝtonkavernaro*







*En la Mil-budha Kavernaro en Kizil*



*Budhoj sur fresko en Mogaŭ-kavernaro*

multaj historiaj objektoj ne nur spegulis la artajn trajtojn de diversaj dinastioj de Ĉinio, sed ankaŭ donis ekstreme valorajn materialojn pri la historio, politiko, militaj aferoj, agrikulturo, komerco, sociaj moroj kaj kutimoj kaj vestoj de la antikva Ĉinio.

Majĝjiŝan-ŝtonkavernaro en la gubernio Tjanŝuj, Gansu-provinco, estas alia granda ŝtonkavernaro. De post la kvara jarcento, sur krutaĵoj de la monto Majĝjiŝan oni hakis sume ĉ. 200 ŝtonkavernojn, kiuj estas interligitaj per surrokaj vojoj. Nun 30 el ili estas bone konservitaj kun pli ol 7 000 koloraj budhaj statuoj, nombro da freskoj kaj ŝtonaj skulptaĵoj. La koloraj budhaj statuoj estas elvokivaj kun eminenta arta nivelo kaj estas raraĵoj de la ŝtonkaverna arto de Ĉinio.


La urbo Datong de Ŝanŝi-provinco estis la ĉefurbo de la Norda Ŭej-dinastio (386 — 534 p.K.) fondita de Ŝjanbej-nacieco. En la dua duono de la 5-a jc. oni prifosis la faman ŝtonkavernaron


Jungang ĉe la piedo de la monto Uĝoŭ, 16 km. nordokcidente de la urbo. Nun tie estas 53 kavernoj kun 1 100 budhaj niĉoj kaj 51 000 ŝtonaj skulptaĵoj grandaj kaj malgrandaj. Tie estas gigantaj statuoj de budhoj sub la ĉielo kaj ankaŭ sennombraj malgrandaj statuoj de budhoj, bodisatvoj, muzikistinoj, flugantaj feinoj kaj aliaj. En la loko vidiĝas sida statuo de Ŝakjamunio 17 metrojn alta kun piedoj longaj 4.5 metrojn. Ĝi estas unu el la

malmultaj grandaj ŝtonaj statuoj de budhoj en Ĉinio. Vidiĝas ankaŭ alia giganta statuo de budho. Sole sur ĝia robo estas pli ol mil malgrandaj statuoj de budhoj. En la ŝtonkavernaro Jungang estas pli ol 20 skulptaĵoj, kiuj montras la vivon de Ŝakjamunio de lia naskiĝo ĝis lia budhiĝo. Ili estas veraj bildrakontoj ĉizitaj sur ŝtonoj.

La fruperiodaj verkoj de la ŝtonkavernaro evidente montras la influon de la ekzota budhisma


#### *Ŝtonskulptitaj budhoj en Baŭding-monto*





arto. La ĉefaj budhaj statuoj senescepte estas majestaj kaj makabraj. La skulpturo estas simpla, konciza kaj impresas per plena harmonio, tamen la tranĉoj plejparte estas ebenaj kaj rektaj. La figuroj kaj plisaĵoj estas randklaraj, sed sen viveca efekto. La postaj verkoj plejparte montras la tradicion artan formon de han-nacieco, kun variaj oblikvaj faldoj de pendantaj vestoj. Ili estas vere elvokivaj kaj enhavoriĉaj.

#### *Jungang-ŝtonkavernaro en Datong*



Je la fino de la 5-a jc. la Norda Ŭej-dinastio translokis sian ĉefurbon de Datong al Lŭojang, Henan-provinco, kaj konstruis tie gigantan Longmen-ŝtonkavernaron, sur la monto Longmen ĉe la rivero Jiŝuj. Sur la ŝtonaj krutaĵoj de la monto Ŝjangŝan trans la rivero kaj la monto Longmen oni konstruis 1 352 ŝtonkavernojn, 2 100 niĉojn kun 97 000 statuoj de budhoj. Krome tie vidiĝas ankaŭ 40 budhismaj pagodoj, 3 680 steleoj kun epigrafoj.

La plej eminenta verko en la ŝtonkavernaro Longmen estas ŝtona skulptaĵaro subĉiela en la templo Fengŝjan de Tang-dinastio (618 — 907 p. K.). La templo, 40 metrojn profunda, 36 metrojn larĝa, estas la plej granda ĉe Longmen-ŝtonkavernaro. Oni diris, ke ĝi estis hakita per la monsumo oferita de imperiestrino U Zetjan (690—705 p. K. sur trono) de Tang-dinastio. Ĝi konsistas el granda statuo de budho 17.14 metrojn alta kaj ambaŭflanke starantaj Kasjapa, Ananda, la dioj Tjanŭang, fortuloj kaj servistoj. La granda budho tenere kaj afable rigardas desupre al la vizitantoj. La aliaj figuroj kun originalaj mieno kaj karaktero vekas respekton ĉe la

vizitantoj.

En la gubernio Dazu de Siĉŭan-provinco estas 40 ŝtonaj skulptaĵaroj de Tang-dinastio kaj Song-dinastio (618 — 1279 p. K.) kun pli ol 50 000 figuroj. Sur la Norda Monto kaj Baŭding-monto troviĝas grandiozaj, delikataj kaj la plej enhavoriĉaj ŝtonaj skulptaĵoj en Ĉinio, kiuj estas reprezentantaj verkoj de la malfruaj ŝtonaj skulptaĵoj de Ĉinio. Oni nomas ilin Arta Palaco de Ŝtonaj Skulptaĵoj.

La ŝtonaj skulptaĵoj sur la Norda Monto estas famaj pro sia delikata skulpturo. La bodisatvo Avalokitesvaro estas nomata ĉarma bodisatvo pro siaj svelta figuro, delikata haŭto, bela mieno. La bodisatvo Samantabhadrā rajdanta sur elefanto estas diketa je la vizaĝo kaj bele karakterizita per la orienta beleco. Sur krutaĵoj de la monto Baŭding estas proksimume dek mil figuroj ĉizitaj dum 70 jaroj en la Suda Song-dinastio (1127—1279 p. K.) dank' al la organizado de la nobla bonzo Ĝaŭ Ĝifeng. La grandaj reliefoj kaj gigantaj niĉoj dissemiĝas sur la monto unu apud alia, kio impresas la rigardantojn per imponeco. La artaĵaro prenas sutrajn rakontojn kiel sian ĉefan temon enhavokontinuan kun klarigoj kaj prikantaj vortoj. Ili aspektas kiel belaj rakontbildoj.

Aliaj famaj ŝtonkavernaroj estas Binglingsi-ŝtonkavernaro de la gubernio Jongĝing, Gansu-provinco, Nanŝjangtangŝan-ŝtonkavernaro proksime de la urbo Handan, Hebej-provinco, la Dekmil-budha Ŝtonkavernaro sur Tjanlong-monto de la urbo Tajjŭan, Ŝanŝji-provinco, kaj Ŝiĝongŝan-ŝtonkavernaro de la gubernio Ĝjanĉŭan, Junnan-provinco. □



# ELSPEZI KONFORME AL ENSPEZO

## — Enketo pri laborista vivo

Alilandaj amikoj ofte demandas, kiaj ŝanĝiĝoj okazis al la vivo de ordinaraj ĉinoj, kiam disvolviĝis la produkto kaj pliboniĝis la ekonomia situacio en la moderniga konstruado kaj praktikado de la reformo de la ekonomia sistemo. Mi donos kelkajn ekzemplojn pri en- kaj elspezoj de iuj laboristaj familioj en meznivela vivo, eble tio helpus niajn amikojn koni Ĉinion. Laŭ sintezaj enketoj, en la lastaj jaroj la efektivaj enspezoj de la urbaj oficistoj kaj laboristoj multiĝis je 40%.

En 1980, la familioj rigardataj kiel malfacilaj en spezado estis tiuj, kies monata pokapa enspezo ne superis 25 jŭanojn, nun tiu normo altiĝis ĝis 42 jŭanoj.

### MANKO DE KONDIĈOJ POR ALTA KONSUMO

Jena enketo estis farita en la Pekina Juvela Fabriko en mallarĝa sfero. 7 laboristoj enketitaj enspezas meznombro ĉ. 100 jŭanojn monate (inkluzive monpremion kaj diversajn subvenciojn). Tiu sumo estas enspezo de la plejparto de la laboristoj de la fabriko. Familioj de geedzoj ambaŭ salajrataj enspezas monate ĉ. 200 jŭanojn, kies duono por nutrado, 20-50 jŭanoj por ŝparlokado kaj 20-50% de la salajro por vestoj kaj ĉiutagaj necesajoj.

Ĉi tiuj laboristoj diris, ke en la lastaj jaroj malgraŭ la ŝvelo de prezoj, la vivkondiĉoj eviden-

te pliboniĝis pro dufoja ĝenerala altigo de salajro, altigo de premio kaj subvencioj.

Ĉiuj laboristoj el la 7 familioj posedas 1-2 kompletojn da lanaj vestoj kaj preskaŭ ĉiuj havas altklasan kontraŭfrostan veston. 6 el 7 familioj aĉetis elektroventumilon kaj lavmaŝinon, 5 fridujon kaj koloran televidilon kaj iuj elektran bakforonon.

La 7 laboristoj diris, ke por la plejparto de la amasoj, inkluzive ilin, la vivo estas iom pli facila ol antaŭe, sed se ili iom pli multe elspezos en la fino de la monato, ili renkontos malfacilon en financo. Ili aĉetas karajn cigaredojn kaj drinkaĵojn nur por festaj tagoj kaj gastoj. Por aĉeti ian valoran komercaĵon, ili devas ŝpari monon dum ĉ. 2 ja-

roj, kaj nun mankas al ili kondiĉoj por alta konsumo.

Kelkaj patrinoj diris, ke nuntempe junaj geedzoj havas nur unu infanon, kaj por tiu ili malavare elspezas. Kaj iuj fabrikoj de infanaj bezonaĵoj profitas de tiu inklinado kaj produktas nur multekostajn varojn, ekz. infanaj ludiloj kaj vestoj. Ju pli ŝatataj la produktaĵoj, des pli alta la kosto. Tiuj patrinoj esperas, ke la fabrikoj produktos pli multe da bonkvalitaj varoj, tamen ne tiel multekostaj.

### ENSPEZO APENAŬ KOVRANTA LA BEZONON

Tiu estas kvarmembra familio. La mastro Ŝjan Minghŭa, 6-grada metallaboristo de la

*En la familio de Ding Gŭoĝang, laboristo de la Pekina Juvela Fabriko*





Kantona Fabriko de Aŭta Elektroaparato, enspezas ĉ. 120 jŭanojn monate. Lia edzino Pan Hŭanĵu laboras en la Kantona Serura Fabriko, salajrate per ĉ. 100 jŭanoj ĉiumonate. La 220 jŭanoj estas la totala monata enspezo de la familio. Statistiko montras, ke en 1985 la meznombra monata enspezo por ĉiu urbano de Kantono estas 87.21 jŭanoj. Ekskluzive de gvidantoj kaj privataj laboruloj, la ekonomia stato de la familio de Ŝjan vere estas tre tipa en la kantona laboristaj familioj.

Kiel aranĝi la vivon per tiu enspezo en Kantono kun pli alta konsumo nivelo?

“La mono sufiĉas por la bezono,” diris Ŝjan. “Tamen tion ni devas koni klare kaj racie elspezi. Ni tenas nian monatan elspezon por nutrado je ĉ. 150 jŭanoj, kiuj okupas preskaŭ 70% de la totala enspezo. 5 jŭanoj ĉiutage, unu jŭano por matenmanĝo, mi kaj mia edzino prenas teon kaj panon, la infano — kukon k. a. ĉ. 1.5 jŭanoj por tagmanĝo, mi kaj mia edzino tagmanĝas en la fabrikoj. Vespermanĝo estas nia ĉefa manĝo. Ni aĉetas legomojn de bazaro vespere, revenante de la laboro. Ĉe vespermanĝo ni kutime havas pladon kaj supon. La supon ni preparas el bovaĵo, fiŝaĵo k.a. kaj la pladon el vaporumita fiŝaĵo aŭ freŝa legomo kun viando. La infano facile perdas apetiton pro grasaĵo, kaj ni ofte ŝanĝas la pladojn, sed malgraŭ tio la elspezo ne superas la kutiman sumon.

“Kompreneble kelkfoje ni elspezis plimulte ol kutime, sed ni observas la principon: se multe elspezis hodiaŭ, ŝparos laŭeble morgaŭ. Mia edzino notas ĉiutage la elspezon.



*En mondeponejo*

“Post pago de ĉ. 10 jŭanoj por domluo, akvo kaj elektro kaj kelke da poŝmono, mi kaj mia edzino ĉiu ŝparlokas ĉiumonate 12 jŭanojn. Post 1-2 jaroj la ŝparmono sufiĉos por aĉetian multekostan bezonaĵon.”

Jes, ilia domo estas meblita modeste, sed sufiĉe. La planko de la dormoĉambro estis pavimita per plasta plato, kaj sur la plafono pendas 48-cola elektra ventumilo. En la ĉambro estas du litoj, tablo kaj ŝranko. En la salono sidas kolora televidilo, stereo-sonaparato, elektra marmito, lignaj mebloj, lav- kaj kudromaŝinoj.

Laŭ la aranĝo de la domo oni certiĝas, ke la mezaĝaj geedzoj bone mastras sian vivon. Ŝjan diris: “En dimanĉo aŭ festo, mia tuta familio ofte iras al tetrinkejo en parko. Antaŭe ni konsumis 2 jŭanojn kaj nun 5 jŭanojn. Mi kaj mia edzino prenas teon kaj kukon, kaj la infano amuziĝas per elektraj aŭto aŭ kosmoŝipo k.a. Ni elspezis pli multe ol antaŭe, sed la distrado estas pli riĉa kaj plezu-

riga kaj por ni kaj por la infano.”

### **STATO DE FAMILIOJ MALMULTE ENSPEZANTAJ**

La familio de Ĝin Ŭenĝjang, laboristo de la Tjanĝin-a Konstrua Kompanio, loĝas en malalta domo. Lia edzino ne havas oficialan profesion, kaj kudras hejme buŝtukojn por aliaj gajnante monate dekelkajn jŭanojn. Ĝin laboras kiel konstruisto kun alta salajro, sed lia edzino diris, ke li donas monate al la hejmo nur 99 jŭanojn, maksimume 120 jŭanojn. Ili havas filon kaj filinon, sed pro la malbona ekonomia kondiĉo ili ne volas, ke la filo lernu en supera mezlernejo kaj en supera lernejo. Ili esperas, ke li lernos en teknika gimnazio por gajni monon pli frue.

Pri la vivo en la lastaj jaroj, ŝi diris: “Kvankam mia familio enspezas malmulte, tamen la vivo pliboniĝis. En la lastaj du jaroj, ni aĉetis nigra-blankan televidilon, radio-aparaton, komodon kaj por la filino brakhorlogon.” □

# Gaja Dŭan-festo

Matene de la 28-a de septembro 1986, ni ekveturis de la gubernia urbeto de la Sandu-a Ŝuj-nacieca Aŭtonoma Gubernio, Gujĝoŭ-provinco, al la vilaĝo Ĉaĝaj por tie pasigi kun la tieaj ŝuj-oj la plej solenan feston Dŭan-festo en la jaro. La festo daŭras de la 12-a ĝis la 2-a monato de la sekvanta jaro laŭ la ŝuj-a kalendaro (de septembro ĝis decembro laŭ la suna kalendaro), nome dum la rikolta kaj pasintan jaron kaj bonvenigi la semada sezono, por adiaŭi la novan, celebri la rikolton, peti novjaran feliĉon kaj kulti la prapatrojn.

La prestiĝaj maljunuloj kaj gejunuloj en festaj kostumoj atendis ĉe ŝoseo por nin bonvenigi. En petarda bruo, tamtamado kaj gongado, ni eniris la vilaĝon kaj unue intervidiĝis kun la maljunuloj kaj vilaĝanoj en klas-

ĉambro de iu elementa lernejo. Ni deziregis scii, kial ili tiam pasigas la feston. Post interkonsiliĝo de famaj maljunuloj, unu el ili rakontis al ni antikvan legendon cirkulantan inter la ŝuj-oj.


Tio okazis antaŭ tre longe. Prapatroj de la ŝuj-oj transloĝiĝis de Gŭangdong kaj Gŭangŝji nordokcidenten kaj fiksloĝiĝis ĉe la limo inter la nunaj Gujĝoŭ kaj Gŭangŝji. En la paca vivo ili sopiris al sia hejmloko kaj la pasintaj tagoj, en kiuj ili sin nutris per fiŝoj kaj salikokoj, precipe al la gefratoj, amikoj kaj parencoj dise loĝantaj post la transloĝiĝo. Tial ili interkonsentite kolektiĝis je la jarfino laŭ la ŝuj-a kalendaro por sin amuzi.

Ĝuste kiam ili kolektiĝis gaje, de malproksime venis bando da rabistoj kun lancoj, pafarkoj kaj

sabroj, kiuj intencis perforte okupi ilian lokon. La ŝuj-oj unuanime forpelis la invadan-transloĝiĝo. Tial interkonsentite maljunulo aperis en la sonĝo de ŝuj-oj. Li diris al ili: "Tiuj rabistoj morgaŭ venos por vin veneni. Post la matenmanĝo nepre fuĝu sur la montodeklivon ekster la vilaĝo kaj revenu vespere." Matene de la sekvanta tago ili kune fuĝis sur la montodeklivon. Pro longa restado sur la deklivo infanoj ekploris kaj la plenkreskuloj tediĝis. Poste oni ekkantis, junuloj faris vetkuran ĉevalkonkurson kaj aliajn sportajn aktivadojn. Ekbolis la deklivo. Vespere ili revenis en la vilaĝon kaj vidis la restajn brutojn venenitaj. Por celebri la saviĝon el la katastrofo ili gaje drinkis kaj manĝis.

De tiam, la jarfina tago laŭ la ŝuj-a kalendaro fariĝis festo por la ŝuj-oj. Antaŭvespere kaj matene de la festo oni preparis abundon da pladoj kaj rizvino kaj faris solenan kulton al la prapatroj. Post matenmanĝo oni elvilaĝiĝis al montodeklivoj por fari ĉevalkonkurson kaj aliajn amuzojn. Poste, kun plimultiĝo de la ŝuj-oj, pligrandiĝo de la loĝregiono kaj granda distanco inter iliaj loĝlokoj, la reciproka vizitado fariĝis ne tiel facila kiel antrŭe. Tial la aktivado okazis aparte en diversaj lokoj. Nun, la ŝuj-oj celebras la

## Drakodanco



feston en ok lokoj. Dŭan-festo, deveninta de la primitiva religia kulto en sango-parenca kolektivo, evoluis en gajan feston de la ŝuj-oj por reciproka vizitado.

Post la konigo pri Dŭan-festo ni estis invititaj aparte al hejmoj de vilaĝanoj. Tiam en la vilaĝo eksonis kupraj kaj lignaj tamtamoj, ŝajne, por nin bonvenigi. La vilaĝo sidas en la sino de la montoj kaj estas ĉe rivero, belas la medio, ĉie kreskas ombraj antikvaj arboj. La vilaĝon ĉirkaŭas bambuaroj kaj prosperas fruktarboj. Iliaj domoj estas plejparte du-etaĝaj el ligno, la supra por loĝado kaj la malsupra por brutoj. Atinginte la supran etaĝon, mi vidis rostitan porkidon, fiŝojn, gluecan rizaĵon, rizvinon kaj aliajn sur la altaro sub la prapatra tabulo ĉe la kolono meze de la ĉambro.

Flanke de la fenestro pendis kupra kaj ligna tamtamoj. Junuloj batis ilin laŭtakte. Kupra tamtamo estas mistera muzikilo ŝatata de nacimalplimulto en sudokcidenta Ĉinio kaj ankaŭ simbolo de rajto kaj riĉaĵo. La maniero por ĝin bati estas interesa, la batanto staras apud ĝi, sin

*Frapado de latuna gongo en festotago*



*Interŝanĝo de vino*

klinas al ĝia fronta flanko, batas la surfacon per batilo en la dekstra mano kaj ĝian talion por akompano per vipo en la maldekstra; alia homo staras post ĝi kun ligna sitelo sur la manoj kaj movas ĝin antaŭen kaj malantaŭen en ĝia ventro por fari resonancon. Aliflanke de la fenestro oni batis lignan kaj kupran tamtamojn. La tamtamado estis takte klara, kruda kaj intensa kaj akordiĝis kun tiu el aliaj lignaj domoj, kio faris la vilaĝon plena de varma atmosfero.

La manĝaĵoj en la festo estis tre abundaj. Antaŭ preno de rizvino, oni stariĝis kun glaso da rizvino en la maldekstra mano, trempis en la vinon la montran fingron de la dekstra kaj fingrojetis la vinon sur ĝi supren kaj malsupren por kulturi la ĉielon, teron kaj prapatrojn. Ĉe la festeno la transdona rizvino-engluto estas interesa. Ĉiu ĉeestanto devas eltrinki per unu tiro glason da rizvino transdonitan de apudstaranto. Tio plintimigas la mastrojn kaj gastojn.

Mi neniam trinkis vinon, sed ĉifoje ankaŭ mi eltrinkis la rizvinon proponitan de mastro.

Post matenmanĝo ni sekvis la mastrojn al montodeklivo 3-4 km. ekster la vilaĝo. Tie jam kolektiĝis multaj ŝuj-oj el la najbaraj vilaĝoj kaj prezentiĝis grandega spektaklo. Kun la gajaj ŝuj-oj ni ĝuis drakan kaj leonan dancojn, lokan teatron kaj aliajn programerojn. La ĉevalkonkurso estis la plej atentoaltira, la rajdantoj sur galopantaj ĉevaloj faris diversajn danĝerajn movojn.

Je la kvara posttagmeze alvenis ankaŭ malproksimaj ŝuj-oj, la aktivado atingis sian kulminon kaj daŭris ĝis la sunsubiro. Poste, ĉiu familio invitis siajn parencojn kaj amikojn venintajn de malproksime al sia domo por vespermanĝo. Oni diris, ke ili bruligos kampfajron nokte kaj sin amuzos ĝis la tagiĝo. Ni devis reveni baldaŭ al la gubernia urbeto, tial ni adiaŭis la mastrojn kaj kun bedaŭro forlasis la vilaĝon. □



## TIE MI ESTIS NE VANE

(Novelo)

50-jara, mi subite eksuferis plurajn malsanojn. Kuracisto asertis, ke min trafis klimaktera sindromo. Konsterniĝis mia tuta familio. Laŭ ordono de la kuracisto miaj familianoj estis rigoraj al miaj manĝado, trinkado, dormado kaj aliaj agadoj. Mi tute perdis mian personan liberecon, kvazaŭ birdo enkaĝigita kun flugiloj senplumigitaj. Mi, loka verkisto, estis malliberigita en malvasta loko, kiel malliberulo en prizona vesto. Do, mi intencis elturniĝi el la kateno iel simile al malliberulo, kiu pensas kiel eskapi el karcero.

Kaj klaĉo de la publiko estas timiga. De kiam mi kronis min per la titolo de loka verkisto, oni klaĉis min post mia dorso. Vi diris foje-refoje, ke vi estas indiĝeno kaj neniam ŝanĝos vian lokan karakteron, tamen vi edziĝis al filino de riĉa ĉina komercisto en sudorienta Azio. Kial vi ne prenis kiel vian edzinon vilaĝan knabinon, kiu kolektis brulaĵojn? Evidente vi jesas buŝe kaj neas kore, vi trompas vin mem kaj ankaŭ aliajn. Vi levis flagon de loka literaturo nur por via vivteno kvazaŭ per vendo de vestoj ŝajne novaj, sed fakte malnovaj, en la tempo, kiam vi baraktis en senlirejo.

Loka verkisto devas serĉi vivrimedojn en sia hejmloko. Kial vi vin kaŝas en urbo kiel riĉulo? Duvizaĝa! Memkontraŭdira! Ĉu vi rajtas kritiki ion kaj alion kaj troviĝi inter literaturistoj? Pro maltrankviliĝo aperis ĉe mi afto kaj ruĝaj ŝvelaĵetoj

sur la haŭto. Klimaktera sindromo ne estas danĝera, malica atako eble mortiga, kaj la plej bona elturniĝo — foriri.

Se mi, pli-malpli fama, malkaŝe foriros, tio certe ĝenos la lokan instancon. Se mi unuope iros, mi devos tri-foje ŝanĝi veturilojn, vikatendi por aĉeti biletojn kaj premiĝi en la veturiloj — ĉio ĉi estas super miaj fortoj; vojaĝi kun akompananto estas tute seninterese. Vojaĝi malfacile, tre malfacile! Ho ve!

Sen koincido en intrigoj ne estas rakontoj. Feliĉulon ĉiam favoras fortune. Jen aperis bona ŝanco. Anonco sur malgranda vilaĝa ĵurnalo vidigis al mi feliĉan hazardon kaj prilumis al mi la vojon.

La anoncon faris Hŭang Guj-feng. Ŝi loĝas en Doŭli-vilaĝo ĉe la Norda Kanalo. Ŝi invitas al sia familio instruiston per granda rekompenco, kondiĉe ke ĉi tiu estas viro 40-50-jara kaj havas altan kleracon. Pri tio mi estas kvalifikita, kvazaŭ oni laŭ mia mezuro farus al mi oran seĝon, ke mi prenu ĝin en iu bela tago. La familio donos manĝon trifoje ĉiutage, kun tagmanĝo el kvar pladoj kaj unu supo, kaj vinon en ĉiu dua tago. La akceptito ricevos 60 ĵuanojn ĉiumonate. La manĝoj plaĉas kaj la salajro ne estas grava por mi. Preferinde mi anoncos min por la afero.

Sur la anonco estas klare skribite, ke ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la invito, iru, tri tagojn post la aperigo de la anonco, al Ŝilipu ekster Ĉaŭjang-pordego, kaj tie

atendos malgranda buso kaj portos ilin al Doŭli-vilaĝo, kie Hŭang Gujfang persone ekzamenos ilin kaj poste decidos, kiu el ili estos akceptita. Tiu metodo tre similas al la antikva kortega ekzameno kaj diferencas de ĝi nur en tio, ke la ekzamenanto ne estas imperiestro, sed ordinara kamparano.

Kvankam mi naskiĝis en kamparana familio ĉe la Norda Kanalo, tamen mi nur iom konis la lokon. El la centoj da vilaĝoj ĉe la kanalo mi vizitis nur dekonon, kaj Doŭli-vilaĝon mi ne vidis, nek aŭdis pri ĝi. Mi fosis en du stakoj da mimeografajoj pri la guberniaj analoj, sur kies mapoj mi trovis la situon de Doŭli-vilaĝo. Mi mezuris la distancon inter Pekino kaj la vilaĝo, legis klarigojn pri la vilaĝo kaj eksciis, ke ĝi, 50 kilometrojn for de Pekino, situas ĉe la kunfluejo de la Norda Kanalo kaj Ŝjanĝerivero kaj estas trafluata de la Pekin-Tanggu-a Ŝoseo, kiu interligas la ĉefurbon kaj Ŝinganghavenon de Tjanĝin. Kvankam nun ĝi ne estas varo-distribuejo, tamen pro ĝia trafikaj oportuneco multaj el ĝiaj loĝantoj dediĉas sian energion al laborado en aliaj lokoj, kio jam estas tradicia en la vilaĝo. Antaŭe la vilaĝanoj estis katenitaj en sia hejmloko, kaj en la lastaj jaroj oni praktikis pordomalferman politikon, ke ĉiuj, ĉu viroj ĉu virinoj, estis malkatenitaj kaj ne volis labori en la hejmloko. Antaŭ la Liberiĝo iuj fortaj viroj de la vilaĝo iris al Pekino por labori kiel kulioj, aliaj al Tjanĝin por

praktiki metiarton kaj triaj al la fora suda Ĉinio por perlabori pli da mono. En sekegaj kaj tropluvaj jaroj, junaj kaj mezaĝaj virinoj iris al Pekino kaj Tjanĝin por labori kiel servistinoj. Nun viroj vojaĝis norden al la urbeto Mohe, produktejo de oro, en Hejlongĝjang-provinco, aŭ suden al Lŭohuĉjaŭ en la speciala ekonomia distrikto Ŝenĝen, Gŭangdong-provinco, por fari komercon aŭ plenumi laŭkontraktan konstruan projekton. Ankaŭ virinoj ne volontis resti hejme. Iri al Pekino kaj Tjanĝin estis nur ilia unua paŝo. El ili la kuraĝaj turisme vojaĝis eĉ al Ŝanhajo. Proverbo prave diras, ke ĉevaloj ne grasiĝas sen nokta fojno, homoj ne riĉiĝas sen kromokupo. Ĉ. 80% de la junaj viroj kaj 20% de la junaj virinoj de la vilaĝo iris diversloken, kvazaŭ soldatoj ekspeditaj laŭ la vojoj orienta, okcidenta, suda, norda kaj meza. Tiel la vilaĝo rimarkinde riĉiĝis, ke ĝia poka pa meznombra enspezo kelkoble superis tiun de la najbaraj vilaĝoj. Antaŭ la Liberiĝo nur en la domoj de la bienuloj estis plafono, akvario, granatarbo, doma instruisto, grasa hundo kaj dika ĉambristino; nun en la riĉaj familioj de Doŭli-vilaĝo ja ne mirindas plafono, akvario, granatarbo kaj grasa hundo, sed mankas nur doma instruisto kaj dika ĉambristino. Hŭang Guj-feng aperigis la anoncon, ke doma instruisto gvidu ŝian filinon, 18-jaran mezlernejaninon, en la lernado por ke ŝi enviciĝu inter tiuj, kiuj bonege trapasos la eniran ekzamenon por supera lernejo venontjare, estu akceptita de fama altlernejo de Pekino kaj gajnu aplaudon de la vilaĝo.

Akurate mi atingis Ŝilipu ekster Ĉaŭjang-pordego. Tuj kiam mi eliris el la trolebuso,

mi vidis provincan junulon en eŭropa kostumo staranta sub platano ĉe trotuaro. Kun kapo ŝvitanta, li kriis per la tuta gorĝo: "Venu ĉi tien, instruistoj!"

"Ĉu vi . . .?" mi alproksimiĝis kaj demandis.

"Mi estas filo de Hŭang Guj-feng," li respondis kun rideto. "S-ro instruisto, diru al mi, mi petas, vian nomon."

Ne decas, ke viro agas sub falsa nomo. Sed mi timis fuŝi la aferon, se mi eldiros mian veran nomon. Estus pli bone kaŝi ĝin. Mi cerbumis kaj ekmemoris Jun Heĝen, la heroon de la romano, kiun mi nun verkas. Mi pruntis "Jun" kaj respondis: "Mia familia nomo estas Jun, kaj la persona — He."

"Bonvolu, instruisto Jun!" la junulo montris la taksion sep metrojn fore. "Mia patrino eble malpacienas en atendado. Ŝi atendas kun streĉitaj okuloj. Tuj veturu per la taksio!"

Mi ankoraŭ ne faris ian kontribuon, tamen mi ricevis tian varman akcepton. Mi sentis honton kaj diris: "Pli bone mi veturu per malgranda buso kun la ceteraj instruistoj."

"La instruistoj disponu po unu taksion," ekridis la junulo kun ruĝiĝinta vizaĝo. "Veturi per malgranda buso estis mia fipropono, kio verŝajne ne povas montri respekton al instruistoj. Min riproĉis mia patrino."

La 50-kilometran vojon la taksio trakuris rapide, kvazaŭ bolido preterflugus la lunon. En palpebruma daŭro ĝi atingis la vilaĝon.

Ĉie en kaj ekster la vilaĝo prosperas arboj. En la profunda ombrejo videblas vico post vico da tegolitaj domoj el ruĝaj brikoj. La ruĝo kaj la verdo estas

okulfrape kontrastaj, la densaj koloroj montriĝas tiel klaraj, kaj la pejzaĝo prezentiĝas en plena riĉeco. La vilaĝo etendiĝas orienten ĝis larĝa rivero, kiel arĝenta gazo ĉirkaŭas la kapon, kaj la Pekin-Tanggu-a Ŝoseo trairanta la vilaĝon similas al trembrilanta zono sur verda robo kaj ĉarmigas ĝin. Inter tegolitaj brikaj domoj staras malgranda etaĝdomo okulfrapa.

Ĉe la enirejo de la vilaĝo, apud la ŝoseo, en ombro de maljuna arbo, sidis maljunulo kun blanka barbo, kiu vendis la melonojn "Blanka Magnolio", movetante palmofolian ventumilon kaj dormetante kun duonfermitaj okuloj kaj saliva buŝo.

La ŝoforo haltigis la taksion kaj diris al mi eliĝi por demandi pri la vojo. Mi volonte obeis, ĉar ĝuste tiam mi intencis iom esplori la lokon.

"Pardonon, oĉjo, mi vin ĝenas", mi mallaŭte diris. "Ĉu vi scias, en kiu strato loĝas Hŭang Guj-feng kaj kie estas ŝia korto?"

"Ĉu vi serĉas. . . Hŭang Guj-feng. . ." la blankbarba maljunulo malfermis la okulojn kaj ŝmacis per la lipoj. "Ĉu Sinjorino Du la Deko?"


"Kial Hŭang Guj-feng ricevis tiun nomon?"

"Ŝia edzo nomiĝas Du la Deko, kaj pro tio oni tiel nomas ŝin."

"Kie do Sinjorino Du la Deko. . . loĝas. . .?" mi devis demandi laŭ tiu nomo kaj ne kuraĝis obstini.

"Ŝi loĝas en la Tualeta Domo, pli alta ol la aliaj, kvazaŭ sidante sur nia nuko."

Mi dankis la maljunulon kaj veturis en la vilaĝon.



Doŭli-vilaĝo ne estas granda, kun 200-300 familioj el ĉ. mil loĝantoj, longa oriente-okcidente kaj larĝa sude-norde. Ambaŭflanke de la ŝoseparto loĝas po dekelkaj familioj sin okupantaj pri etkomercado. Tie funkcias tetrinkejo, restoracio, butikoj de ĉiutagaj bezonaĵoj kaj, i.a., du gastejoj. En la loko formiĝis bazaro ĉio-ampleksa, same kiel pasero, kvankam malgranda, al kiu ne mankas internaĵoj. La malgranda etaĝdomo de Hŭang Gujfung staras inter la du gastejoj. Ĝia grandeco kaj ĝia imponeco estas senegalaj en la vilaĝo. Hŭang Gujfung estas ordinara virino, kiu ne ĉasas famon antaŭ la publiko, tamen dediĉas sian atenton al la bazaro, emas aŭskulti bruon kaj ŝatas viglajn homfluojn, tial ŝi konstruis la etaĝdomon ĉe movoplana strato.

Ŝia domo havas du etaĝojn, supran kaj malsupran, ĉiu kun kvin ĉambregoj. La malsupra estas borderita per verando tiel

larĝa, ke en ĝi oni povas starigi tablon, kaj la supra garnita per balustradoj kun gravuritaj desegnoj. La korto estas ĉirkaŭita de altaj muroj, kun fermita pordo. Ekstere de la muroj kaj surstrate oni vidas nur la bunte farbitan duan etaĝon, sed ne la belaĵojn en la korto.

La taksio haltis ĉe la pordo, denove mi eliris.

“Ĉu s-ino Hŭang Gujfung loĝas ĉi tie?” laŭte mi demandis, kaj nur post tio mi rimarkis la butonon de elektra sonorilo sur la pordofosto. Mi premis ĝin kaj aŭdiĝis tre oreloplaĉa tintado.

Susuris bambua kurteno sur la dua etaĝo, eliris 17-18-jara knabino kun ovala vizaĝo, ridantaj guŝoformaj okuloj kaj haroj pendantaj ĝis la ŝultroj, en robo el mikskolore kradita ŝtofo kaj kun libro en mano.

“Pro kio vi serĉas mian patronon?”

“Pro la anonco.”

“Momenton. Mi tuj akompanos vin al ŝi.”

Post momenta silento aŭdiĝis paŝbruo en la korto. Malfermiĝis la pordo, kaj eliris la knabino. Kun rideto ŝi kapsalutis min, returnis sin por ŝlosi la pordon, elpoŝigis monujon por pagi al la ŝoforo mian veturkoston kaj kondukis min eksteren de la vilaĝo.

“Kie via patrino?” mi ekbruligis cigaredon kaj demandis.

“En la oficejo de la direktoro de la kompanio.”

“Kiel via patrino fariĝis direktoro?”

“Ŝi altiris al si 36 familiojn kun 16 hektaroj da kampoj, fondis unuigitan kompanion kaj ekfunkciis kiel ĝia direktoro.”

“Kaj via patro?”

“Li gvidas masonistojn kaj ĉarpentistojn de nia vilaĝo por



entrepreni laŭkontraktan konstruadon de loĝdomego en Pekino.”

“Viaj gepatroj multe enspezas, do ne estas senkaŭze, ke via familio elstariĝis inter la riĉaj en la vilaĝo.”

Ŝi honte klinis la kapon, ŝtele rigardis min kaj subite ekridis: “S-ro, ŝajnas al mi, ke via vizaĝo estas konata.”

“Ĉu?” mi iom konsterniĝis. “Kie vi vidis min?”

“Verŝajne en televido.”

“Ĉu mi estas aktoro?”

“Ne en televida filmo, sed en televida novaĵ-programo.”

“Kiel mi meritis tian honoron?”

“Eble mi misvidis... eble en iu libro... estas via foto.”

Mi devis tuj deturni tiun teruran paroltemon por ne malkovri mian kaŝitan statuson. Mi do ekridegis: “En la mondo ekzistas multaj vizaĝo-similaj homoj. Foje oni prenis min por alilanda prezidanto promenanta en civilaj vestoj surstrate en Pekino.” Miaj vortoj vekis senĉesan ridklukadon ĉe la knabino kaj facile deturnis ŝian atenton.

Ni iris suden de la vilaĝo. Antaŭ ni prezentiĝis kamparo simila al brokato. La 36 terpecoj kunligitaj formis unu tuton kun areo de 16 hektaroj. La tuto dividiĝis en tri partojn: unu por tritik- kaj rizkampo, alia por legomĝardeno kaj la tria por melonkampo. Oni prilaboras tiujn tri por komerco.

Ĉe kamp-rando staras triĉambra domo duone el brikoj kaj duone el adoboj. Antaŭ la domo staras vinber-pergolo kaj fabo-ŝedo. Jen la unuigita kompanio de Hŭang Gufeng aspekte mizera, tamen profitodona.

Dum la knabino montris tien kaj tien, subite stariĝis en la ŝedo ĉ. 50-jara kampara virino, kiu rigardis al ni kun mano metita ĉe la frunto por ŝirmi la okulojn kontraŭ la suno.

“Panjo!” la knabino saltetis, svingante la brakojn. “S-ro instruisto venis. Kial vi ankoraŭ staras tie?”

La kamparanino forlasis la ŝedon kaj proksimiĝis al ni aplombe per mezrapidaj paŝoj. Ŝia sinteno estis dignoplena. Ŝi portis ĉemizon el delikata linjo kaj pantalonon el nigra silko. Ŝi tualetis modere kun vizaĝo plena kaj sensulka. Ŝia rida mieno montris feliĉon kaj la diketa korpo estis okulplaĉa.

La knabino rapidis al ŝi kaj flustris ĉe ŝia orelo. Ilia rigardo ĵetiĝis sur min kiel lumo de fokuslampo.

“S-ro Jun, mi nomiĝas Hŭang Gufeng,” plirapidigis siajn paŝojn tiu kamparanino kun neordinara sinteno kaj etendis al mi la manon, kaj sur ŝia brako brilis ora horloĝo. “Kiel mi nomu vin?”

“Jun Heĵen,” mi respondis senpripense.

“Ni interparolu hejme, s-ro Jun,” iom ridis Hŭang Gufeng.

Ni eniris la vilaĝon kaj preteriris butikon de ĉiutagaj bezonaĵoj, kaj la knabino, forlasinte sian patrinon kaj min, kuretis en ĝin.

La strato estas trezora loko de la vilaĝo, kaj la ĝardenosimila korto de Hŭang Gufeng negranda. La korto estas pavimita per kvadrataj cementaj brikoj. Sub visteria pergolo staras ŝtona tablo kun 4 ŝtonaj benkoj ĉirkaŭe.

“Sufoka varmo en la domo. La elektra ventumilo ne donas

agrablan venton. Ni parolu do en la korto!” Ŝi kunportis el la domo du grandajn akvomelonojn kaj metis ilin sur la tablon. “Kie vi laboras, s-ro Jun? Ĉu vi kunportas rekomendan leteron?”

Surprizo! “Mi estas unuopa laborulo. Mi ne portas ĝin,” mi konfuziĝis.

“Kia profita okupo?” ŝi demandis daŭre.

“Mia okupo estas ekster la riĉigaj profesioj kaj ne donas profiton,” mi respondis dubsence.

“Montru al mi vian legitimaĵon.”

“Mi forgesis ankaŭ.”

“Kio do povas atesti, ke vi taŭgas por fariĝi instruisto?”

“Mi studis en alta lernejo.”

“Unue manĝu akvomelonon! La ĉefekzamenanto venos tuj poste.”

Dum nia interparolado la knabino eniris ĝoja kun libroj. Mi mire diris: “Via butikoj vendas ankaŭ librojn, kredeble la mastro estas bone klerigita.”

“Mi skribis libroliston, kaj oni aĉetis en Pekino varojn kune kun la libroj laŭ la listo,” la knabino enmanigis al mi anglalingvan lernolibron por la unua klaso de altlernejo. “S-ro, mi dediĉos pli da energio al studo de la angla lingvo. Gvidu min per tiu ĉi libro.”

“Aĥ!” mi eksentis kapturnon. “Mi forgesis ĉiujn anglajn vortojn, kiujn mi lernis antaŭ 30 jaroj. Eble mi memoras ankoraŭ la 26 literojn.”

La knabino ridklukis kun mano ŝirmanta la buŝon kaj montris al mi alian dikan libron “Mil Matematikaj Problemoj por Enira Ekzameno por Supera Lernejo”: “Mi ne bone lernis analizan geo-

metrion. Multe helpu min en tio.”

Mi embarasiĝis, ŝvitis tutkorpe, sentis plialtiĝon de sangopremo kaj balbutis: “Dum jaroj mi... forgesis ankaŭ trigonometrion, algebron kaj geometrion, kiujn mi lernis.”

“S-ro Jun, ĉu vi ne mikas per tio la falsan kun la vera?” Hŭang kriis kun kolero. “Vi scias malpli multe ol mia filino, kiel do vi povus instrui ŝin?”

“Pardonon...” mi hontegis, ne sciante kion fari.

“Vi pretendis, ke vi vizitis altlernejon. Ŝajne vi tute malsukcesis en la fina ekzameno!” Hŭang pike mokis min. “Vane mi luis taksion. Por ne stultiĝi mi ne pagos vian veturon al Pekino.”

Mi trovis por mi ofendon kaj povis diri nenion. Mi do haste foriris kun honto kaj timo. La knabino verŝajne volus sekvi min por akompano, sed ŝia patrino detenis ŝin.

Mi eliris deprimita el la vilaĝo. Tri aliaj taksioj preterveturis min.

La blankbarba maljunulo, kiu vendis melonojn sub maljuna arbo, nun finis la laboron kaj kriis per la pika voĉo: “Sinjoro, ĉu vi ne profitis ĉe Sinjorino Du la Deko?”

Mi hontis respondi kaj rapidiĝis la paŝojn al la aŭtobusa haltejo. Mi devis atendi buson en la rostanta suno. Mi ege bedaŭris, ke mi troe taksis min, kaj devas trinki la vermuton preparitan de mi mem.

“Atendu, instruisto!” aŭdiĝis kriado de la knabino el fenestro de la taksio, kiu postkuris min.

Mi haltis kaj ankaŭ la taksio. La knabino eltaksiĝis kun serena vizaĝo.

“Mia patrino petas vian pardonon,” diris la knabino kun flanken klinita kapo kaj radiantaj okuloj. “Ĉu vi scias, kiu estas mia patrino?”

“Kompreneble Hŭang Guj-feng!” mi konfuziĝis.

“Pripensu, kiun alian nomon ŝi portas?”

“Onidire... Sinjorino Du la Deko.”

“Ĝi estas moknomo donita de klaĉemulo.”

“Kiel do ŝi nomiĝas?”

“Antaŭ 40 jaroj estis iu nomata Malgranda Rubando... Ĉu vi forgesis?”

“Malgranda Rubando, Malgranda Rubando... Malgranda Rubando de la familio Hŭang...”

“Ĝuste tiel nomiĝis mia patrino.”

Mi ekmemoris, ke 10-jara, mi estis la unua sukcesinto en ekzameno por eniri superan elementan lernejon. La familio Hŭang de najbara vilaĝo sendis svatistinon al mia familio por edzinigi al mi ilian filinon Malgranda Rubando. Informiĝinte pri mia sukceso, mi revenis hejmen tre gaja, kvazaŭ ricevinte honoran titolon por la unua sukcesinto de la supera kortega ekzameno. Kiam mi sciis, ke la Malgranda Rubando ne vizitis lernejon, mi ekbolis de kolero kaj elbuŝiĝis pikajn vortojn: “Mi estas supera elementlernejano. Kiel mi povus edziĝi al analfabeto?” Mi elpelis la svatistinon.

Mi ne atendis, ke la Malgranda Rubando ne forgesis tion dum

la pasintaj 40 jaroj kaj sin venĝis hodiaŭ.

“Mi hontas, mi hontas!” mi elpoŝigis naztukon kaj viŝis ŝviton foje-refoje.

“Por memorigo!” de post sia dorso la knabino antaŭmetis al mi mian romanon eldonitan antaŭ nelonge. “Skribu vian nomon kaj donu kelkajn vortojn.”

Mi pripensis kaj skribis:

*Aromaj herboj en hejmloko  
fontas el la sama radiko*

**Dediĉita al Sinjoro Du la Deko kaj Hŭang Guj-feng**

La taksio veturigis min al Pekino. Mi eltaksiĝis kaj manŝvingis al la ŝoforo en signo de adiaŭo.

“Momenton!” la ŝoforo rimarkigis. “Vi forgesis ion en la taksio.”


“Mi iris kaj revenis kun malplenaj manoj. Mi perdis nenion!” mi diris, traserĉinte la poŝojn kaj rigardinte teren.

La ŝoforo malfermis la kofrokovrilon de la taksio, elprenis grandan korbbon kaj ridis: “Bonvolu akcepti la donacon de Sinjorino Du la Deko.”

La korbo pezis almenaŭ 50 kilogramojn, kun akvomelonoj de nova speco kaj melonoj “Elizabeta”, speco importita el alia lando. □

Esperantigis **LU BINŜENG**

*\* La aŭtoro estas fama ĉina verkisto, 51-jara, naskita en Tongŝjan-gubernio, Pekino. Li verkis ses romanojn, pli ol 30 mezlongajn romanojn kaj multajn novelojn. Li funkcias kiel vicprezidanto de la Pekina Filio de la Ĉina Verkista Asocio.*



*Ĉjang-a familio*

## En Ĉjang-a Vilaĝo

Fotoj de HU BAŬJU

Ĉjang-nacieco, unu el la ĉinaj nacimalplimultoj, vivas ĉefe en la Aba-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco ĉe la supra Minĝjang-rivero, Siĉŭan-provinco. Ĝi havas siajn lingvon kaj morojn. La ĉjang-oj sin vestas simple, bele kaj senĝene. La virinoj, kiuj estas lertaj en brodado, ornamas per ĉarmaj desegnoj siajn jupojn, zonojn kaj ŝuojn. En la ĉjang-a vilaĝo, ĉu viroj kaj virinoj, ĉu junaj kaj maljunaj, ĉiuj ŝatas memfaritan vinon el sekalo kaj tritiko. Ili miksas ĝin kun akvo kaj suĉas ĝin per maldika bambua tubo. En la festotagoj kaj post kultado de siaj prapatroj kaj la dio de la ĉielo, la ĉjang-oj invitas siajn parencojn kaj amikojn trinki tian vinon. La

ĉjang-oj estas kantemaj kaj dancemaj. Post laborado aŭ en festotago kaj geedziĝa tago ili kantas kaj dancas la dan-

cojn Gŭoĝŭang kaj Pigu kun forta nacia gusto, en akompano de flutoj kaj aliaj muzikiloj.

*Ĉjang-aj knabinoj*








*Trinkado de sekal- kaj tritikvino en festotago*



*Ĉjang-aj maljunuloj*



*Preparo de mangájo per pistado*



*En foiro*





## Poŝmarkoj pri Peonioj

de ĜI SING

Peonio, konata kiel ornama floro de Ĉinio, estas plurjara arbusto kun floroj grandaj, belkoloraj kaj bonodoraj. De antike ĝi estas rigardata kiel simbolo de prospero, potenco, riĉeco kaj kontento.

Tiu ĉi poŝmarko-serio el 16 pecoj estis emisiita la 5-an de aŭgusto 1964. Ĝi montras rarajn variojn de peonioj kun belaj nomoj, kiaj "Du Belulinoj" kaj "Rubeno kun Glacio".



1964 北京 8-5

ĈINAJ POŝMARKOJ



# Popolkantoj el *Jüefu* de Han-dinastio

de MEJ ĜI

En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.), kun prospero de poezio kaj *fu*-oj, grandajn sukcesojn rikoltis ankaŭ popolkantoj *jüefu*.


*Jüefu* (*Jüe* signifas “muzikon” en la ĉina lingvo kaj *fu* — “institucion”.) estis nomo de oficiala muzika institucio de la imperiestra kortego en Han-dinastio, kies laboro estis trejnado de muzikistoj kaj kolektado kaj muzikigo de popolkantoj. La vorto *Jüefu* aperis tre frue, sed la kolektado kaj muzikigo de popolkantoj kiel la ĉefa laboro komenciĝis post establiĝo de la muzika institucio en la regperiodo de la imperiestro Udi de Han-dinastio (140-87 a.K. sur la trono). Poste oni nomis kiel poemojn de *Jüefu* aŭ simple *Jüefu* ĉiujn kantotekstojn de la muzika institucio, inkluzive de odoj verkitaj de kleruloj kaj luditaj en la kortego okaze de gravaj ceremonioj kaj de ĝi kolektitaj popolkantoj. Tiele, *Jüefu* fariĝis nomo de unu el la formoj de poezio. Kaj ĝuste la popolkantoj de *Jüefu* sin prezentas plej sukcese en la poezio de Han-dinastio. Sed tre bedaŭrinde, la plejparto de tiuj popolkantoj perdiĝis, kaj herediĝis nun nur kvardek kantoj.

Han-dinastio estis prospera kaj potenca, tamen, aliflanke, pro longatempa militado, la grandskala konstruado kaj akra aneksado de tero, multaj popolanoj baraktis en abismo de suferoj pro kruelaj sklavigo kaj ekspluatado, ili fuĝis aliloken pro neelteneblaj malfaciloj en la

vivo. Malsame al la *fu*-oj de Han-dinastio, kiuj flate prikantis la “grandajn meritojn” de la regantoj, la popolkantoj de *Jüefu* prenis la malfeliĉon de la popolo kiel sian ĉefan temon. Ili kredeble spegulis la malfeliĉon kaj mallumon en la feŭdisma socio. La realismo de la popolkantoj en *Jüefu* de Han-dinastio grave influis la evoluon de la poezio de la posta tempo, traŭrante kiel ruĝa linio la historion de poezio de la regperiodo Ĝjan’an (196-220 p.K.) ĝis Tang-dinastio (618-907 p. K.) kaj formante la realisman tradicion sistemigitan per la popolkantoj de *Jüefu*. En Tang-dinastio, *Jüefu* apartiĝis de muziko kaj esencis nur kiel sarkasmaj poemoj kritikantaj la realon.

La plej distinga karakterizaĵo de la popolkantoj de *Jüefu* estas eposeco. La popolkantoj, ĉu longaj ĉu mallongaj, ĉiuj estas eposoj, kaj inter ili estis verkoj en tria persono, kaj verkoj kun karakterizitaj personoj kaj kompare kompleta intrigo. La tekstoj de *Jüefu* estas buŝlingvaj, modestaj, tamen infektaj. *Jüefu* estas libera en la formo, nek katenita de rigore observataj poeziaj reguloj kaj rutina sintakso, inter ili oni povas trovi kaj senritmajn kaj longajn, perfektajn kvin-silabajn versaĵojn.

Inter la popolkantoj de *Jüefu* la plej longa estas eposo “Jen pavo flugas al sudoriento” (Bv.



legi ĝin en n-ro 5, 1982 de EPĈ) kun 157 Versoj. La eposo kronis per siaj brilaj atingoj la popolkantojn de *Jüefu*. Unue oni trovis la eposon en la Sudaj Dinastioj (420-589 p.K.). La eposo portis la titolon "Antikva poemo: Omaĝe al la edzino de Ĝjaŭ Ĝongĉing, prezentita de sennomulo". La eposo rakontis tragedion de junaj geedzoj. Liŭ Lanĝi, edzino de Ĝjaŭ Ĝongĉing, malaltranga oficisto en prefektujo Luĝjang, estis repudiita de sia bopatrino. Ĉe adiaŭo al sia edzo ŝi ĵuris sian amon. Sed ŝia frato devigis ŝin reedziniĝi. Fine per sinmortigo ŝi esprimis sian kontraŭstaron al la deviga reedziniĝo. La eposo malkaŝis la krimojn de feŭdisma etiko kaj patriarka sistemo, laŭdis la malcedemon de Ĝjaŭ kaj Liŭ al feŭdismo. En la eposo la heroino Liŭ Lanĝi edziniĝis al Ĝjaŭ Ĝongĉing en la aĝo de 17 jaroj. Ŝi estis profunde amata de la edzo. Sed la bopatrino abomenis kaj molestis ŝin. Rakontante pri ŝia forlaso de la hejmo de ŝia edzo, la eposo detale priskribis ŝian belon kaj aplombon en tualetado, kaj ankaŭ ŝian malcedemon. Post kiam ŝi revenis al la hejmo de sia patrino, multaj venis por svati ŝin al filo de prefekto aŭ de guberniestro, kaj ŝia frato devigis ŝin reedziniĝi. Ŝi ne ŝanceliĝis antaŭ riĉeco, nek timis minacon, kaj decidis protesti per sinmortigo. Ŝi ĵure interkonsentis kun la edzo, ke ŝi revidos lin en alia mondo. En la tago de ŝia reedziniĝo ŝi dronigis sin en lago. Informiĝinte pri ŝia sinmortigo, Ĝjaŭ pendigis sin sur arbo. En simpatio oni entombigis ilin kune. La eposo rakontas, ke ilian tombon ombras prosperaj pinoj kaj platanoj, inter la arboj gaje pepas paro da ambirdoj, simboloj de iliaj animoj interamantaj kaj neniam disigeblaj. La finalo aneksis al la eposo romantikan koloron kaj esprimis la firman konvinkiĝon de la popolo al la belo kaj bono.

Plejparto de la popolkantoj de *Jüefu* estas tiuj priskribantaj malfacilan vivon de malsupraj laborantaj popoloj. "Malsanulino" prezentas

familian tragedion pro terura ekspluato. La virino mortis pro longedaŭra malsano, postlasante tri infanojn al la edzo nenion havanta. Mortante la virino petis la edzon bone prizorgi la infanojn. La infanoj ne povis eldomiĝi pro manko de vesto por kovri la korpon. En la malplena hejmo la infanoj ploris kaj plorpetis kareson de la patrino. La kompatinda edzo povis fari nenion, krom peti helpon de renkontita amiko survoje. Kiel kora ŝira sceno!

"Orfo" priskribas malharmonion inter fratetoj. Por sola heredi la posedaĵojn, la pliaĝa frato de la orfo traktis sian junan fraton kiel sklavon kaj ĉiamaniere molestis lin. Li devis kolporti ĉien, aŭ vektporti akvon, prepari manĝaĵojn, bredi ĉevalon, zorgi melonkampon, se li restis hejme; en vintro li ne havis sur si eĉ pajlajn sandalojn. En la netolerebla malfeliĉa stato li kun malespero kriis: "Mi sendos leteron al miaj gepatroj sub la tero, ke mi ne povos plu vivi kune kun la frato kaj la bofratino!" La malfeliĉa vivo de la orfo montris, kiel profunde penetris la ekspluato kaj subpremo en la feŭdisma socio, eĉ en la interrilatojn de samfamilianoj, kaj tiel akuzis la kruelecon de tia ekspluato.

"Batalo sude de la urbo" malbenas militon kaj funebras la militisto — viktimojn en la batalo. La poemo rakontas pri milito pere de la mortintoj. Ĝi prezentas teruran vidaĵon:

*La neenterigitojn voras korvoj.*

La poemo diris jene:

*Bonvolu al la korvoj diri:*

*"Por la mortintoj preĝe graku!*

*Ne enteriĝos certe ili —*

*Kiel kadavroj putraj vin eskapu!"*

Tiuj militistoj forlasis sian hejmlokon kaj mortis en milito. Sed iliaj kadavroj kuŝis sub la ĉielo senkovre. Kia kruela sceno prezentiĝas antaŭ la legantoj! Sed tamen la mortintoj an-





koraŭ diris tiel brave kaj malavare, kio pli profunde reliefigis la kruelecon de milito.

“Soldatiĝo Dekkvina-jare” malkaŝis la maljustecon de la militserva sistemo, pere de la mizera vivo de 80-jara veterano. La maljunulo en la poemo soldatiĝis en la aĝo de 15 jaroj kaj malmobiliziĝis en la 80-a. Preskaŭ la tutan vivon li pasigis en armeo, tamen li revenis hejmen sen ajna kompensa monsumo kaj trovis korŝire, ke lia hejmloko jam fariĝis sovaĝa tombejo. Estas facile imageble, en kia tragedia stato li pasigos siajn lastajn tagojn de la vivo.

Milito kaj servuto katastrofe suferigis la popolon en multaj flankoj. Tion ekzemplis multaj poemoj pri “migrantoj”. Tiuj poemoj priskribis aŭ senhejmulojn, aŭ nostalgion de malproksimaj garnizonantoj, aŭ korŝiran disiĝon de geedzoj. En la poemo “Antikva kanto” estas jenaj versoj:

*“Velkas homo en aŭtuna vento”,*

*“Pasas tagoj en migrado, plilarĝiĝas mia zono.”*

La “Elegio” tiel skribas:

*Anstataŭ plori nun mi elegias,  
Anstataŭ hejmeniri mi suspiras.  
Pro sopirego al la kara hejmo*

*Plumbpezaj sentoj l’ koron ŝiras.*

*Ja kiuj en la hejmo restas?*

*Ja kie pramo por transporti estas?*

*Mi povas al neniu la ĉagrenon diri!*

*La sentoj devas rade en la kor’ rondiri!*

“Trinkigi Ĉevalon ĉe la Granda Muro” priskribas amaran sopiradon de virino al la edzo. La delikata sento de la virino vekas longan eĥon ĉe la legantoj.

La popolo ne restis apatia al la plago alportita de la socio, kion pruvis la popolkantoj de *Jŭefu* plenaj de indigna kondamno kaj forta opono. “Al Orienta Pordego” priskribas malriĉan oldulon leviĝinta al ribelo, kiu vivis en abismo de malfeliĉoj. Li ne havis grenon, nek veston kaj tial li volis al la orienta pordego de la urbo kun armilo. La edzino maltrankvile baris al li la vojon, sed li kategorie respondis:

*“Vi for! Mi jam malfruiĝos.*

*Mi jam ne povas toleri plu.”*

“Ĉe morusarboj” varme laŭdis la sagacan oponon de junulino *Lŭofu* kontraŭ la malvirta prefekto. En la poemo la aŭtoro prenis metodon de flanka priskribo, kio kondukis al la arta efiko “enkorpiĝi senlimajn sugestojn en limigitaj paragrafoj”. □



# Du popolkantoj el Jüefu

## Malsanulino

La edzon alvenigis al si  
Virino, kiun longe la malsan' turmentis,  
Por lastan vorton jam postlasi;  
Sed antaŭ ol ŝi ĝin prezentis,  
Senĉese ŝia larm' torentis.  
"Bedaŭre, pezos sur vi la orfaro!  
Malsaton, froston ili ne suferu,  
Ne bastonadu ilin pro misfaro!  
Mi baldaŭ devos sekvi l' Morton. . .  
Memoru ĉiam mian vorton!"

Li volis porti kun si la fileton,  
Sed ne — ja lia jako sen subŝtofo! —  
Fermis do l' pordon, ŝtopis la fenestron,  
Kaj iris al bazaro sen la orfo.  
Renkontis li amikon sur la vojo,  
Ploradis side pro malĝojo.  
Li petis lin aĉeti manĝon por la orfoj,  
Lamentis antaŭ la amiko,  
Torentis larmoj kiel roĵo:



"Klopodis mi ne pensi pri l' tragiko,  
Sed ne sukcesis eĉ en unu fojo! . . ."  
Monerojn li elprenis, donis al l' amiko.  
Do en la hejmon li revenis:  
La orfoj laŭte ploris —  
Patrinan ĉirkaŭbrakon ili volis.  
Paŝante tien reen en la domo — ĝi malplenis —  
Murmuris li: "Okazos al vi same!"  
Do, ne plu sin ĝenadu vane!

## Ĉe Morusarboj

La sun' levigas el sudoriento,  
Radias al Ĉin-familia domo.  
Filin' naskiĝis bela al la gento,  
Kaj Lŭofu estis ŝia propra nomo.  
Lŭofu lertege silkoraŭpojn bredis  
Kaj morusofoliojn ŝi kolektis.  
El osmantvergo ŝia korbtenilo,  
El nigra silko ŝia korboreto.  
Sur ŝia kapo moda hartubero,  
Sur la oreloj po brilanta perlo.  
La jupo el silkaĵ' topazkolora,  
Kaj ŝia jako el saten' viola.  
Vidinte Lŭofu-n vir' preterpasanta  
Demetis ŝarĝon kaj karesis barbon;  
Vidinte ŝin junul' demetis sian ĉapon  
Kaj l' tukon rearanĝis ĉirkaŭ l' kapon;  
Pluganto la plugadon jen forgesis;  
Sarkanto pro ŝi laboremi ĉesis.  
Post hejmvreven' okazis tuj kverelo,  
Pro l' rigardado pri Lŭofu-a belo.  
De l' sudo jen prefekto alrapidis,  
La kvin ĉevaloj\* haltis, ir-hezitis.  
Demandis li per sia vir' pedela:  
"Kies filino estas la knabino bela?"  
"La ĉarmulin' devenas de Ĉin-domo!  
Kaj Lŭofu estas ŝia propra nomo."  
"Kiom da jaroj havas la knabino?"  
"Malpli ol kvar sed pli ol tri jarkvinoj."  
Prefekt' demandis, ĉu Lŭofu akceptus  
Proponon kunveturi, se li petus.  
Alpaŝis Lŭofu al li por parolo:  
"Ho, kiel malprudentas vi, sinjoro!  
Prefekta moŝto havas ja edzinon;

Mi, Lüofu, edzon — la destinon.”

“Imponas mil rajdantoj oriente,  
Kaj mia edzo frontas por la gvido.  
Kiel do lin distingi entaĉmente?

Lian blankan sekvas nigra ĉevalido.

Kun nigra silkoŝnur' la vostonarligo,

Sur ĝia kapo pompas ora brido.

Ĉe 1' kokso beltenila glav' en pendo,

Valoras mil taelojn da arĝento.

Li dekkvinjara iĝis jam pedelo,

Kaj dudekjara inter korteganoj;

Li tridekjara estis ŝiĝonlano\*\*;

Kaj kvardekjara, prefektuj' en la manoj.

La haŭto blankas kiel alabastro,

La barbo lia estas ne tro riĉa,

Li paŝas lante, kiel nobel-mastro,

En l' oficejo kun dignec' sufiĉa.

Ja mia edzo havas mil kolegojn,

Kaj pri li ĉiuj diras nur laŭdegojn.”

Elĉinigiŝ LAŬLUM

\* En antikva Ĉinio la imperiestroj rajtis uzi sesĉevalan jungitaron al sia veturilo, dum dukoj aŭ simila altrangulo kiel prefektoj kvinĉevalan.

\*\* Ŝiĝonlano (ĉine *shizhonglang*) altranga oficisto servanta ĉe regnestro.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** 1 internacia respondkuponno por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* 34-j. handikapulo dez. kor. tm. Cai Jianxin, 3 dong 2 hao Xingfulu 2 Jiefang, Qingshanqu, Baotou, Neimenggu, Ĉinio.

\* S-ano Ge Qunxing 37-j. dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kun gesamideanoj de ĉiuj aĝoj kaj interŝanĝas bk. kaj esperantaĵojn. Certe respondos. Adr.: Liang Ji Chang, Xi Ling Er Lu, Yi Chang Shi, Hu Bei, Ĉinio.

\* Wang Bitao (23-j. instruisto) dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kun gamikoj de ĉiuj aĝoj kaj interŝanĝas pk. pm. kaj esperantaĵojn. Adr.: Shi Yan Xiao Xue, Tian Men Xian, Hubei, Ĉinio.

\* 23-j. kuracisto, juna poeto, dez. kor. tm. pri poezio, lingvo, ktp. en Esperanto aŭ angla lingvo, kaj interŝanĝi modernajn poemarojn kaj E-eldonaĵojn. Certe respondos. Skribu al: He Jinling, Li

Ya Qu Yi Yuan, Zitong Xian, Sichuan, Ĉinio.

\* E-grupeto (20-30-jara volas kor. kun esperantistoj kiuj interŝanĝas pri kajtoj, fotografio, poŝtkartoj, sporto, porcelanaĵoj, bredado, ŝanĝo de E-aĵoj, precipe kun esperantistoj el angle-parolantaj landoj kaj Japanio. Adr.: Jiang Yude, Fangzi Taocichang, Weifang, Shandong, Ĉinio.

\* Dez. kor. kun komencantaj esperantistoj. Skribu al: Ĉukotk-Esperanto Ligo, pos. Egvekinot ab. k. 22, Ĉukotka, USSR-686810.

\* Amatora pajaco kaj ĵonglulo dez. kor. kun pajacoj/ĵongluloj tm. pri komunaj travivaĵoj. S-ano Chao Hensley, P.O.Box 1327, Redlanos California 92373, Usono.

\* Grupo de geesperantistoj diversaj dez. kor. kun personoj tutmondaj pri diversaj temoj. Kultura Centro de Esperanto, Av. Dr. Campos Salles, 890-Sala 104-13.013-Campinas-sp-Brazilo.

\* 19-j. Piotr Michajkiewicz dez. kor. kun ĉinaj gejunuloj, kolektas bk kaj E-aĵojn. Adr.: ul, Ar. Vzerwonej 26/3, 73-110 Stargard, Pollando.

\* Ni (18-60-jaraj) dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Polski Zwiqzek Esperantystow, Kolo Nr 2 w

Dzierzoniowie, Przy Zakladowym Domu Kultury "Diora", ul. Swidnicka 47, 58-200 Dzierzoniow, Pollando.

\* 16-j. Biro Laszlo dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Mures, 61. 4214 Ditrau, Rumanio.

\* Boris Saric dez. kor. kun geesperantistoj tm. Adr.: Bumarckstr. 69/1, 7000 Stuttgart 1, FR Germanio.

\* S-ino Edy Soares Jensen, Rua Santo Antonio 325-apt. 12, Porto Alegre-R.S-Brazilo, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj.

\* 27-j. litovino dez. kor. kun gesamideanoj el Azio, Afriko kaj okcidenta Eŭropo pri hundoj. Roze Aukstikalnyte, 6500 Baja, Zsivanovics 8 fsz. 2, Hungario.

\* Szoke Laszlo dez. kor. pri elektrotekniko, ornitologio kaj aliaj temoj tm., Tihadar 5/13, 4150 Odorheiu-Secuiesc, Rumanio.

\* Jolanta Kucharzyk dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: ul. Karola Marksa 11/2, 41-600 Swietochlowice, Pollando.

\* 31-j. instruisto dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj pri literaturo kaj historio. Nikolajo Jakimĉuk, ul. Gagarina, 6/47, Novovolynsk, 1, Volynskaja obl, 264920, USSR.

# KIEL SPORTAS ĈINAJ HANDIKAPULOJ

La 30-jara Li Ĉenggang, perdinta la dekstrajn brakon kaj gambon, laboras kiel kasisto en iu vestofarejo en la norda antaŭurbo de Tjanĝin. Li dufoje partoprenis en la Handikapula Sportkunveno de la Malproksima Oriento kaj Sud-pacifika Regiono kaj akiris brilajn sukcesojn. Tiel li famiĝis en Ĉinio.

Kiam li estis 1.5-jara, li perdis siajn dekstrajn brakon kaj gambon en fervoja akcidento. De tiam li uzas siajn maldekstrajn brakon kaj gambon por plenumi diversajn aferojn necesajn por la vivo.

En 1981 li informiĝis de ĵurnalo, ke Ĉinio unuafoje partoprenos en la Tria Handikapula Sportkunveno de la Malproksima Oriento kaj Sud-pacifika Regiono, kaj decidis sin provi.

*Trejnado antaŭ konkurso*



Li komencis obstinan kaj penigan ekzercadon. Ĉiun frumateno li venis al la stadiono en la norda antaŭurbo de Tjanĝin kaj saltetadis 1 500 metrojn per la sola gambo sur la kurejo. Post la laborhoroj li sin ekzercis en tablotenis, naĝo en rivero, altosalto kaj longosalto, akompanate de siaj kamaradoj. Per la sola gambo li saltis la altan de 1.45 metroj kaj la longon de 3.2 metroj kaj tiel atingis la mondan nivelon de handikapuloj-sportistoj.

Post ekzercado neeltenebla por ordinaraj homoj li sukcese trapasis la ekzamenon kaj fariĝis unu el la reprezentantoj partoprenantaj en la Tria Handikapula Sportkunveno de la Malproksima Oriento kaj Sud-pacifika Regiono okazinta en Hongkong, en kiu li gajnis 5 orajn medalojn. Li gajnis ankaŭ 4 orajn medalojn en la Kvara Handikapula Sportkunveno de la Malproksima Oriento kaj Sud-pacifika Regiono okazinta septembre de 1986 en la urbo Surakarta, Indonezio.

Laŭ statistiko de iu ĉina departemento pri civilaj aferoj, en Ĉinio troviĝas ĉ. 7.6 milionoj da handikapuloj (inkluzive mensdebilulojn kaj surd-mutulojn). Ili plejparte laboras en bonstatigaj fabrikoj fonditaj aparte por ili. En tiuj fabrikoj ili sin okupas pri simplaj laboroj kaj ricevas bonan prizorgon de medicinistoj.

Por fortigi ilian sanon korpan kaj spiritan kaj havigi al ili memrespekton, memfidon kaj

sinamon, multaj bonstatigaj fabrikoj donis atenton al riĉigo de ilia kultura vivo, helpis ilin en iuj aktivadoj, kiel ekzemple, spekti teatraĵon kaj filmon, ĝui muzikon kaj prezenti simplajn programerojn aranĝitajn de ili mem. Tamen estas tute alia afero por ili praktiki sporton. Escepte de ŝakludo kaj kartludo, preskaŭ ĉiuj sportoj estas grandaj defioj por handikapuloj. La sportoj postulas de ili superhomajn kuraĝon kaj volon. Tamen en la reala vivo, inter la handikapuloj ŝajne troviĝas tre multaj, kiuj estas fortaj en spirito kaj volo. Ili granda kuraĝo kaj obstina volo hontigis multajn sanajn homojn.

Liŭ Jukun estas tia fortulino. Ŝi, 29-jara, laboras en la Unua Pezmaŝina Fabriko en la urbo Fulaerĝji, Hejlongĝjang-provinco. Oni apenaŭ rimarkas laŭ ŝia irmaniero, ke ŝi iras per piedaj protezoj.

En 1976, kiam ŝi aĝis 18 jarojn, ŝi perdis siajn piedojn en laborakcidento. Venkinte malesperon, ŝi komencis defii sian sorton. Post kiam oni instalas al ŝi piedajn protezojn, ŝi revenis al sia laboro kaj decidis vivi kiel sanaj homoj kaj akiri ĉion ricevendan en la vivo. Hazarda ŝanco partoprenigis ŝin en sportado kiel sana homo.

Tio okazis en marto 1984, kiam ŝi venis al Pekino por ŝanĝi siajn protezojn. Tie ŝi vidis, ke iuj junaj handikapulinoj sin ekzercas en stadiono apud ŝia gastejo, kio mirigis ŝin. Poste



ŝi sciiĝis de respondeculo de la stadiono, ke ili sin ekzercas por partopreni la Olimpikojn de Handikapuloj okazontajn julie de tiu jaro en Usono. Tuj venis al ŝi en la kapon la ideo: Ankaŭ mi provu!

Post reveno al sia hejmloko, ŝi dediĉis plejparton de sia post-laboraj horoj al sporta ekzercado. Komence ŝi ne havis trejniŝton, ŝi do konsultis librojn. Laŭ siaj korpaj kondiĉoj ŝi sin ekzercis ĉefe en tiuj sportaj disciplinoj taŭgaj por la supra parto de la korpo, ekz., en disko- kaj pezglobo-ĵetoj. Oktobre de tiu jaro ŝi partoprenis la Unuan Ĉinan Handikapulan Sportkunvenon okazintan en Anhuj-provinco kaj kreis la landajn rekordojn de virinaj disko- kaj pezglobo-ĵetoj je sia kripla kategorio.

Kvankam la sporta nivelo de ĉinaj handikapuloj estis konata nur kiam ili unuafoje partoprenis en la internacia konkurso en 1982, tamen la oficialaj sportkonkursoj de ĉinaj handikapuloj komenciĝis jam en la 50-aj jaroj.

En 1957 okazis en Pekino tutlandaj atletika kaj naĝa konkursoj de surd-mutuloj kaj en Ŝanhajo sportkunveno de junaj blinduloj. En 1959 la sporta

#### *En handikapula sportkunveno*



*Li Ĉenggang en naĝo*

organizo de Ĉinio okazigis tutlandan korbopilkan konkurson de surd-mutuloj. En la lastaj dek jaroj plipopulariĝis la sportoj de handikapuloj en diversaj lokoj kaj okazis sportkunvenoj de malsamaj skaloj ĉiujare. En 1976 la lernejoj por surd-mutuloj de kvin urboj de Ĝjangsu-provinco kune okazigis viran kaj virinan korbopilkan konkursojn. En 1980, en Junnankaj Ĝeĝjang-provincoj kaj Pekino okazis sportkunvenoj de surd-mutaj lernantoj. En 1983, okazis en Tjanĝin la ĝenerala landskala sportkunveno de handikapuloj de 13 provincoj kaj municipoj. Post unu jaro Ĉinio okazigis sian unuan sportkunvenon de handikapuloj. En 1985, 17 provincoj kaj urboj sinsekve okazigis tablotenisan konkurson

de handikapuloj, 6 provincoj kaj urboj atletikan konkurson, dekkelkaj provincoj, urboj kaj regionoj sian ĝeneralan sportkunvenon de handikapuloj. Pekino, Tjanĝin, Ŝanhajo kaj Kantono unuafoje okazigis surrulseĝan korbopilkan konkurson inter la handikapulaj teamoj de la kvar urboj.

La sportaj aktivadoj de handikapuloj estas subtenataj de koncernaj departementoj de la registaro kaj subvenciataj de diversaj socitavoloj. La diverslokaj sportaj komisionoj kaj departementoj pri civilaj aferoj ĉiujare asignas monsumon al la sportaj aktivadoj de handikapuloj. En 1983 fondiĝis la Ĉina Sporta Asocio de Handikapuloj, kiu gvidas la sportajn aktivadojn de handikapuloj de diversaj

landpartoj. Por disvolvi surrulseĝan korbopilkadon, iu fabriko de la urbo Tangŝan elfaris konvenajn rulseĝojn. En la urboj Tjanĝin kaj Ŝanhajo oni konstruas centrojn de handikapuloj kun sportaj instalaĵoj. Iuj stadienoj de Siĉuan kaj aliaj lokoj anoncas ĉe la pordo, ke ili favoras handikapulojn.

En 1986 dek junaj handikapuloj, per sep rulseĝoj kaj tri bicikloj, veturis de Ŝjian al Pekino 1 300 kilometrojn kaj 29 tagojn kaj partoprenis en la maratona konkurso okazinta en Pekino, kun dekmil sportistoj.

Ilia bravaĵo ege emociis la Ŝjian-anojn kaj tiujn, kiuj ilin

renkontis survoje. Fabrikoj de Ŝjian provizis ilin per rulseĝoj kaj bicikloj. Iuj departementoj liveris al ili urĝe bezonatajn medikamentojn kaj porteblajn manĝaĵojn. Kiam ili veturis sur dekliva vojo, la preterpasantoj ĉiam volonte puŝis iliajn rulseĝojn. Ĉie oni donacis al ili vestojn kaj manĝaĵojn kaj helpis ilin solvi problemojn subite aperintajn.

Ekde 1982, kiam ĉinaj handikapuloj unuafoje partoprenis en la internacia konkurso, sportoj jam fariĝis ligilo inter la ĉinaj kaj alilandaj handikapuloj. La Ĉina Sporta Asocio de Handikapuloj starigis regulajn kontaktojn kun organizoj de handika-

puloj-sportistoj de diversaj landoj. En la lastaj kvin jaroj pli ol cent ĉinaj handikapuloj partoprenis en alilandaj sportkonkursoj, kaj samtempe dekelkaj sportaj delegacioj de eksterlandaj handikapuloj invitite venis al Ĉinio por partopreni konkurson aŭ interŝanĝi spertojn. Tio ne nur ebligis al ĉinaj handikapuloj kontaktiĝi kun la ekstera mondo, sed ankaŭ akcelis la sportajn aktivadojn de ĉinaj handikapuloj. En 1982 ĉinaj handikapuloj gajnis ses orajn medalojn en la internacia handikapula sportkunveno. En 1986 ili gajnis 64 orajn medalojn. Tiu rimarkinda progreso kuraĝigas la ĉinajn handikapulojn. □

## POR KOMENCANTOJ

### RADIKETOJ

Nokte, ventego faligis pinon antaŭ pordo. Ĝiaj radiketoj plejparte videbliĝis kaj sekiĝis sur la tero. La folioj do iom post iom velkis kaj la trunko perdis sian vivipovon.

“Kiel bona pino!” Oni ĝin ŝatis kaj ofte laŭdis.

Tamen, neniu sciis, kial tiuj sekiĝintaj radiketoj vekas apartan atenton. Oni rimarkis, ke ĉe la radikoj de la pino ankoraŭ vivas faskoj da delikataj radiketoj, kiuj firme brakumas la teron kaj pene enradikiĝas en ĝi. Tial la pino povis apenaŭ teni sian vivon.

Fakte, ĉiuj plantoj ne povas vivi kaj kreski sen radiketoj, kiuj silente laboras sindoneme. Kun ili la mondo estas plena je viveco.

Ĝuste pro tio oni laŭdas radiketojn. □

### POR SIN ŜIRMI KONTRAŬ PLUVO

Tri simioj ne volis plu vivi silentan vivon en arbaro kaj interkonsentis eliri el la arbaro. Ili ĝoje ludis sur kampoj. Vespere ekpluvegis. Tuj ĉe la vojo troviĝis lignokabano. La tri



simioj decidis eniri en ĝin por sin ŝirmi kontraŭ la pluvo.

Kiam la unua simio ankoraŭ ne atingis la pordon, ĝi sin turnis al siaj du kunuloj kaj senespere diris: “Malfeliĉo! La pordo estas fermita.”

Ĉirkaŭirinte la kabanon, la dua simio trovis, ke ankaŭ la fenestroj estas fermitaj.

La tria simio kriis: “Ne perdu tempon! Ni tuj elpensu rimedon por ĝin eniri!” La tri simioj do komencis diskuti. La diskutado daŭris longe, tamen neniu el ili elpensis bonan rimedon.

Ĝuste kiam ili intencis reveni al la arbaro, la vento malfermis la pordon. Tiam la tri simioj preskaŭ samtempe ekkriis kun ĝojo: “Ho! La pordo ne estas ŝlosita!” □

**Solvo por enigmo:**  
Termometro

# Vizito al ruinoj de la dinastioj Han kaj Tang

La provinco Ŝenŝji estas unu el la luliloj de la ĉina antikva civilizacio. Ĉinaj arkeologoj trovis multajn historiajn objektojn de Ĉin-dinastio (221 — 206 a.K.) en Jongĉeng, Ŝjanjang kaj aliaj lokoj de la provinco. La mondfamaj terakota legio, bronzaj ĉaroj kaj ĉevaloj de la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio estas elterigitaj en Lintong, Ŝenŝji-provinco.

La dinastioj Han (206 a.K. — 220 p.K.) kaj Tang (618 — 907 p.K.) estis ora tempo de la antikva civilizacio de Ĉinio. Tiam pro la vigla trafiko inter Ĉinio kaj aliaj landoj la kultura interŝanĝo prosperis senprecedence. La fama Silka Vojo komenciĝis de Ĉang'an (proksime de la nuna Ŝjian de Ŝenŝji-provinco), la ĉefurbo de la Okcidenta Han-dinastio, trapasante la Okcidentan Regionon (ĉe la nuna Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono), kaj kondukis ĝis Afganio, Irano, Hindio kaj aliaj landoj kaj regionoj de la Centra Azio.

Antaŭ nelonge mi veturis al Ŝenŝji kaj vizitis ruinojn de la dinastioj Han kaj Tang, en kies esplorado ĉinaj arkeologoj akiris rimarkindan sukceson dum la pasintaj jaroj.

## RUINO DE LA TRAPEZA URBO


Aŭtoveturinte de la nordokcidenta antaŭurbo de Ŝjian ĉe

duonhoron, mi vidis teran muron kaj monteton en la malproksimo. Mia akompananto arkeologo Ĉang Ljanŝji diris al mi, ke la muro estis la suda urbomuro de Ĉang'an kaj la monteto la ruino de la palaco Ŭejjang, unu el la tiamaj grandiozaj palacoj. La urbo Ĉang'an de Han-dinastio estis la politika, ekonomia kaj kultura centro de Ĉinio dum pli ol 200 jaroj. En la tiam Ĉang'an krom grandioza palacaro troviĝis ankaŭ ok larĝaj stratoj kaj 160 stratetoj. La orienta kaj okcidenta bazaroj en la norda urbo estis loĝkvartaloj de ordinara loĝantoj, en la suda urbo estis loĝejoj de oficistoj kaj en la nordokcidenta urbo funkciis ceramikaj-farejoj, kaj monfarejoj. Ekster la urbo troviĝis naŭ movoplenaj bazaroj. Oni taksis, ke tie siatempe vivis ĉ. 250 000

loĝantoj. Ĉang'an same kiel Romo, estis unu el la plej gravaj urboj en la tiam mondo.

Ĉang Ljanŝji dum multaj jaroj sin okupis pri arkeologia prifosado de Ĉang'an. Li diris, ke ekde la 50-aj jaroj Ĉinio kondukis grandskalan prifosadon de tiu fama urbo. Oni jam havas fundamentan konon pri la urba skalo kaj palacoj. Ĉang'an estis senregule kvadrata kiel la Granda Ursino, tial oni nomas ĝin trapeza urbo. La orienta urbomuro longis 6 000 metrojn kaj la suda 7 600 metrojn kaj la totala areo kovris 36 kvadratajn kilometrojn. La urbomuroj, ok metrojn altaj, senescepte estis konstruitaj el ramita tero. La urbo Ĉang'an havis entute 12 pordegojn, ĉiu kun tri enirejoj. Ĉiu enirejo rigardis al strato ses metrojn larĝa. Sur la tri stratoj

*La Templo Blua Drako en Ŝjian*





12 ĉaroj povis samtempe veturi unu apud alia. En la kloakoj sub la stratoj oni trovis multajn drenilojn en formo kvinangula aŭ ronda, kio montras, ke tiam jam funkciis unuigita drensistemo.

Ni venis al la ruino de Ŭej-jang-palaco, interparolante. La palaco rigardis norden. Ĝi estis luksa palaco kun griza tegmento kaj alta firsto. Starante en ĝi, oni havis agrablan rigardon al la malproksima Ŭejhe-rivero kaj panoraman vidon de la urbo Ĉang'an. La palaco estis konstruigita de Ŝjaŭ He, ĉefministro de la Okcidenta Han-dinastio. En 199 a.K. Liŭ Bang, imperiestro de la Okcidenta Han-dinastio, revenis de la batalejo kaj, vidinte la luksan palacon, kolere diris: "Nun la lando estas en

tumulto de multjara militado. Mi ankoraŭ ne estas certa, ĉu ni gajnos la militon aŭ ne. Kial vi konstruigis la palacon tiel luksan?" Ŝjaŭ respondis: "La imperiestroj prenas la tutan landon kiel sian hejmon. Neluksa palaco ne povas montri la imperiestran majestecon, kaj plie, ni ne devas lasi niajn posteulojn nin superi." Aŭdinte tion, Liŭ Bang ekĝojis. Nun la ruino de la palaco estas teramaso 13 metrojn alta, kio faciligas imagi, kiel grandioza estis la palaco siatempe.

Montrante la nordajn teramasojn kaj vilaĝon Ĝang diris: "Tie estis la Domo Tjanlu kaj Domo Ŝiĉju, antaŭaj bibliotekoj de la kortego de Han-dinastio. Sima Ĉjan, historiografo de la antikva Ĉinio, verkis la faman libron

'Kroniko de Historio' ĉefe laŭ la tieaj materialoj."

Montrante la kampon apud la orienta ŝoseo, li diris: "Tie estis arsenalo de la dinastio Han. Tie oni elterigis amason da armiloj, kiaj feraj glavoj, spadoj, lancoj, halebardoj, sagoj, hakiloj kaj kiraso kaj bronzaj lancoj, sagoj kaj spadoj."

Nordokcidente de la loko troviĝas malalta kampo, kie estis imperiestra amuzejo Tajje-lago, konstruigita en 104 a.K. de imperiestro Udi (140 — 87 a.K. sur la trono). En la sepdekaj jaroj de la 20-a jc. oni tie elterigis unu ŝtonan fiŝon 3 metrojn longan. Nun tie prosperas granda fruktoĝardeno.

## LA TEMPLO BLUA DRAKO DE TANG-DINASTIO

Sudoriente de la urbo Ŝjian, sur iu alta loko staras la Templo Blua Drako kun arkitekturaj trajtoj de Tang-dinastio, kiu havas grizan tegmenton kaj altan firston. Ĝi estas vidindejo jam de antikve. La templo, konstruita en 582 p.K., ekhavis la nunan nomon en 711 p.K. Post la 10-a jc. la templo estis ruinigita kaj komplete malaperis la konstruaĵoj sur la tero, kaj la ruino estis enterigita. Sed post 900 jaroj tiu alta grandioza antikva templo reaparis surtere.

Oni devas atribui ĝian reaparon al budhistoj ĉinaj kaj japanaj, niaj japanaj amikoj kaj ĉinaj arkeologoj. Origine ĝi estis fama templo de la budhisma sekreto-sekto en Tang-dinastio. Kukai, fama japana bonzo, veturis al Ĉang'an en 804 p.K. kaj disĉipliĝis al la bonzo Hujĝo por lerni de li la sekreto-sekton. Reveninte Japanion, Kukai fariĝis kreinto de la sekreto-sekto de sia lando. Antaŭ kelkaj jaroj Ĉinio kaj Japanio kune restarigis

*Esplorado de la ruino de la Jaŭĝoŭ-a Ceramikaĵ-bakujo*




la templon kaj plie pagodon memore al Kukai. Dum mia vizitado mi vidis dekelkajn japanajn budhanojn sonorigantaj kaj adorkliniĝantaj.

En la templo troviĝas oraj statuoj de Hujĝo kaj Kukai kaj elterigitaj ŝtonaj budhoj, oritaj budhaj statuoj, arĝentaj budhoj, dispecigitaj budhaj statuoj trikoloraj, argilaj pagodoj kaj aliaj historiaj objektoj de Tang-dinastio. Tie eksponiĝas ankaŭ kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj donacitaj de japanaj budhistoj.

### ELTROVO DE ANTIKVAJ BAKUJOJ DE TANG-DINASTIO

La blua porcelano de Jaŭĝoŭ-Ŝenŝji-provinco estis unu el la famaj ceramikaŝ-sistemoj de la antikva Ĉinio, tamen ekde la 13-a jc. pro milita tumulto ĝi iom post iom dekadencis kaj la specoj kaj metodoj de ĝiaj produktaĵoj estis malmulte konataj. En la lastaj jaroj arkeologoj elterigis antikvajn ceramikaŝ-bakujojn en la periodo de Tang- ĝis Jŭan-dinastio (618-1368), ĉe Hŭangpu de la urbo Tongĉŭan, Ŝenŝji-provinco. Inter ili tri trikoloraj ceramikaŝ-bakujoj estis trovitaj unufoje en Ŝenŝji-provinco. Nur tiam la Jaŭĝoŭ-a ceramikaŝo estis konata vaste.

Ĉe la ruino de la Jaŭĝoŭ-a ceramikaŝ-bakujo 5-kvadratkilometra, la geedzoj Du Baŭĵen kaj Ĝŭo Ĝenŝji, respondeculoj pri la prifosado, diris al mi, ke la Jaŭĝoŭ-a bakujo estis unu el la famaj ceramikaŝ-bakujoj en la antikva Ĉinio. Ĝi havis historion de pli ol 800 jaroj en la kontinua bakado de ceramikaŝoj. Tial ĝi povas esti rigardata kiel historia muzeo de ceramikaŝoj. Ĉi-foje oni faris elfosadon sur la areo de pli ol 5 000 kvadrataj metroj, science kaj sisteme reordigis 14



*Trikolora ceramikaŝo en formo de drakkapo elterigita ĉe la ruino de la Jaŭĝoŭ-a Ceramikaŝ-bakujo*


ceramikaŝ-metiejojn, 18 bakujojn, kaj elterigis 300 000 pecojn da porcelanaĵoj. La teknologiaj ekipaĵoj por materialo-pretigado, muldado, glazurado, sekigado kaj bakado plejparte estas bone konservitaj. El la elterigitaj specimenoj estas multaj raraj objektoj nekonataj. Oni povas determini kaj scii laŭ la elterigitaj ceramikaŝ-pecoj la specojn, kolorojn kaj desegnojn de produktaĵoj de la Jaŭĝoŭ-a bakujo. Estas tre grave eltrovi la bakujon de trikoloraj ceramikaŝoj de Tang-dinastio en Ŝenŝji-provinco.

La trikoloraj ceramikaŝoj de Tang-dinastio estas la plej famaj ceramikaj metiartaĵoj de la dinastio kaj kovritaj per flava, verda, kaŝtana, blua aŭ alia glazuro. La glazuroj malsamkoloraj donas variantan, artan efikon al ornamaĵoj post fandiĝo kaj sorbiĝo dum bakado. Ili aspektas nature, vigle kaj hele. Ili plejparte havas formojn de kamelo, ĉevalo kaj belulino kaj parte estas trikoloraj, glazuraj tegoloj por konstruoj, kiuj estis nemankigeblaj por la palacoj kaj gravaj konstruoj de Tang-dinastio.

Oni elterigis en Ŝenŝji multe da trikoloraj ceramikaŝoj el la imperiestraj maŭzoleoj kaj aristo-

krataj tomboj de Tang-dinastio. Sed antaŭe en tiu provinco oni neniam trovis bakujon de tiaj ceramikaŝoj, tial ĝenerale oni opiniis, ke la produktejo de la trikoloraj ceramikaŝoj estis en Lŭojang kaj ĝiaj proksimaj lokoj de Henan, sed ne en Ŝenŝji. Oni pli multe kaj pli klare konis la produktejojn kaj produktaĵojn de la trikoloraj ceramikaŝoj de Tang-dinastio, dank' al la eltrovo de la metiejoj de ceramikaŝoj kaj amaso da specimenoj inkl. de bovloj, kruĉoj, lanternoj kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj kaj trikoloraj ceramikaŝoj kun drakkapo, rinoceroj, glazuraj tegoloj kaj aliaj altklasaj konstruaj materialoj.

En la antikva bakujo mi vidis muelujon, argilan vazon, fornon kaj aliajn objektojn por produkti ceramikaŝojn kaj en la eksponejo vidis reproduktitajn specimenojn de ceramikaŝoj de Tang- ĝis Jŭan-dinastio. Nun oni jam atingis unuapaŝan sukceson en provbakado de bluaj porcelanaĵoj imititaj laŭ tiuj de la antikva Jaŭĝoŭ-a bakujo. Inter la imitaĵoj estas tripieda vazo, incensujo, botelo, bovlo k.a., tamen iliaj koloroj kaj formoj ankoraŭ ne donas tiel bonan efikon, kiel tiuj de la antikvaj produktaĵoj. □



*Loĝdomoj en Tangŝan, Ĉinio*

## Senhejmuloj en la mondo

Laŭ la plej freŝa statistiko farita de la Centro pri Homa Loĝado sub UN, miliardo da homoj en la mondo vivas en loĝejoj kun tre malbonaj kondiĉoj kaj preskaŭ 100 milionoj da migrantaj homoj ne havas siajn loĝejojn.

La problemoj pri senhejmuloj serioze ekzistas en la evoluantaj landoj. Duono el la urbanoj de tiuj ĉi landoj ne povas ne loĝi en kvartaloj de ladvilaĝoj kaj en iuj urboj eĉ 80%. Nun pli kaj pli multaj superflujaj laborfortoj eniris en urbojn, ke la nombro de urbanoj rapide ekspansiis kaj la nombro de senhejmuloj rimarkeble grandiĝis.

Nun la procentaĵo de la jara kresko de urbaj loĝantaroj en la evoluantaj landoj atingas 3.5, t.e. pliiĝas 49 milionoj da homoj ĉiujare. Post la jaro 2000, pliiĝos 78 milionoj da homoj ĉiujare. En 1985 la nombro de la urbanoj en la evoluantaj landoj atingis 1.2 miliardojn. Laŭ antaŭkalkulo la nombro atingos 2 miliardojn en la 2000-a jaro. Se oni tiam tenos la nunan loĝnive-

lon, la evoluantaj landoj devos konstrui ankoraŭ tiom da domoj, bazaj instalaĵoj kaj servaj ekipaĵoj kiom nun ili havas. Tio sendube estos tasko malfacila por la evoluantaj landoj.

Senhejmuloj restas ankaŭ en la evoluintaj landoj. La materialo liverita de la Centro pri Homa loĝado sub UN montras, ke en Usono estas 2.5 milionoj da senhejmuloj. Lastatempe la ĵurnalo Vaŝingtona Poŝto raportis, ke en 1986 la kvanto de la sendomaj familioj en Vaŝingtono, kiuj urĝe petis doni al ili domojn, pligrandiĝis pli-ol-sesoble.

Laŭ registara statistiko, estas 100 mil sendomaj familioj en Britio kaj la efektiva nombro estas eĉ pli granda ol la supre dirita. En 1982 la Ministerio de Medio de Britio taksis, ke Britio havas ankaŭ ĉ. 330 mil kaŝitajn senhejmulojn.

Loĝado estas baza bezono de la homaro kaj ankaŭ grava marko de la homa civilizacio. La mondskala problemoj de loĝado

estas granda defio al la homaro. Ĝi altiras al si grandan atenton de diverslandaj popoloj kaj registaroj. En 1982, la 37-a Ĝenerala Asembleo de UN aprobis la rezolucion difini 1987 kiel la "Internacian Jaron por Ŝirmi Senhejmulojn", proponitan de Premadasa, ĉefministro de la Sri-Lanka Demokratia Socialisma Respubliko. Tio estas aktive subtenata de multaj landoj.

En la 17-a dec. 1985, la 40-a Ĝenerala Asembleo de UN unuvoĉe decidis, ke la unua lundo de ĉiu oktobro estos la "Internacia Tago pri Loĝado", kun la celo, ke la ĉiujara festado atentigu diverslandajn popolojn kaj registarojn, ke ili kiel eble plej rapide solvu sian propran problemon de loĝado.

Nun la Komisiono pri Homa Loĝado sub UN faras aktivan provadon en la evoluantaj kaj evoluintaj landoj, alprenante novajn paŝojn kaj metodojn, por energie kuraĝigi ĉiujn landojn plibonigi loĝkondiĉojn kaj vivmedion de la malriĉuloj en la urboj kaj kamparo. □



# Juŝu—ĉina akvoturo

de DA ŬEJ

Vojaĝinte laŭ Tŭotŭo-rivero, mi veturis de Ŝjining al la Juŝu-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco ĉe la supra Jangzi-rivero.

Posttagmeze de la tria tago, antaŭ mi prezentiĝis bela ponto. Mi subite emociiĝis, ke mi venis al la ponto super la torenta Tongtjan-rivero, la supra parto de Jangzi-rivero.

Mi elaŭtiĝis kaj piediris laŭ la rivero. Ambaŭborde alte staras montaj krutaĵoj, inter kiuj serpentas sudorienten Tongtjan-rivero kun larĝeco de ĉ. 100 m.

Ĝi, kun longeco de pli ol 800 km., fluas tra la subprovinco.

Mia artikolo do unue raportu pri la subprovinco.


## LA FONTO DE TRI RIVEROJ

Juŝu estas fame konata kiel ĉina akvoturo.

Jangzi-rivero kaj la Flava Rivero, la plej grandaj riveroj de Ĉinio, fontas en Juŝu-subprovinco de la sudokcidenta parto de Ĉinghaj-provinco. Ĝi havas areon de 197 000 kvadrataj kilometroj kun Kunlun-montaro norde kaj Tanggula-montaro sude. Tŭotŭo-rivero, la ĉefa fonto de Jangzi-rivero, Damĉju-rivero, la suda fonto, Ĉumar-

rivero, la norda fonto, kaj pli ol dek relative grandaj branĉoj formis sektoran fontan akvosistemon de Jangzi-rivero. La tri fontoj kunfluas en Tongtjan-riveron ĉe Nangĝjibalong de Juŝu. La Flava Rivero fontas ĉefe ĉe la piedo oriente de Geŝigeja-monto de Bajanhar-montaro en Ĉumarleb-gubernio de la subprovinco. Ankaŭ Mekongo, la sesa granda rivero de Azio, kiu trafluas plurajn landojn, fontas en Juŝu. Ĝia parto en Ĉinio nomiĝas Lancang-rivero.

Juŝu meritas la nomon "akvoturo" kaj sin dediĉas malavare. Tamen la tieaj naturaj kondiĉoj estas tre malfavoraj. Ĝia jara precipitaĵo estas tre malmulta, dum ĝia jara vaporigo estas tre granda. Kaj tie ofte okazas tondra, hajla, prujna, venta kaj neĝa katastrofoj. Ĝia orienta rivervalo parto estas 3 700 metrojn super la marnivelo, la aliaj lokoj plejparte estas 4 000-5 000 metrojn super la marnivelo. Tial la klimato de Juŝu karakteriziĝas ĉefe per altebenaĵa frostado. Tie en unu jaro estas nur sezonoj varma kaj malvarma, ne estas absolute senprujna sezono, la klimato ne favoras kreskadon de diversaj specaj agrikulturaj plantoj.



## ĜJEGU-URBETO KAJ ĜJEGU-TEMPLO

Ĝjegu-urbeto estas la sidejo de la subprovinca registaro. Kiel antikva urbeto ĝi rememorigas pri la pasinteco de Juŝu.

Ĝjegu tibetlingve signifas var-distribuejon. Laŭdire, de longe Ĝjegu estis grava var-distribuejo por Ŝjining de Ĉinghaj, Kangding de Siĉuan kaj Lhasa de Tibeto, kaj komercistoj tie vendis varojn de pli ol cent specoj, inkl. de teo kaj aliaj. Sed ĝi malprosperis en la fino de la 40-aj jaroj de la kuranta jarcento.

Post la pasintaj pli ol 30 jaroj Ĝjegu estis konstruita en urbeton kun rudimenta skalo. Laŭ la rivero konstruiĝis T-strato, ĉe kies ambaŭ flankoj staras aroj da domoj. Inter ili estas lernejoj, agronomia instituto, subprovinca, gubernia kaj tibetmedicina hospitaloj, kulturaj domoj, stadiono,

negoca kompanio, ĉiovendejoj, manĝajbutikoj, poŝtoŝejoj kaj aliaj diversaj servoj.

Mi vizitis la Subprovincan Viand-prilaborejon. La subprovinco Juŝu estas paŝta regiono sen industrio. Tial okulfrapas la domoj de la prilaborejo kaj ĝia frida tenejo. Ĝia estro Cajfen diris al mi, ke ili konstruis fridan tenejon kun kapacito de 1 500 tunoj da viando. Ĉiujare la prilaborejo buĉas kaj prilaboras pli ol 10 000 bovojn kaj pli ol 20 000 ŝafojn por kontentigi la bezonon en kaj eksterlande. En la prilaborejo oni plenumas la tutan procezon de produkto, de buĉado ĝis viandentenejigo, per duonaŭtomata produkta linio. Mi informiĝis de li, ke la buĉistoj de la prilaborejo estas imamoj.

La privataj domoj de Ĝjegu altiris mian atenton. Ili estas

duetaĝaj dometoj; iuj strukture simplaj, aliaj kun alta bazamento kaj pentritaj traboj kaj kolonoj, triaj eĉ kun desegnoj faritaj per moderna konstrutekniko. Koncerne la stilon, iuj portas la tibetan, aliaj la han-an kaj triaj estas simple miksaĵoj de ambaŭ.

Sur la monto sudokcidente de Ĝjegu sin trovas konstruaĵaro. Tio estas Ĝjegu-templo, la plej granda en la subprovinco. Ĝi apartenas al Saĝja-sekto (hanlingve hŭa-religio), unu el la kvar grandaj religi-sektoj de Tibeto, kaj havas historion de 500 jaroj.

Post peniga grimrado mi anhelante atingis Ĝjegu-templon. La ekstera muro de la templo havas sur si ruĝan koloron kun nigraj-blankaj vertikalaj strioj. Eble tio estas simbolo de Saĝja-sekto. En la templo estas kultataj tri budhostatuoj respektive de la pasinteco, nuneco kaj estonteco. La gastamaj bonzoj regalis

*Pontego super Tongtjan-rivero*





*Junaj tibetanoj en ŝnurtirado*

min per sunfloraj semoj, bombo-  
noj kaj buterteo. Estis unuafoje  
por mi manĝi helbrunan buter-  
teon. Ĝi gustas iom acide kaj  
sale. Laŭ mi, ĝi ne pli plaĉas al  
mi ol ĝia nomo.

La 17-jara bonzo servis kiel  
mia interpretisto. Li bone parolis  
hanlingve. Post diplomitiĝo  
el malsupera mezlernejo li mem-  
vole sin anoncis por labori en la  
templo. Mi demandis, pro kio li  
bonvolis esti bonzo. Meditinte  
li respondis: “Estas malfacile  
klarigi. Almenaŭ tio estas pro-  
fesio.” “Ĉu vi estas salajrataj?”  
“Jes, nun la bonzoj ricevas ne-  
fiksitan enspezon ĉiumonate, de  
kelkdek ĝis ducent jŭanoj.” Mi  
estis mirigita. Li daŭrigis: “La  
enspezo parte venas de tributo de  
tibetanoj, parte de perlaboro en  
transportado, ĉar nia templo  
posedas kamionon.” Estis ekster-  
mia atendo, ke bonzoj, krom  
voĉlegi sutron, ellernis ankaŭ la  
kapablon perlabori monon.


La tibetanoj de Juŝu ĝenerale  
kredas je budhismo. Apude de  
la templo estas preĝhalo. Mi  
vidis, ke tie dekoj da tibetanoj,  
aŭ kun kunmetitaj manoj aŭ kun  
fingroj nombrantaj rozariojn,  
senhalte faras rondiradon ĉirkaŭ  
la preĝhalo kaj voĉlegas sutron.  
Tion tibetanoj faras tagnokte en  
la tuta jaro.

Mi surgrimpis monteton por  
havi panoraman vidon al Ĝjegu-  
urbeto. La riveretoj Zaĉju kaj  
Baĉju, kiuj venas respektive de  
okcidente kaj sude, kunfluas en  
la mezo de la urbeto kaj kuras  
orienten plu, portante la nomon  
Tongtjan-rivero. La urbeto  
ĉirkaŭata de altaj montoj sin  
trovas sur rivervala ebenaĵo pli  
ol 3 700 metrojn super la  
marnivelo. En vespera krepusko  
Ĝjegu-templo aspektas kiel an-  
tikva kastelo. Ĝi estas la simbo-  
lo de la antikva Ĝjegu-urbeto,  
kiel Potala-palaco estas la simbo-  
lo de Tibeto.

*Tibeta maljunulino*







*En viand-prilaborejo*

## VIVLOKO DE NIGRAKOLAJ GRUOJ

Informiĝinte, ke Longbaŭtan de Juŝu estas vivloko de nigrakolaj grupoj, mi decidis viziti la lokon.

Nia aŭto transkuris lateritan monteton, kaj antaŭ niaj okuloj prezentiĝis larĝa baseno kun herboj. Ĝi estas Longbaŭtan. Antaŭe tie estis lago. Poste la lago iom post iom retiriĝis pro malpliigo de la akvo. Kaj nun estiĝis vasta tereno kaj la lago fariĝis eta.

Mi trovis, ke la fora herboriĉa loko estas punktita de blankaj tendoj kaj sur ĝi kolektiĝas homamasoj. Tie oni okazigis ĉevalkonkurson. Ho, kia ŝanco! Mi hastis al la organizanto de la konkurso, li estis vivanta budho. De li mi informiĝis, ke la konkurso estas okazigita de Ĝjelong-distrikto kaj partoprenata de pli ol 1 000 sportistoj, ke krom la ĉevalkonkurso, iras ankaŭ konkurso de gruntoj, ŝnurtiro, portado de sablosakoj k.a. La aktivadoj multe plaĉas al la paŝtis-

toj. Tia ĉevalkonkurso okazas ĉiujare. Dum mia intervjuo oni regalis min per buterteo kaj bongusta ŝafaĵo.

Kiel en festo, ĉiuj tendoj tie estis novaj, kun nigraj desegnoj. Viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj infanoj ĉiuj portis festajn vestojn. La knabinoj bele sin vestis, sed estis hontemaj. Apenaŭ ili trovis, ke oni direktas al ili fotilon, ili forkuris kovrante la vizaĝon permane. La tibetanoj de Juŝu ŝatas ornami la kapon. La kapornamaĵoj de virino prezentas la riĉecon de la familio. Ili estas faritaj el oraĵoj, arĝentaĵoj, perloj kaj juveloj. La kapornamaĵoj de virino de plej riĉa familio kostas 40 000 jŭanojn.

Sed la kapornamo de junuloj estas simpla, nur kun arĝenta monero fiksita sur ruĝa kaptuko. Junuloj montris sin senĝenaj antaŭ fotilo. Iafoje ili eĉ staris antaŭ la fotilo kaj prezentis diversajn pozojn, por ke mi helpu ilin elekti la plej bonan pozon. Infanoj estis petolemaj kaj ĉiam sekvis min. Verdire, la kultura vivo de la tibetanoj estas tre mal-

riĉa. Tial la fotilo estas miriga por ili.

Konkurso pri forto estas rigardata kiel montriĝo de vireco. Ŝnurtiro kaj portado de sablosako havigas al ili la ŝancon sin montri. Fortaj viroj povas levi sablosakon ĉ. 120 kg. pezan antaŭ sian bruston. Sendube, ili eĉ povas faligi gruntoj!

La ĉevalkonkurso iris grupo post grupo kaj la nerva streĉeco de la ĉeestantoj atingis sian kulminon. La vivanta budho metis longan blankan silkajon sur la kolon de ĉiu partoprenanto, kaj eĉ sur tiun de la ĉevalo.

Mi rimarkis ankaŭ, ke multaj tibetanoj kondukis siajn infanojn antaŭ la vivantan budhon, por ke li karesu ilian verton aŭ tuŝu ilian vangon per la sia, kaj poste respektplene donis al li kelkan monon. Laŭdire, tio povas forigi plagon kaj beni la infanojn.


Forlasinte la konkursejon, mi daŭrigis la vojon por rigardi la raran birdon nigrakola grupo. Longbaŭtan estas difinita kiel rezervejo, kie vivas 40 paroj da nigrakolaj grupoj, troveblaj nur en Ĉinio. La nigrakola grupo estas la plej rara el la 15 specioj de grupoj en la mondo. Septembro kaj oktobro estas tempo, kiam nigrakolaj grupoj ekzercas siajn idojn per flugado antaŭ ol migri al la Junnan-Gujĝou-a Altebenaĵo por travintri.

Iu lokano, kiu akompanis min, montris al mi blankajn punketojn inter la foraj akvoherboj, dirante: "Vidu, ili estas nigrakolaj grupoj!" Mi haste elaltiĝis kaj malrapide alproksimiĝis al ili laŭ la laga bordo. Ili estis du grandaj kaj du malgrandaj grupoj, kun nigraj kolo kaj vostofino. Ŝajnis, ke ili ne bonvenigis nin. Ili svingis siajn flugilojn, ekleviĝis kaj flugis foren, antaŭ ol ni pliproksimiĝis al ili. □




*En ĉevalkonkurso*

*Nova loĝdomo en Ĝjegu-urbeto*









*La antikva Ĝjegu-templo*

*Nigrakolaj gruoj ĉe Longbaŭtan*







*Gjegu-urbeto*

*En Gjegu-templo*





*Začju, brančo de Tongtjan-rivero*

